POPIDO

la Verda Dialekto

Serio <La Sociolekta Triopo>

fare de
Manuel Halvelik

Versio 3 — 2010

POPIDO

(Elipso de Popola Idiomo)



Mi rompis al mi la kapon pri la demando kiel esprimi dialektan parolon de la salamandroj en la fama verko de Karel ČAPEK: "Milito kontraŭ la salamandroj"


[D-ro PUMPR]

La traduko de dialekto en Esperanto ne tro deflankiĝu de la korekta Esperanto kaj ĉiuokaze estu simila al ĝi kaj facile rekonebla.

[F. FAULHABER]

Internacia lingvo devas servi kiel vasta bazo por ĉia speco de internacia kompreno, kio signifas kompreneble en la fina analizo, ĉian specon de esprimo de la homa spirito.

[Edward SAPIR]



Artvitraĵo de Frans van Immerseel
pri Palitro kaj Marika

Sur ĉeval o sur bovin, hot !

ENHAVO



Mi nej preĝat por brunas fabês ! (Bartolo)

PRAVIGO

La samideanoj AJSBERG *kaj* FERNANDEZ *bonvole pardonu al mi pruntepreno n de ilia tiel sukcesplena dialoga formulo, por ke mi povu respondi al la pripensoj kaj kritikoj jam troveblaj en nia literaturo aŭ antaŭvideblaj, koncerne tiun ĉi temon kaj konektajn aferojn.*

Simplicius (la skeptikulo): Ĉu miaj okuloj trompas min aŭ ĉu vi jen ree venas al mi kun iu nova lingvo-projekto sub la brako ? La triumfa rideto sur via vizaĝo aŭguras nenion bonan ...

Salviati (la adepto): Nu, he, jes, vi divenas ĝuste. Estas projekto pri Esperanto-dialekto, por ebligi tradukon ankaŭ de tiaspecaj tekstoj beletraj, sen fari el ili koineon*. Ĝi nomiĝas "Popido".

Simplicius : Mi pensas ke la artovaloro de literatura verko estas tute sendependa de la demando ĉu ĝi estas skribita en dialekto aŭ en la oficiala norma lingvo. Krei apartan Esperanto-dialekton por traduki tiujn el koncernaj nacilingvajn tekstoj sekve estas tute superflua entrepreno.

Salviati : Kompreneble kaj feliĉe, beletra verko ĉiam restas beletra verko, ankaŭ en faksperte farita traduko, ĉar alimaniere neniu plus-minus dialekteca verko ĝis nun estus tradukita al nia internacia lingvo. Ekzemple el la frisa, la friula, la bavara, kiom oni rajtas konsideri tiujn kiel dialektojn. Por tiu tasko, multfoje pruvita en praktiko, certege sufiĉas la zamenhofa formo de nia verda lingvo. Sed tion mi tute ne celas ! Kion mi jes celas estas tiuj kaj tiaj naci-lingvaj tekstoj en kiuj aperas vortoj, esprimoj, eĉ tutaj dialogoj, kiuj kontrastas kun la oficiala lingvo.
Permesu al mi analogion. Bela pentraĵo konsistanta el tri paneloj, kiel ekzemple *La Ŝafido de Dio* fare de VAN

EYCK, restis same bela kaj admirinda kiel antaŭe, post kiam ŝtelisto forrabis de ĝi unu flankpanelon. Sed, sen tiu tria panelo la fama pentraĵo estus kripla, ne kompleta. Ĝis kiam oni malkovros la kaŝejon de la ŝtelita panelo, oni tial estas devigita meti kopion de ĝi en la originala loko, donante almenaŭ la impreson de kompleteco al turistoj. Iom simile statas ĉe literatura verko nacia, el kiu oni forprenus (aŭ prisilentus) eventualan fragmenton en dialekto.
Via rifuzo estas enfunde ne realisma, pro la neniam pruvita kliŝo ke Esperanto en sia klasika formo taŭgus jam por nepre kaj detale ĉio. Por klubaj rondoj kaj universalaj kongresoj kredeble jes, por krei aŭ traduki altvaloran literaturon certe jes, sed ne en la postulema reala vivo ĉiutaga. Se tiel, ankaŭ miaj projektoj Arkaika Esperanto kaj Gavaro, la Verda Slango, estus efektive tute superfluaj kaj eĉ ĝenaj aldonoj. Ĉu vi ne flegas fiksideon ke Esperanto, estante ja planlingvo, tutsimple ne kapablus posedi dialekto(j)n, same kiel ĝi ne kapablus posedi pra-lingva(j)n formo(j)n kaj ĵargono(j)n, male al nature est-iĝintaj lingvoj ? Evidente, duona ovo valoras pli ol malplena ŝelo; traduko al nura koineo estas pli bona ol neniu traduko. Sed se estas ofertata ebleco plenigi ankaŭ koncernan mankon, jenkaze dialekton, kial vi do ne bonvenigus ĝin kaj komencu traduki dialektajn fragmentojn en la maniero kiun tiuj meritas ?

Simplicius : Vi do postulas ke ekde nun oni traduku ĉiun ne grandlingvan literaturon per via — he, kiel ankoraŭ ? — ha jes, per via Popido ! Vi ŝajnas forgesi, ke la klasikaj tradukoj kiujn ni jam posedas kaj kapablas fari de idiomaj beletraĵoj, ni diru de bela poemo de MISTRAL el la okcitana, estas ofte same belaj kaj esprimpovaj kiel la originaloj — foje eĉ pli !

Salviati : Tute ne, kara amiko, tute ne ! Vi ne atentis kion mi jam emfazis. Mia intenco estas nur: solvi la ĝis nun ne solveblan kontraston aŭ konflikton kiu

okaze — esceptokaze — aperas inter koineo kaj dialekto, kiam tiuj — do finfine rimarku — kiam tiuj aperas kune en la sama kadro.
Koncerne al verkaĵo komplete en dialekto skribita, oni povos ĝin laŭplaĉe traduki ĉu en aŭtentan Esperanton zamenhofan, ĉu en popidan Esperanton. Estas kaj restos tio afero de persona gusto de la tradukanto. Se li opinias ke tiu dialekto aŭ loka idiomo en la elektita originalaĵo meritas la statuson de plenrajta, memstara lingvo, tiam li traduku tradicie. Se li male opinias ĝin dialekta devio kaj volas redoni tiun specialan faceton, tiam li traduku verd-dialekte. Jen ĉio; al mi estas egale.
Kompreneble ankaŭ iam-tiam aperas en nacilingvo teksto lardita de dialektaj vortoj. Tiaĵon miasente oni ne provu adapti per Popido; tie povas eventuale nur taŭgi apliko de Gavaro por la ĝenaj pedikoj en la pelto.

Simplicius : Bone, bone, sed ĉu traduko en vian Popidon tamen — mi devas refari la rimarkon — tamen ne signifos valorperdon de la eventuala beleco de la originalo ? Dialektigo miaopinie aŭtomate kuntrenas koloron de aĉeco.

Salviati : Ĉar mia Popido estas nur supraĵtavola vario de Esperanto kaj konservas ĉiujn ties gramatikajn kaj vortarajn esprimkapablojn en alia vesto, la rezultato estos precize sama. Dependos nur de la lerto kaj inspiro de koncerna tradukanto aŭ verkanto. Aliflanke, apliko de Popido donas apartan ĉarmon, kiun ne posedas per si mem la norma lingvo de Zamenhof; ĝuste ĉar Popido prezentas sin kiel “maldelikatan”, kiel popularan parencon de la zamenhofa koineo. Unu kompletigas kaj suplementas la alian. Memoru cetere ke ankaŭ en la ĝisnuna aŭtentlingva situacio ja ekzistas naciaĵoj, kiujn oni ne kapablas en teknike sama maniero traduki, tiel al Esperanto kiel al aliaj nacilingvoj. Imagu ekzemple sentencon kies vortoj en

iu naturlingvo ĉiuj finiĝus per *–a*. En nia planlingvo ne estus eble tutfidele reprodukti tiun efikon, ĉar ni ne povas konstrui frazon en tiu maniero. Se ni postulus <u>absolutan</u> identecon, ni devus konsekvence forrifuzi la tutan tradukarton. Kiel ĉe Popido tiel ĉe la tradicia Esperanto.

<u>Simplicius</u> : Jes, sed tiu ideo pri “aparta ĉarmo” de dialekto estas subjektiva normo, plene dependa de persona gusto. Unu sama dialekto ŝajnas al denaskaj uzantoj tute natura kaj serioza, dum al parolantoj de la oficiala lingvo komika kaj naiva, dum por ali-dialektanoj aŭ fremduloj ĝi aperos eble eĉ stulta kaj kruda. Jam ĉe la starto do ne eblas redoni ĉiujn tiujn personajn impresojn.

<u>Salviati</u> : Certe, sed vi forgesas, amiko Simplicius, ke tio sama denove estas asertebla pri koinea beletro mem, depende de landoj kaj epokoj. Al Usonano, tragedia verkaĵo en la brita angla lingvo povas okaze kaj senintence inciti la ridmuskolojn, same kiel brit-eca teatra dramo. Kaj inverse, tre konvena verkaĵo, el usona plumo, povas impresi al iuj Britoj kruda kaj malsprita. Kaj, se ni restas en la sino de donita popolo aŭ lando: verkaĵo el la romaneca epoko de antaŭ unu-du jarcentoj efikas ridige bombasta je nuntempjs materialismaj homoj. Dume, tute progres-ema literaturaĵo hodiaŭa, impresos al ordinara publiko, al la t.n. “deca burĝo” ŝoka kaj abomena. Sen eĉ ombro de enmiksiĝo fare de dialekta lingvaĵo. Se do tiu ĉi aferstato estus argumento por preterlaso, ni devus tuje faligi nian tutan literaturon. Koncerne tradukadon kaj tradukeblon de dialekto, ĉiu konsidero pri “aparta ĉarmo” sekve ne atingas la kernon de la problemo, kiu envere kuŝas en la perdo de tre distinga <u>kontrasto</u> inter koineo kaj dialekto, kiun suferas la originalo; senrigarde estetikajn krom-faktorojn.

Kompreneble, ĉiu dialekto havas tiun aŭ alian tre tipan karakteron en la menso de leganto/aŭskultanto. Same kiel ĉiu koinea nacilingvo. Kaj estas neeble reprodukti en Espo-traduko ankaŭ tiun tute individuan karakteron de la originalo; eĉ se ni supozus ĝin objektiva elemento. Neniu kun sana cerbo postulos aŭ atendos de tradukanto ke li konservos tiun eterecan proprecon de la originalo.
Kion li jes rajtas atendi estas anstataŭigo de originalaj belo kaj spirito per novaj paralelaj belo kaj spirito. Se la nova travestio ludos saman rolon kiel la originalo, alstrebos saman celon, utiligos identan aŭ parencan stilformon, alportos en simila maniero iun "ĉarman apartecon", tiukaze la traduko estos fidela redono de la originalo, ĉu en dialekto aŭ en koineo.

Simplicius : Hm, povas esti, sed en la supozo ke via projekto estus utila — kio por mi ankoraŭ ne evidentas — kaj ke ĝi funkcius glate por traduki dialekton, en tiu supozo: kion vi do faros kiam pluraj malsamaj dialektoj devos esti tradukataj en la sama verkaĵo ?

Salviati : Jen la sola kritiko pri bazprincipoj, kiu efektive ion trafas. Estas vero, ke tiu ĉi — kiel cetere ĉiu ajn alia — lingvoprojekto, pro sia limiĝo al unu formo, ne kapablas redoni plurajn samtempajn, aŭ en komuna kadro aperantajn, variojn de la originalo. Tio estas: ne tiel ke al ĉiu aparta dialekto nacia respondus ankaŭ aparta projekto popida. Aŭ, per matematika formulo: ne en unu-unu-rilatumo. Mi nun pensas pri la usona vortĵonglisto Mark TWAIN, kiu en sia romano *The Adventures of Huckleberry Finn* sukcesis per dialogoj redoni la diferencajn dialektojn parolatajn laŭlonge de la riverego Mississippi.

Tia mikssituacio vere povas prezentiĝi, kvankam estante ĝenerale nete malpli ofta, eĉ rara, ol la simpla kontrasto inter unu koineo kaj unu donita dialekto. Ni imagu ekzemple dokumenton pri kunveno de

delegitoj el multaj terkultivaj regionoj de unu lando, kiuj personoj ne uzus aŭ (ankoraŭ) ne posedus vere komunan koineon. Aŭ pri kazerna dormejo kie kolektiĝis rekrutoj, kleraj kaj malkleraj, el ĉiuj anguloj de koncerna lando.

Nu, kiel defendon mi rimarkigu ke esenco de la problemo estas kaj restas kontrasto inter koinea lingvo kaj dialekta lingvo. Diferenciĝoj, varioj, kiuj aperus en tiu ĉi lasta, konsistigas nur duarangan problemon, ne prezentotan sur sama nivelo kiel la unua, ĉar ne samklasan. Estas, se tiel diri, kiel kontrasto inter du fundamentaj koloroj; ni imagu blua kaj ruĝa. Tiu kontrasto estas multege pli grava, kaj eĉ esenca, ol ke la ruĝa elemento povas aperi en granda nombro da nuancoj, ĉiuj oponaj al la blua. Per si mem tiu fakto jam sufiĉas en mia opinio por pravigi kreon kaj utiligon de ununura fiksa Espo-dialekto.

Plejofte oni povas simple ignori tiun materioriĉon, menciante nur ke temas pri tiu ĉi aŭ tiu alia aparteca deveno. Troviĝas eĉ tiaspeca modelo en la demonstra materialo de mia traktaĵeto [#25 "Opereta Okupado"] en kiu originalo rolas pluraj malsamaj loĝantaroj de iama Orienta Prusujo. La perdo de pliaj kontrastetoj, sur tiu duaranga nivelo, neniel egalas perdon de la fundamenta kontrastego mem, inter koineo kaj dialekto. Temas pri plejofte ignorebla pocento de pocento.

Kiel plian sagon sur mia pafarko mi volas rimarkigi al vi la fortan analogion ekzistanta en klasika Esperanto inter kutima vortaro kaj fremdvortoj. Se nia kar-memora majstro estus faliginta sian projekton pro motivo ke postrestis amasega kategorio de ribelemaj terminoj greklatinaj, vera tubero en la afero, kiujn li ne sukcesis enkorpigi sistemece kaj devis trakti per sia fama 15-a regulo, tiam ni nun ne kapablus diskuti internacilingve ! Kial mi do restu senage sid-

anta apud la kuirpoto, sub preteksto ke restas feĉo da servorifuzantoj ...?

Kroma faceto en naturlingvoj estas la facila kunfandiĝo inter dialekto kaj slango. Nu, ankaŭ tiun defion mi kapablas alfronti per Gavaro, kiu tute glate ligeblas al Popido, same kiel eĉ al Arkaika Esperanto. En la nuna stato, niaj verkistoj posedas neniun ilon por trakti dialektajn tekstfragmentojn, kaj estas devigitaj elturni sin, jen tiel ĉi jen tiel, per kripligado de vortoj aŭ parolsonoj, same kiel ili faras por (re)krei paroladon de ebriulo, de balbutanto, de fremdulo. Komparu en #01 (Viktimoj) la solvon de Baghy kun la mia. Kiel ekzemplo, jen kelkaj malsamaj manieroj por skribi kaj prononci la vorton *estas*: "eestas, estass, eŝtaŝ, ezdas". Aliigante en konsekvenca maniero ankaŭ ceterajn vortojn, oni povas havigi al ĉies teksto apartan "koloron". Simile kiel farus skriba figurigo de tipa prononco de fundamenta Esperanto fare de Anglo, Franco, Ruso, Ĉino, kotopo. Kio pli estas: al <u>ajna</u> dialektovario oni povas alligi <u>ajnan</u> kripligon/akcenton, ĉar neniu ja petos ke nia internacia lingvo, aŭ ĝia Popido, estu modifata tute kaj absolute akorde kun la originalo; mi volas diri: en precize identa maniero ! Sufiĉos simple ĉiu ajn oportuna modifo, kondiĉe ke oni apliku ĝin en kohera kaj konsekvenca maniero.

<u>Simplicius</u> : Vi babilas tiel multe pri formoj kaj varioj, ke mia kompaso freneziĝas ! Mi kredas ke via projekto devas esti terure komplikita vepraĵo, kiun neniu emos lerni.

<u>Salviati</u> : Ha, jen vi venas al la kerno de la problemo. Kiel mi jam aludis pli frue, mia metodo transformas la vortotrezoron kaj la regularon de Esperanto nur <u>laŭŝajne</u>. Por tion kompreni oni devas fari esencan distingon inter <u>ĝenerala radikaro</u> de adjektivoj, verboj, adverboj, substantivoj, plus "sekundaraj" afiksoj kiaj *il, ej, ge, eks* — kiu kategorio ampleksas milojn da

elementoj — kaj gramatika radikaro de korelativoj, pronomoj, numeraloj, prepozicioj, plus primaraj afiksoj kiaj *–o, -a, -i, -e* — kiu kategorio ampleksas nur kelkdekojn da elementoj.
Devus esti senplie klare ke, se oni transformus la unuan kategorion, eĉ en striktmetoda kaj laŭplana maniero, la nova lingvoformo fariĝus en vero malfacile rekonebla kaj mastrebla. Naskiĝus tute nova plan-lingvo apud la zamenhofa, kaj necesus tial ne-pravigeblaj tempo kaj energio por lerni kaj uzadi ĉiujn tiujn apartajn lingverojn. Estus tiam kredeble pli facile lerni konkurencan planlingvon …

Mala situacio prezentas sin, se oni aplikas metodan transformon al la dua kategorio de lingveroj. Tiuj ja estas tiel malmultaj ke oni kapablas ilin rapide ekregi sur la bazo de jama scio pri Esperanto klasika. Krome, tiu kategorio havas la avantaĝon konstante kaj ofte reaperi, memstare aŭ en ligo kun la unua kategorio de vorteroj.

Sekve eblas en principo, per la dua kategorio, atingi pli-malpli apartigon disde la tradicia lingvo, malgraŭe restante intime al ĝi ligita. Estas kvazaŭ oni kuŝigus la brikaron de la klasika lingvokonstruo en novan, alikoloran morteron. La konstruaĵo restas en sia korpo kaj sia trabaro, en sia vortotrezoro kaj sia gramatiko, identa kaj tamen supraĵe, laŭ aspekto, diferenca.

La traduko de nacia dialekto al Popido tiele ne tro deflankiĝas de la klasika Esperanto kaj restas simila al ĝi kaj facile rekonebla. Vero, pri tiu "ne tro" oni povas diskuti; ĝi estas sufiĉe arbitra afero. La kriterion, kiun mi klopodi obei, estis atingi egalpezon inter la postuloj de sufiĉo kaj neceso. Pli prezice: inter (a) sufiĉe deflankiĝa, por ke oni tuj ekkonu ĝian apartecon, eĉ en mallonga frazo aŭ kelkvorta esprimo; (b) ne pli ol necese por ke oni ankoraŭ bone distingu la parencecon kaj komprenu / lernu la novan formon

sen granda fortostreĉo. Fakte, estas ĝi la sama kriterio kiun mi obeis, en alia kunteksto, por Arkaika Esperanto kaj por Gavaro.

Do, je la flanko de aktiva Popido-uzado, sufiĉus ke skribanto aŭ parolanto sciu la sufiĉe etnombrajn modifantajn regulojn kaj vortetojn, dum je la flanko de pasiva uzado sufiĉus ke leganto aŭ aŭskultanto povu diveni ilin. Kompreneble, mi emfazas ke tiuj ĉi principoj antaŭsupozas ke, tiel pasivuloj kiel aktivuloj, jam komplete kaj flue regu la fundamentan lingvon oficialan ! Alidire: nur spertaj espistoj kapablos taŭge kompreni kaj uzi tiun metodon. Ĝi do certe celas nek lernantojn nek la (eternajn) komencantojn ! Situacio kaj kondiĉo tute sama kiel ĉe apliko de Arkaika Esperanto aŭ de Gavaro. Kaj fine: ĉiu nova sociolekto* same kiel ĉiu nova lingvo devas esti lernata antaŭ ol oni ĝin kapablas utiligi parole kaj skribe. Tiuj kiuj ne havas intereson, detenu sin; tiuj kiuj jes havas intereson, faru al si la penon lerni.

[Por ne montri sin malĝentila, Simplicius akceptas iom trafoliumi la manuskripton. Post kelka tempo kaj multe da malŝataj “hm, hm”, li relevas la kapon.]

Simplicius : Ta ta ta, eĉ se via projekto el “teknika” vidpunkto ŝanĝas nur la kruston de Esperanto, mi persone trovas ĝian aspekton tiel timiga ke ĝi pensigas min pri Ido kaj ĝia fifama skismo ! Multaj samideanoj ricevos certe la saman impreson !

Salviati : Kompreneble, se oni ne havas ideon pri ĝia apogbazo, kaj lasas sin gvidi nure de la ekstera impreso, aŭ de impreso tute kurte, tiam rezultas ŝoko kvazaŭ la “nova lingvo” estus minaco por kaj atenco kontraŭ nia sanktege sankta Fundamento; kio ĝi nepre ne estas, nek volas esti. Ŝoko kaj ektimo enfunde, ĉar oni ekvidas sin refari la tutan grandan fortostreĉon kiun oni dediĉis al akirado de mastreco super klasika Esperanto. Sed, kiel mi jam eksplikis, tute ne estas tiel. Vi bonvolu fari al vi la penon silent-

igi vian impetan senton subjektivan, kaj anstataŭe laborigi nur vian sobran racion objektivan. Tiam vi malkovros, tra la "timiga" volvaĵa tavolo, ke estis multe da bruo pro nenio. Tion demonstras la sperto rilate Arkaikan Esperanton, kiun mi prezentis al vi antaŭe. Dum iuj kritikintoj en via sekvo, aŭskultante nur al siaj temperamento kaj subjektiva timo, arde kaj apriore etikedis ĉi tiun projekton volapukaĵo, iuj aliaj samideanoj, post serioza trastudo de la koncerna verko, kaj sen esti kondiĉigitaj de la Idoskizma traŭmo, jam kapablis kaj ŝatis skribi per ĝi leteron al mi, la aŭtoro ! Por vere esti volapukaĵo, Popido devus esti modifinta la unuan kategorion de lingveroj, inkluzive de la gramatiko. La manpleno da novaj anstataŭaj reguloj gramatikaj — forigo de la akuzativa *–n*, pluralo per *–s,* kaj similaj — ja ne kapablas klasifi ĝin tiel. Estas do fine afero pri juĝo kaj antaŭjuĝo.

<u>Simplicius</u> : Ĉu ne ekzistus alia rimedo, pli simpla, por atingi la de vi serĉatan efikon ? Mi pensas precipe pri kripligetoj kia plilongigo de la vokaloj, kiun vi jam menciis. La impreso, kiun la de vi menciita teksto de Baghy havigas, estas por mi jam tute taŭga kaj sufiĉa.

<u>Salviati</u> : Estas ankaŭ la ekzemplo de BAILEY kiu samprincipe paroligis ebrian viron. Sed mi eksplikis al vi ke tiaj artifikoj, se ili sufiĉas pro distingi inter varioj de sociolektoj, aŭ por havigi akcenton al fremdulo, pro tio ne konsistigas realan apartan dialekton. Dialekto en natura lingvo ja diferencas, krom per apartaj vortoj kaj esprimoj (kiujn ni ne povas al ni permesi en tiu ĉi rilato), ankaŭ per pli malpli devia gramatiko. Alidire, la distanco estus ne sufiĉe granda. Vi havus, kion mi komparis al nuanco de koloro, sed ne bazkoloron mem.

Je la alia ekstremo estus en principo reformaj projektoj de Esperanto, kiaj la misfamega Ido de DE BEAUFRONT, la Malfalsito de ROUSSEL, la Moderna

Esperanto de LOHOGO, la Esperantuisho de pastro ŽELEZNÝ, la… la… Verdire, en la komenco de miaj esploroj je planlingva dialekto, multe allogis min la eleganta Neo de ALFANDARI, kies ĉefaj trajtoj estas koncizeco kaj belsoneco. En naturlingvaj dialektoj ni ja tiel ofte renkontas mallongigojn de vortoj kaj esprimoj — per forigo de vokalo, konsonanto, gramatikaĵo — ke koncizeco estas eble ilia plej tipa eco. Mi do volis nepre adopti tiun faceton kaj finfine ankaŭ faris tiel.

Sed la menciitaj provoj pri reformo ĉiuj (se mi ne eraras) pekas kontraŭ la ankoraŭ pli grava principo lasi la ĝeneralan radikaron netuŝita. Ili ĉiuj tiel faras la saman penseraron, kiu igas ilin malfacile lerneblaj. Sekve, se mia propono malplaĉas al vi pro sia stranga aspekto, tiuj aliaj ankoraŭ pli devus elvoki vian abomenon. Kaj nun prave, ĉar ili ja atakas la karnon kaj skeleton, dum mi nur gratas la haŭton.

Simplicius : Mi tamen ne estas konvinkita, knabo, ĉar estas detaloj en via projekto, kiuj miaopinie estas idoj de la sama reformemo. Ekzemple tiuj *–it, -at, -ot,* anstataŭ klasikaj *–is, -as, -os.* Ili ege incitas ! Antaŭ ĉio: vi enkondukas novan vokalon sentonan anstataŭ nia *–o* ! Kulmino de herezo !

Salviati : Tiu ĉi mia projekto estas rezulto de almenaŭ duondozena da revizioj kaj dekomencaj reverkoj, ĝis kiam la metodo, laŭ gusto de mi, ĝia aŭtoro, funkciis glate kaj ĉionamplekse, sen pro tio tro apartiĝi de la norma lingvo. Tamen, kaj nature, tio ne signifas ke ĉiu ajn detalo estas premia celtrafo. Tion montru la estonteco; en la espero ke iam nia Akademio, aŭ iu speciala lingvokomitato, estos akceptinta definitivan version por solvi la problemeton pri dialekt-redono. Ĉar evidente: ankaŭ tia ĉi projekto iam bezonos la sigelon de "netuŝebleco", por eviti ke ĝi disfalu en multajn aliajn proponojn rivalajn, plume de amatoraj aventuristoj. Des pli, ĉar regas en tio ĉies persona

plaĉo. Ĝis tiam mi volonte aŭskultos al konstruemaj kritikoj kaj sugestoj por eventuale plibonigi la metodon.


Simplicius : Prave vi diras, ke regas en tio ĉies persona plaĉo. Nu ĝuste tial via dialekt-propono, apuda la zamenhofa lingvo, kune kun via pralingva projekto kaj ceteraj viaj araneaĵoj, konsistigas grandan danĝeron por la kohereco kaj unueco de nia Fundamento. Vi ree malfermas la sangan Ido-vundon, kiu prezo estas tro alta. Prefere rezignu aŭ plu ne nomu vin "samideano".

Salviati : Ŝajne vi ne aŭdis kion mi diris. Popido estas nur travestio de la tradicia Esperanto. Precize tiu propreco garantias ke nur vere spertaj Esperantistoj kapablos se bezone utiligi ĝin. Kiu do provos aŭ povos lerni kroman lingvoteknikon antaŭ ol esti mastrinta la centran, bazan lingvostrukturon ? Kaj kiu samideano estos tiel freneza proponi dialektan Esperanton en loko de koinea Esperanto ? Volu tamen kompreni, ke nek Arkaika Esperanto, nek Gavaro, nek Popido, celas ansta-taŭi la lingvon de Zamenhof, sed nur suplementi ĝin, nepre opone al la strebo de Ido.
Se miaj lingvoproponoj lanĉas atakon kontraŭ breĉoj kaj malfortoj en la fortreso de Esperanto, estas por tiujn ripari kaj ordigi, ne por detrui la kastelon. Estas por prepari nian planlingvan komunikilon por la profunda, senkompata kaj rigora eksameno kiun ĝi iam devos suferi ĉe la tiel sopirata tutmonda oficialigo. Ĝi ja devos el nepre ĉiuj anguloj esti kapabla konkurenci kun naturlingvoj. Popido sekve volas esti aliancano kompletiga, ne rivalo aŭ eĉ malamiko kiel pensas vi. Ĝi aliras vin kun levita viziero, malkaŝe, honeste kaj tamen vi timas perfidon. Ĉu do la insidema poguta enpenetro de tiel nomataj "neologismoj" kaj de ceteraj scienoteknikaj terminoj sensistemaj, kiuj senbrue sapeas la Fundamenton, malrapide venenante nian verdan sangon, ĉu do tiu daŭra kaŝ-

atako de nacilingvaj influoj ne estas multe pli danĝera kaj timinda ? Tamen tiujn, kiel formikoj svarmantajn malamikojn, sen organizo, sen plano, vi akceptas kaj adoptas preskaŭ sen protesto, kaj sen konscii pri iliaj kontraŭzamenhofaj naturo kaj taktiko ! Sed mi legas en via vizaĝo ke mi predikadas en la dezerto; vi ja nepre obstinos en tradicia sinteno. Por vi la partio estas multe pli grava ol la doktrino. La plej grandaj blinduloj estas tiuj kiuj ne volas vidi, diras la Biblio. Pardonu al mi la citaĵon, ĉar tiu kiu havas pulojn, tiu sin gratu ...

Simplicius : Ĉu vi insultas min !? Jen la kulmino ! Nu, aŭskultu, filistro vi; spite viajn fiargumentojn, mi volas resti fidela Esperantisto kaj ne toleros viajn lingvonormigajn atakojn kontraŭ nia kara lingvo, kiu jam tra multaj jardekoj pruvadis sian taŭgecon, por ĉiuj aspektoj de la homa kulturo ! Tiajn kia vi, ni bezonas kiel skabion ! Adiaŭ !!

[Salviati levas la brakojn en muta senespera gesto ...]



Ni interbatalit kwaze leons ed ursês. [#12]

METODO

Apartaj gramatikaĵoj

1. La <u>alfabeto</u> restas identa al tiu de klasika Esperanto, escepte de **w** por **ŭ** kaj aldona **ê** kiu reprezentas la neŭtran vokalon (ŝŭa), rolanta por ebligi pli facilan prononcon de sinsekvaj konsonantoj. Por kombinaĵoj kaj prononcado vidu "Ĝeneralaĵoj".

   La longeco de tiuj cilindroj = *lo longec de tus cilindrês*

2. <u>Substantivoj</u> sisteme perdas sian <u>primaran sufikson</u>, escepte por eviti homonimecon, en kiu kazo ekrolas la ŝŭao *–ê*; kaj tiam eĉ nur en la sama kunteksto.

Li iris al la kelo	=	*li irit al lo kel*
Estis kiel en la kelo	=	*sit kel en lo kelê*

\+ Ankaŭ permesite <u>en poezio</u>.

   Ĉu rim li verku o rakontê ?
   Mo ŝon nej gravat formkonfrontê

3. <u>Pluralo</u> de artikolo, pronomo, korelativo, adjektivo, kaj substantivo, okazas ĉiam per *–s*.

la brilaj roboj	=	*lo**s** brila**s** robê**s***
ĉiuj tabloj	=	*sju**s** tablê**s***
la stultaj virinoj	=	*lo**s** stulta**s** virin**s***

4. <u>Personaj Pronomoj</u>

mi	ci	li	ŝi	ĝi	oni	ni	vi	zi	si
ma	ca	la	ŝa	ĝa	ona	na	va	za	sa
mas	cas	las	ŝas	ĝas	onas	nas	vas	zas	sas

mi ed ŝa frat *li kun sa edzin* *admiru za labor !*
ni babilit pri nas afers *sot ŝi kun sas patr ed patrin*

5. <u>Verbotempoj</u> : *-aj -it -at -ot -ut -u*

se ni nur sciut ! — *parolu, mi awskultat*
perlaboraj sa viv — *hiam zi pagot pro to !*
manĝu ed silentu ! — *li ankore dormit, kam ŝi enirit*

6. Oni apliku ĉi sekvajn <u>kurtigitajn formojn</u> de la verboj *<u>esti</u>* kaj *<u>havi</u>*, sed ne de aliaj !

<u>esti</u> → *saj sit sat sot sut su*
<u>havi</u> → *vaj vit vat vot vut vu*

\+ En <u>kunmetitaĵoj</u> povas interŝoviĝi la neŭtra vokalo:

li malestis — *li malêsit*
ŝi surhavas — *ŝi surêvat*

7. <u>Participoj aktivaj</u> : *-ind -and -ond*
<u>Participoj pasivaj</u> : *-id -ad -od*

lo perand salutit los delegids
lo kron de l'venkinds sat ankore plektoda

8. <u>Korelativoj</u>

hi-	hiu	hio	hia	hie	hiel	hial	hiam	hiom
t-	tu	to	ta	te	tel	tal	tam	tom
k-	ku	ko	ka	ke	kel	kal	kam	kom
sj-	sju	sjo	sja	sje	sjel	sjal	sjam	sjom
alj-	alju	aljo	alja	alje	aljel	aljal	aljam	aljom
ni-	niu	nio	nia	nie	niel	nial	niam	niom

en sju okaz — *ta stranga bird*
ka patrê ta fil — *kal zi nej legat to ?*
kus vars vendat-ci ? — *tel as plu nio restit*
prenu tom kiom ci volat — *al hiu mi dirot lo ver*
nej faru al alju ko ci nej volat as farîĵu al ci

en ĉiu okazo - tia stranga birdo - kia patro tia filo
kial ili ne legas tion ? - kiujn varojn vi vendas ?
tiel ke plu nenio restis - prenu tiom kiom vi volas
al iu mi diros la veron
ne faru al aliu kion vi ne volas ke fariĝu al vi

9. Numeraloj

won	*diks*	*ĉend*	*milje*	*miljun*
1	10	100	1000	1000000

10. Specialaj sufiksoj

-ad	*-adz*
-id	*-idj*
-iĝ	*-iĵ*
-ind	*-indz*
-oĉj	*-oĉ*

Petroĉ devit pruviĵaj indza servadzaj lo reĝidja idol

11. Ĉiuj vortoj finiĝantaj per *–aŭ* ricevas anstataŭe adverban *–e.*

antaŭ	=	*ante*
antaŭe	=	*antee*
baldaŭ	=	*balde*
kvazaŭ	=	*kwaze*
ankoraŭ	=	*ankore*
anstataŭ	=	*anstate*

\+ Sed aŭ = *o.*



Poet, li sat kwaze ĉasist,
ku arde aventurs postkurat # 18.

Ĝeneralaĵoj

1. Iugrada apliko de <u>Universala Skribo</u> en la ortografio, sed nur kiom koncernas la internon de radikoj mem. Kunligaj prononcfenomenoj ne efiku je la skribmaniero.

KZ	fariĝas	*GZ*	:	*egzamen, egzistat*
KV	fariĝas	*KW*	:	*kwartal, kwaze*
BS	fariĝas	*PS*	:	*apsolute*
Ů	fariĝas	*W*	:	*lawte, fewda*

\+ Sed: klaboj = *klabs,* ĉar plurala *–s* estas gramatikaĵo, kvankam prononce egala al |klaps|.

2. Ne estas rigora dekreto rilate <u>prononcajn malfacilaĵojn</u> kaŭzataj de la metoda eliziado. Ĉiu solvu ilin law siaj nacilingvaj kapabloj, kvankam la dua modelo estas preferinda.

duobl	=	*duobêl*	aŭ	*duoblê*
patr	=	*patêr*	aŭ	*patrê*
pantofls	=	*pantofêls*	aŭ	*pantoflês*

3. La <u>emfazo</u> troviĝas sur la sama radiksilabo kiel kutime, senkonsidere ĉu la primara vokalsufikso malaperis aŭ ne.

*Lo longe forest**<u>i</u>**nda vojaĝ**<u>a</u>**nd rev**<u>e</u>**nit.*

4. <u>Akuzativa ***–n***</u> estas uzata nur esceptokaze, por forigi ĝenan miskomprenon; kompareble al emfazado de vorto aŭ frazo, precipe en poemoj. Tiukaze ĝi ligiĝas senpere al la koncerna radiko kaj ankaŭ <u>antaŭ</u>iras la pluralan finaĵon ***–s***.

ĉapelon = *ĉapel*; esceptokaze *ĉapelên*
musojn = *musês*; esceptokaze *musêns*
lin = *li;* esceptokaze *lin*
ĝin = *ĝi* ; esceptokaze *ĝin*
sin = *si*; esceptokaze *sin*

\+ Oni do ne uzu ĝin en izolita frazparto:

Pest ! *Saluts !* *Kora dank !*

\+ Tio bedaŭrinde necesigas pli rigoran vortordon: subjekto-verbo-objekto.

mi savit lo infan ≠ *lo infan mi savit*

5. Kleraj terminoj, precipe de greklatina origino, tradukiĝu prefere per kutimlingvaj egalvaloraĵoj.

vivosciencist anstataŭ *biolog*
stelopservist anstataŭ *astronom*
forskribil anstataŭ *telegrafo / telekso*

6. MAL-vortojn oni evitu favore al ne kunmetitaj neologismoj aŭ similaj.

eta anstataŭ *malgranda*
povra anstataŭ *malriĉa*
pigrul anstataŭ *mallaboremul*

7. ĈU aperas malpli ofte ol en la klasika lingvo. Kutime oni preferu verbo+pronomo kunligitaj per streketo.

vere ? prefere al *ĉu vere ?*
sciat-li ? prefere al *ĉu li sciat ?*

8. Kunligado de radikoj okazas senpere, helpe de streketo, aŭ helpe de la neŭtra vokalo.

kontreflue *pelt-jak* *samtona* *aljamaniere* *tablêrond*


9. Propraj Nomoj ĝenerale ne dekliniĝas aŭ deriviĝas, escepte se temas pri puraj Esperanto-nomoj.

kaptu tu Sidoni ! sed *lo pariza mod* (ekde Parizo)
lo Eiffel-tur sed *lo vatikana palac* (ekde Vatikano)

KRESTOMATIO

Mi elektis la sekvajn demonstrajn tekst-fragmentojn el lingvoj por mi alireblaj en Interreto, sed evidentas ke Popido estas aplikebla al la tuta vasta aro da dialektoj tra la tuta mondo.

Nemarkitaj ilustraĵoj estas kutime prenitaj el pentraĵoj de Pieter Breughel patro aw filo.



01. **Viktimoj**

Unu el la monumentoj de nia Esperantoliteraturo estas **Julio BAGHY** [Baghy Gyula] (1891-1967), hungara aktoro, poeto, kaj romanverkisto. La unua mondmilito interrompis lian promesplenan karieron en la teatro, tial ke li iĝis militkaptito de cara Rusio kaj estis ekzilita al fora siberia koncentrejo proksime de la ĉina landlimo. La teruraĵojn kaj bestecon, apud heroecon kaj helpemon, kiujn li tie spertis dum ses jaroj, li teksis en du libroj: Viktimoj (1926) kaj Sur Sanga Tero (1933), ĉirkaŭ la ĉefrolanto Johano Bardy. Ne mirigas ke li jam junaĝe iĝis Esperantisto, ĉar lia idealisma koro estis plenega je homamo, laŭ lia vivokoncepto: "Amo kreas pacon, paco konservas homecon, homeco estas plej alta idealismo." Tiu idealo kuras kiel ruĝa fadeno tra ĉiuj liaj verkaĵoj.



En la koncentrejo li sukcesis establi amatoran teatron por iom distri kaj kuraĝigi la plurnaciajn kaptitojn. En la ĉi posta fragmento el Viktimoj, en kiu ankaŭ rolas nobelino, li provas redoni la (dialektan) parolmanieron de kampara knabo.

Specimeno de la originalo

- Nu, Joĉjo, kio nova ?
- *Nenea naova, senjaoro !* – respondis la knabo, serĉante alumeton en ĉiu poŝo de sia bluzo. – *Me forgeesis faojrigelon !*
- Jen alumeto ! – diris Johano kaj donis al li la sian.
- *Onideeras, ke naovaj meletkaoptetoj alveenis.*

Kamparana Honesteco

La hejtisto estis simpla kamparano, dika, plenvanga, forta junulo. Li parolis kun terura dialekto, ke oni apenaŭ povis kompreni lin. Li ekkaŭris antaŭ la forno, tre malrapide, kvazaŭ li konstruus dometon por infanoj, metis ligneton post ligneto en la fajrujon.

Por rompi la pezan silenton Johano alparolis lin.

- Nu, Joĉjo, kio nova ?

- *Nio nova, Sir !* respondis la knabo, serĉante alumeton en ĉiu poŝo de sia bluzo, - *Mi forgesit fajrigil !*

- Jen alumetojn ! diris Johano kaj donis al li la siajn.

- Oni dirat as novas militkaptids alvenit.

- Kiam ?

- Ĵus mi awdit to de ma amik. Zi sot en los baraks apud lo teatrê.

- Aha ! Mi scias. Venante al la teatro mi vidis kelkajn barakojn, kiuj kun malfermitaj pordoj atendas novevenintojn.

- Onidirat, as ante du o tri monats los rusês kaptit zi.

- Verŝajne ni trovos inter ili samnacianojn.

- *Uhumm !* – Li esprimis la saman opinion, kaj plenpulme komencis blovi la fajron. – *As lo Jesus Krist cindrigu tu lignê ! Ĝi sat ja humida kel ma kalson post lavadz !* – blasfemis la knabo.

La virino flustre demandis Johanon: Ĉu li scias ruse ?

- Ne, sed mi povas demandi lin.

- Joĉjo, ĉu vi parolas ruse ?

- Nej muĉe… As lo Ponti Pilat ekstermu tu arbar en ku oni hakit tu ĉi lignê ! Ĝi nej volat ekbrulaj… Mi komprenat nej muĉe ruse.

Johano sin turnis al la virino kaj interpretis.

- Ĉu li estas kamparano ?

- Jes !

- Demandu la knabon ĉu li amas rusajn knabinojn.

Johano ridetante plenumis la strangan deziron.

- Joĉjo, la sinjorina moŝto demandas vin ĉu vi amas la rusajn virinojn ?

- Nur law moder.

- Nur modere – interpretis Johano.

- Demandu lin, ĉu mi plaĉas al li? – kaj ŝi kokete ridetis al la knabo.

- La sinjorino demandas vin, Joĉjo, ĉu ŝi plaĉas al vi ?

La knabo por momento rigardis al la ridanta vizaĝo de la virino, klakis per la lango kaj gratante la orelon li respondis:

- Delikata person, mo nej por mi... Ŝa naz similat al lo naz de ma fianĉin en Transsilvanuj... Toĥ ŝi sat pli bela, mi pensat. Per los mans de l'Dama Moŝt nej saj eble melkaj los bovins, nek knedaj lo sjutaga pan.

Li ĉesis paroli kaj denove, kun plena fervoro, blovis la fajron. Johano ridetante interpretis la opinion de la bona knabo.

= = = = = = =

- Mi dankas vian sincerecon – diris ŝi, prezentante monbileton.

- Ko ŝi volat? demandis la knabo.

- La sinjorina moŝto dankas la komplimenton – klarigis Johano.

- Volonte mi farit ! – certigis kapjese la knabo, kaj la monon zorge metinte en sian notlibron, li daŭrigis la

fajrofaradon. - *As lo Sankta Virgulin kompatu ŝon tu ĉi fajrê !*

La knabo fine sukcesis. La fajro brue ekzumis en la forno. Li metis ankoraŭ kelkajn lignojn por vigligi la flamojn, kaj estis forironta. Li haltis antaŭ la muta paro, kvazaŭ por diri ion. Johano rimarkis tion.

- Kion vi volas, Joĉjo?

- Mi nur volat diraj al lo dama moŝt, as nej sat ta rusa knabin pro ku mi forgesut ma fianĉin en lo hejmland, Rusa virin por rusa vir, hungara virin por hungara vir.

La knabo forlasis la ĉambron.



Hungara virin por hungara vir.

02. **Maja, la fiŝkaptista edzino**

Anni Blomqvist (1909-1990), estis svedlingva roman-verkistino, vivinta sur la finnlandaj Aland-insuloj. En la tiea patriarkia socio de fiŝistoj ŝi spertis malfacilan kaj malmildan sorton en la junaĝo kaj post edziniĝo perdis ankoraŭ sian edzon kaj siajn kvar infanojn. Tiujn spertojn ŝi scipovis realisme rekonstrui en pluraj verkoj. Plej konata estas serio de kvin libroj pri Maja, la edzino de fiŝkaptisto. Ŝi iĝis modelo por aliaj meminstruaj aŭtoroj.



Specimeno de la sveda originalo

Vävstolen är ute på momangen och Maja blir kommendarad till att göra upp eld på hällen.
- Vi måst skur golve, så jag kan skär till seglena, säger han upplysande när hon står och undrar vad han menar.
- Kann du klipp segel själv då ? Skära menar jag.

Taksante velŝtofon

"Ci sit bona," Janne gaje diras, kiam li envenas kaj antaŭeniras al la tablo, kie kuŝas la teksaĵo. *"Mi vere devat diraj as ci teksit densa ed forta tuk tra ku lo vent nej povat blovaj."* Per siaj fingroj li pritaksas la pecon de la teksaĵo kiun li disvolvis. La teksilo tuj estas formetita kaj Maja ricevas ordonon estigi fajron en la forno.

"Ni devat frotlavaj lo plank, tel ke mi povu trancaj los vels," li klarigas, kiam ŝi mirdemandas kion li celas. *"Povat ci mem tondaj los vels ? Trancaj mi opiniat."* – *"Mi pensat as mi povot, same bone kel Mickel en Vestergard,"* Janne respondas per voĉo kiu larmigas la okulojn de Maja. *"Patêr nej povot faraj to,"* ŝi diras. *"Mo li vat aljas kus povat faraj to por li."* – *"Da, li ne kapablat, ca patêr"* respondas Janne, demetante la teksaĵtrabon kaj proksimiĝante al ŝi. *"Espereble, ci ne*

malŝatot to," li tiam diras kaj karesas ŝian hararon per mano samtempe granda kaj malpeza kaj plena je la intenco forviŝi kion li ĵus diris kaj kio dolorigis ŝin.

"Mi iĵat kel fajrê, sjufoje kam ci pensat as mi nej kapablat, kwanke mi mem bone sciat as mi devat kapablaj." Maja apogas sian kapon al lia brusto kaj silente ploras. Tamen, ŝi absolute ne volas plori. Certe ne nun kiam Janne volonte volas ĉion rebonigi. *"Su nun brava,"* li diras kaj viŝas per sia ĉapo la larmojn for de ŝiaj vangoj. *"Kam los vels sot pretas, ci belvestu ci ed ni veliru al Vigskar, tel ke lo vent kantot ed sur ŝip ed en vels."* La eltrovemo de Janne kaj lia deziro pardoni ĝojigas ŝian koron, sed tamen larmoj plu fluas tiel, ke ŝi apenaŭ vidas kion ŝi faras.

Janne elrulas la teksaĵon sur la purfrotita planko. Li rampas surgenue kaj mezuras; li kalkulas kaj markas. Sen ion diri, Maja devas al si mem konfesi, ke li estas lerta kaj praktikema kaj rapide faras sian laboron. Mem ŝi devas pripensi kaj plani tiel longe, ke ŝi laciĝas antaŭ ol povi efektive eklabori. Ŝi imagas al si ke diversspecaj taskoj devas esti plenumitaj en fiksita tempo, kiam la luno estas nova aŭ malkresk-anta, kiel malnovaj tradicioj postulas. Ŝi ne ŝatas deflankiĝojn, ne volas esti alinatura. Eble ankaŭ Janne foje pensadas kaj planadas; tamen ŝajnas ke li tuje komencas per siaj laboroj. Nun ŝi ne kuraĝas lin demandi pri io ajn, eĉ se ŝi volonte farus. Sen paroloj ŝi scias, ke ŝi devas esti samtempe proksima kaj distanca, kiam li estas okupita per grava laboro kaj neniu laboro povas esti pli grava ol produkti ŝipvelojn.

"Pensat-ci as tus ĉi vels iĵot tawgas ?"

"Demandat-ci al mi ?" li respondas surprizite.

"Al ku alja mi demandut ?"

Nun lia voĉo estas ordinara, kaj ŝi lin petas pri konsiloj, kvankam li devus scii kiel senkonsila ŝi

estas. *“Mi pensat as zi devat ĳaj bonas telmaniere,”* li diras kaj klinas la kapon kiel li kutimas fari kiam li sentas sin iom malcerta. Kutime estas tiel, kiam li demandas ŝin pri konsilo, eble eĉ sen deziro je respondo. Aŭ okaze estas tiel, ke li tamen opinias ke pri io ŝi scias pli bone. Tiam ŝi pensas kaj kuraĝe alpaŝas kaj siavice demandas ĉu tie ne estas tro multe kaj en tiu rando tro malmulte.

Singarde ŝi diras: *“Por saj tute certa ci eble devut iraj al Fredrik ed petaj help pri lo tranĉadz ?”* Sed li trankvile respondas: *“To postulut ankore unu tag o pli. Kam ci teksit lo ŝtof, mi pensit as mi sut sufiĉe lerta por faraj anke lo rest.”* Maja sentas, ke ŝi sin savis sen granda morala damaĝo.



“Pensat-ci as tus ĉi vels ĳot tawgas ?

03. **La Hurloventa Altejo**

Wuthering Heights, la ununura romano de la poetino **Emily Brontë** (1818-1848) akiris al ŝi elstaran lokon en la angla literaturo klasika. Komence tamen ne estis tiel, ĉar la kruda pentrado de kruelaĵoj psikaj kaj korpaj, same kiel la nekutimaj stilo kaj strukturo, ne estis bonvenaj en ŝia strikta kaj pruda epoko viktoriana.



La tragedia verko estas ege kompleksa kaj zigzaga pro la multaj rolantoj, pluraj generacioj, kaj la interrilatoj inter du najbaraj bienoj. Sekve ĝi estas ankaŭ malfacile resumebla, apud malfacile tradukebla. Centra temo estas la granda sed malfeliĉa amo inter delasita knabo, Heathcliff, kaj la filineto Catherine de bonkora bienulo, kiu lin adoptas. Kiam plenaĝaj, pro miskompreno, Heathcliff kuras for, kredante ke Catherine lin malestimas kaj intencas edziniĝi al la najbara rivalo. Kredante plu neniam revidi sian amegaton, Catherine fine konsentas iĝi la edzino de la afabla kaj riĉa rivalo. Tamen, la perdo kaj sopirado estas kaŭzo ke ŝia sanstato fariĝas malforta.
Post monatoj Heathcliff revenas, sed nun riĉega, kun la firma intenco venĝi sin je ĉiu kaj ĉio kiuj malhelpis lin ligiĝi kun sia amegata ino. Per ruzaĵoj li akiras la manon de la heredantino de la apuda bieno kaj tiele ekestras super ambaŭ domegoj.
Komence Catherine ege ĝojas revidante sian favoraton, sed post akra disputo kaj reciprokaj kulpigoj, ŝi kolapsas pro koratako. Kelkajn horojn antaŭ ŝia morto, ili du tamen repaciĝas, konfesante sian nemorteblan amon.
Ek de tiu momento Heathcliff fariĝas ekstrema mornulo kaj mizantropo, vivanta nur por povi iel ajn reunuiĝi kun sia amatino en la spirita mondo, se ne eble en la materia mondo.

Tra komplikitaj intrigoj ĉirkaŭ la infanoj el ambaŭ familioj, li iumomente suferas mensan kolapson, post kio li efektive komencas vidi aperaĵojn de sia Catherine; li malĵuras sian venĝemon kaj mem mortas en la konvinko ke lia granda amo finfine realiĝis.
En la postaj fragmentoj, elektitaj pro la enestantaj dia-lektaĵoj el la brita marĉoplena provinco Yorkshire, iu Sinjoro Lockwood alvenas al la najbara domego, kiun li volas lupreni de Heathcliff, kiu normale vivas en la bieno de "Hurloventa Altejo".

Specimeno de la brita originalo

So resolved, I grasped the latch and shook it vehemently. Vinegarfaced Joseph projected his head from a round window of the barn.
- *Whet are ye for?* he shouted. *T'maister's dahn i't'fowld. Goa rahned by th'end ut' laith, if yah went tuh spake tull him !*
- Is there nobody inside to open the door? – I hallooed, responsively.
- *There's nobbut t' missis; and shoo'll not oppen 't an ye mak' yer flaysome dins till neeght !*
- Why? Cannot you tell her who I am, eh, Joseph ?
- *Nor-ne me, I'll hae no hend wi't,* muttered the head, vanishing.

Malafabla Akcepto

[Sinjoro Lockwood jam unu fojon vizitis la Hurloventan Altejon, sed la intertraktoj ne plene sukcesis. Nun, en plena vintro li reiras tien esperante konkludi la aferon, sed dumvoje estiĝas terura neĝoblovado.]

Sur tiu senŝirma monteta pinto la grundo estis mal-mola pro intensa frosto, kaj la aero igis min tremeti en ĉiu membro. Ne povante forigi la ĉenon [de la ĝardenpordo] mi saltis transen kaj, kurante supren laŭlonge de la pavimita digvojo flankigita per barakt-antaj grosaj arbustoj, vane frapegis por enlaso, ĝis miaj fingrartikoj doloretis kaj la hundoj ekbojis.

“Damnitaj enloĝantoj !” mi elsputis enpense, “vi meritas poreternan izoligon disde la homspecio, pro via spitema malgastamo. Mi almenaŭ ne tenus miajn pordojn ŝlositaj dumtage. Hu – mi tamen eniĝos !” Tiel decidinte, mi ekkaptis la klinkon kaj impete skuadis ĝin. La vinagrovizaĝa Joseph [domservisto] trudis sian kapon el ronda fenestro de la grenejo.

- *“Ko ci volat?”* li kriis. *“Lo mastrê sat sube en lo gregej. Iru preter lo grenej fine de l’turnil, se ci dezirat al li parolaj !”*

- “Ĉu estas neniu interne por malfermi la pordon?” mi eĥis responde.

- *“Estas niu escepte lo sirin ed ŝi nej malfermot, eĉ se ci dawrigut ca terura bru dum lo tuta nokt.”*

- “Kial ne? Ĉu vi do ne povas diri al ŝi ke estas mi, ĉu, Joseph ?”

- *“Niel mi ! Mi nej vat afers kun to,”* la kapo grumblis, malaperante.

La neĝo komencis dense trudiĝi. Mi ree kaptis la malfermilon por provi novan eksperimenton, kiam juna viro sen jako, kaj forkego surŝultre, aperis en la malantaŭa korto. Li gestis al mi sekvi lin tiel ke, paŝinte tra lavodomo kaj primitiva areo, sur kiu staris karboremizo, pumpilo, kaj kolombejo, ni fine atingis la grandegan, varman, kaj gajan loĝejon kie oni jam antaŭe akceptis min. Ĝi ruĝbrilis rave pro la radiado de fajro en grandega kameno, kies brulaĵo konsistis el karbo, torfo, kaj ligno; dum apud la tablo, preparita por abunda vespermanĝo, mi konjektis ekvidi la “sirin”, persono kies ekziston mi neniam antaŭe estus diven-inta. Mi riverencis kaj atendis, espektante* ke ŝi invitos min eksidi. Ŝi rigardis al mi, apogante sin kontraŭ foteldorso, sed restis senmova kaj muta.

\+ + + + + + +

La manĝada entrepreno estante finita, kaj neniu prononcinte eĉ unu parolon de socia konversacio, mi aliris unun el la fenestroj por kontroli la veterstaton. Estis aflikta bildo kiun mi vidis: profunda nokto antaŭtempe venonta kaj ĉielo kaj montetoj volvitaj en amara kirlaĵo el ventoblovoj kaj sufoka neĝo.

- “Mi pensas ke plu ne estos eble hejmeniri sen iu gvidanto,” mi ne povis malhelpi akre eldiri. “La vojoj estas jam surkovritaj kaj, eĉ se ili estus ankoraŭ distingeblaj, mi apenaŭ vidus ion je distanco de unu paŝo.”

- “Hareton, pelu tiun dozenon da ŝafoj en la portikon. Ili estos surneĝitaj se lasataj en la senŝirma gregejo dum la tuta nokto, kaj metu tabulon antaŭ ili,” diris Heathcliff.

- “Sed kion mi devas fari?” mi daŭrigis kun kreskanta incitiĝo.

Ne venis respondo al mia demando. Senhelpe rigardante ĉirkaŭen, mi vidis nur non* Joseph alportante sitelon kun avenkaĉo por la hundoj, kaj Sinjorinon Heathcliff, kiu klinis sin al la kameno, amuzante sin per brulado de fasko da alumedoj, kiuj defalis de sur la kamenbreto kiam ŝi remetis la tekruĉon en ĝia loko.

La unua kiu, post kiam li demetis sian ŝarĝon, inspekte ĉirkaŭrigardis en la ĉambro estis la maljunulo. Per kraka voĉo li elraspis: *“Mi mirat kel ci povat al si permesaj staradzaj te en kompleta niofar ed pigrec, dum urĝat lo farendaĵês ! Mo, ja, ci sat granda nul ed vanat al ci admonaj — niam ci ŝanĝot ca fikondut ed ci al lo diablê irot, kel ca patrin antawe!”*

Unu momenton mi pensis ke tiu akra peco de elokventeco estis adresita al mi, kaj mi jam ontis paŝi al la maljuna fripono kun intenco piedbati lin eksteren.

Sed Sinjorino Heathcliff haltigis min pro sia respondo:
- “Ci skandala olda hipokrito,” ŝi rebatis, “Ĉu ci do ne timas esti korpe forportata, kiam ci mencias la nomon de la diablo ? Mi avertas cin deteni de tiaj provokoj, aŭ mi petos cian forporton kiel specialan favoron ! Ja atentu, Joseph,” ŝi daŭrigis, prenante grandan grizan libron de sur la breto. “Mi montros al ci kiom mi jam progresis en la arto de Nigra Magio. Baldaŭ mi estos sufiĉe kompetenta por forbalai ĉiun oponon. La ruĝa bovino ne mortis hazarde, kaj cia reŭmatismo estas apenaŭ klasigebla kiel providenca vizito !”

- *“Aj, maliculin, maliculin !”* spasmis la oldulo, *“povu lo ĉiela Sinjor liberigaj ni de l’malbon !”*

- “Ne, ci bubaĉo, ci estas jam elĵetito — for, aŭ mi vere difektos cin ! Mi transformos cin al vakso kaj argilo ! La unua kiu kuraĝas transpaŝi la limon de mi starigitan, mi … ne, mi ne diros kion mi faros al tiu … sed oni vidos ! Iru, mi rigardas al ci !”

La eta sorĉistino metis imiton de maliceco en siaj belaj okuloj kaj Joseph, tremante pro hororsento, hastis eksteren, preĝante kaj grumblante *“maliculin !”*

\+ + + + + + +

- “Sekvas do ke mi estas devigata resti tie ĉi !”

- “Tion vi devas aranĝi kun via gastiganto. Ne estas mia afero,” ŝi diris.

- “Mi esperas, ke ĝi estos leciono al vi plu ne fari tiel riskajn vojaĝojn en tiuj ĉi montetoj,” kriis la voĉo de Heathcliff el la kuireja pordo. “Kiom koncernas gastigadon, mi ne havas loĝeblecon por vizitantoj: vi devos divido lokon kun Hareton aŭ Joseph, se vi restos.”

- “Mi povas dormi en seĝo de tiu ĉi ĉambro,” mi respondis.

- “Nenial ! Fremdulo estas fremdulo, egale ĉu riĉa aŭ malriĉa. Ne konvenas al mi permesi al iu ajn okupi la

lokon, dum mi ne havas tiun sub kontrolo !" diris la malĝentila fiulo.

Tiu insulto metis finon al mia pacienco. Mi prononcis esprimon de malŝato kaj koleris preter lin al la korto, koliziante kun Earnshaw en mia hasto. Estis tiel mallume ke mi ne kapablis distingi la elirejon kaj, dum mi ĉirkaŭvagis, mi spertis alian specimenon de ilia socia interkondutado. Unuainstance la juna viro ŝajnis ema al amikeco.

- "Mi akompanos lin ĝis la parko," li diris.

- "Ci iru al la infero kun li," vokis lia mastro, aŭ kiu ajn povis esti ilia interrilato. "Kaj kiu do zorgos pri la ĉevaloj, he ?!"

- "La vivo de homo havas pli da graveco ol ununokta malzorgo pri la ĉevaloj; iu tamen devas iri," subvoĉis Sinjorino Heathclif, pli afable ol mi espektis*.

- "Ne pro cia ordono !" rifutis Hareton, "Se ci celas protekti lin, prefere silentu !"

- "Tiam mi esperas, ke lia spirito cin noktovizitos; kaj mi esperas ankaŭ ke Mastro Heathcliff neniam trovos loĝanton ĝis la apuda biendomo estos falinta al ruino," ŝi akre rediris.

- *"Awdu, awdu, ŝi sat damnendza li,"* siblis Joseph kiun mi alstiris.

Li sidis je aŭdodistanco, melkante bovinojn ĉe lumo de lanterno, kiun mi senceremonie ekkaptis kaj, laŭte voĉante ke mi resendos ĝin en la mateno, hastis al la plej proksima drepordo.

- *"Mastrê, mastrê, li ŝtelat lo lanternê !"* kriis la maljunulo, min postkurante. *"Hej, Grincul, hej hund ! Hej Lup, ataku li, ataku !"*

Li ĵetis pordeton malferma kaj du vilaj monstroj saltis al mia gorĝo, min renversante kaj estingante la

lampon. La sekvaj ridaĉoj de Heathcliff kaj Hareton kronis mian koleron kaj humiliĝon. Feliĉe, la du bestoj ŝajnis havi plivole la intencon iom ludi ol manĝi min viva, tial ke ili oscedis kaj svingis la vostojn. Sed ili tamen ankaŭ ne permesis min ekstari tiel ke mi estis devigata resti kuŝanta ĝis plaĉis al iliaj fi-koraj mastroj liberigi min. Tiam, sen ĉapelo kaj trem-ante pro venĝemo, mi ordonis al la misfarantoj lasi min foriri — kaj ne riski deteni min unu minuton pli longe — senkohere vokante ke mi venĝos min, kun tia emonciego ke ĝi ŝajnis veni el tragedio de Shakespeare.



"Mi nej vat afers kun to,"
la kapo grumblis, malaperante.

04. **Hundobedo kaj Eta Bnezer**

Beletristoj tre ĝenerale konsideras ke bildrakontoj ne hejmas en ilia kasto, ke tiuj ne apartenas al literaturo. Tamen tiuj bildstrioj estas legataj, eĉ ĉiutage de multmilionaj homoj de ĉiuj aĝoj. Evidente, stilo kaj enhava kvalito de tiaj verkaĵoj ĝenerale ne estas konsidereblaj kiel altaj. Sed ĉu oni ne povas diri la saman pri "oficiala" literaturo ? Ĉiel ajn, taggazetoj kaj aliaj periodaĵoj volonte ilin aperigas en krompaĝoj, se nur pro la fakto ke iliaj legantoj kutimas eklegi tiujn antaŭ ol komenci per la serioza parto. Speciale aventuraj kaj krimtemaj bildrakontoj, se lerte faritaj, konsiderinde altigas la eldonkvanton de koncerna periodaĵo, pro tio ke la lasta bildo de serioparto kutimas lasi sia(j)n heroo(j)n en kritika aŭ danĝera situacio, aŭ sur la sojlo malkovri grandan sekreton. Tio igas legantojn scivoli pri la sekva daŭrigo.

Sufiĉe multaj tiaj bildrakontoj transiris la limojn de sia naskiĝlando, kaj aperas ankaŭ alilingve, ĉu kiel taggazetaj strioj, aŭ kiel kompletaj bildalbumoj. Tiel en Esperanto aperis kaj ankoraŭ aperos ekzemple Asterikso, Cisko kaj Vinjo, Tinĉjo, apud komprenEble propraj verkaĵoj verdaj.

Nu, nacilingvaj bildstrioj estas relative facile transformeblaj, se ili utiligas normalan aŭ preskaŭ normalan lingvaĵon. Alia afero estas, kiam la koncerna bildaro (abunde) aplikas unun el la specialaj sociolektoj: pralingvo, slango, dialekto. Tie la norma Esperanto, same kiel nacilingva koineo* fiaskas.

Por tio nun disponeblas mia "Sociolekta Triopo". En Arkaika Esperanto legeblas ekzemple el la nederlanda "La kurioza Alĥemiisto" en kiu kolizias aktuala lingvaĵo kun antikva lingvaĵo. En Gavaro estas "La milionula Adoptofilo" el franca argoto. Kaj tie ĉi poste

oni renkontos modelon de dialekta redono el la uson-angla. Sed ne ĝuste iu ordinara specimeno ! Por demonstri la aplikeblon de Popido, mi elektis ĉerpaĵon el bildrakonta serio, lingve tiel timiga, ke laŭ mia scio de ĝi ankoraŭ aperis en neniu alilingva transformo — aŭ ĉu malhelpas ekscese kostaj tradukrajtoj ?

Temas pri la satira striaro *L'il Abner,* kiun kvazaŭ ĉiu nordamerikano konas kaj ŝatas. Tiel sukcesega ĝi estis ke ĝi aperadis dum 34 jaroj seninterrompe, kaj estis/estas volonte legata de dekoj da milionoj, se ne centoj, de infanoj al pensiumitoj, de servistoj al parlamentanoj — ĝis la morto de ĝia produktema aŭtoro, pseŭdonime Al CAPP (1909-1979) (Ĉu en tiu nomo mi detektu intencan similigon al Al Capone, la fifamega iama gangstero ?) Ni do ne miru ke multaj el liaj ĵonglaĵoj eniris la norman lingvotezaŭron, forte kontribuante al ties slangiĝo, malgraŭ laŭtaj vekrioj de anglaj lingvistoj kaj beletristoj. Kio pli estas, la usona superrego en la mondo infektis multajn lingvojn per tiu sia dekadenca nerezistopovo. La 21-a jarcento havos multe da laboro por elsarki la lingvan fiherbaron kaj reakiri sian aplombon.

Signifoplena estas ke tiu striaro ankoraŭ nun meritas 24 paĝojn da komentoj en Vikipedio !

Sian grandan popularecon kaj influon la aŭtoro gajnis ne nur per laborigo de sia plumo, sed per ruza kaj majstra manipulado de la merkataj leviloj, tiel ke lia arto turnis al granda komerca entrepreno.



La desegnisto **Al CAPP** (1909-1979), vernome Alfred Gerald CAPLIN, estas de multaj usonanoj konsiderata kiel la plej granda bildstria artisto de ĉiuj tempoj. Je la aĝo de deknaŭ jaroj li perdis kruron en tramakcidento, kio kredeble puŝis lin al tia profesio.

Al CAPP estis ege inventema. Tiel inventema kaj spontanea, ke li ofte perdis la rumbon de iu historio. Li forgesis kio precize okazis aŭ estis dirita en iu antaŭa parteto, iu personaĵo diras aŭ faras la malon de tio kion ĝi estas supozata diri aŭ fari. Entute do mankas konsekvenceco en la serioj. Sed kiu zorgas ? Kion li eksterdube plej abunde desegnis estas … krisignoj !!!

Kio do igas la tekstojn de Al CAPP en principo ne tradukeblaj ? Lia ekstrema ĵonglado per vortoj, nomoj, kaj esprimoj, ofte kun socikritika aludo tipe usona. Tio igis lin enkonduki eĉ personaĵojn kun ne-prononceblaj nomoj: Joe Btfsplk kaj "*@!!*!"-Belle. Nu, la konata arkaikega ortografio de la angla, datumanta el la tempo de Shakespeare kaj eĉ de Chaucer, faciligis al li prezenti precipe "klerajn" terminojn komike laŭprononce, apud la jam per si mem komikaj dialogoj en sudusona dialekto de stilo <*hillbilly*> = "el

izolita kaj senkultura regiono”. Tiu procedo de dis-hakado al izolitaj silaboj havigis al li krome eblecon misskribi kaj tiele aldoni surprizan kromsignifon al koncernaj terminoj. Rezulto: intenca lingvokaĉo pli ol dialekto.

<u>Normala</u> traduko de tia mikspoto evidente ne eblas. Sed ĉu beletra tradukado ne konsistas en alimaniera <u>novkreo</u> de la originalo ? Tion mi do provas fari ĉi sekve, manipulante Popidon kiel ĉefan ingrediencon kaj Gavaron kiel spicaĵon.

[La centra temo de la rakontoj estas imaga subevoluinta urbeto aŭ granda vilaĝo en Kentukio, kies paljasaj en-loĝantoj spertas multajn aventurojn, turniĝantaj ĉirkaŭ la ĉefheroo Eta Bnezer [*Li’l Abner*] – memportreto de la verkisto. Plej karakteriza estas ke la fraŭloj tie neniel emas edziĝi kaj perdi sian liberecon, dum la fraŭlinoj ilin daŭre postĉasas; almenaŭ tio formis la komencon de la multaj serioj kaj ilian konstantan fonon. Nur unu fojon en la jaro, en la Eva-Senadam-Tago [*Sadie Hawkins Day*] okazas vetkuro en kiu ĉiu fraŭla virino rajtas kapti viron kiu devos edziĝi kun la kaptintino … se ŝi sukcesas tian kapti antaŭ sunsubiro. Tra la jaroj kompreneble kreskis la nombro da amuzaj figuroj en la serioj, kun ĉiam novaj vortludaj nomoj. Mi mencias jen nur la ĉefajn, kiuj rolas en la elektita fragmento.

Eta Bnezer <*Li’l Abner*>
La centra figuro estas ĉio escepte eta per sia dumetra grandeco kaj atleta muskolaro. Li estas eterne 19-jara naivega, malklera, kaj mildkaraktera knabo, kiu vivas en kabano kun siaj nanstaturaj gepatroj. Konstanta zorgo por li estas eviti kaj eskapi la edzigodeziron de Maja Floret.

Eva-Senadam-Tago *<Sadie Hawkins Day>*
Ĉiujare revenanta tago de ĉaskurado en kiu fraŭlinoj de ajna aĝo rajtas postkuri fraŭlojn de ĉiuj aĝoj por iun el ili kapti (se ŝi kapablas), kio rajtigas la kaptintinon edziniĝi kun la viktimo.

Gargojla Galoŝ **<***Gat Garson>*
Sozio de Eta Bnezer, sed male al li ruza, perfidema, senskrupula krimulo.

Geedziga Admon *<Marryin' Sam>*
Protestanta predikisto kun eterne nigraj kostumo kaj ĉapelo, kies specialaĵo estas ege mallongaj ceremonioj je po 2 dolaroj. Li vagas tra la regiono sur mulo sed ne estas tre ŝatata aŭ respektata pro sia profitamo kaj oportunismo.

Hundêbed *<Dogpatch>*
La klaŭneska vilaĝo en kiu plimulto de la historioj okazas.

Jedispona Jan *<Available Jones>*
Riĉa komercisto pri ĉiaj varoj kiu estas volonte je dispono de ĉiu ajn … kontraŭ bona rekompenco.

Jukul(s) *<Yocum(s)>*
Familinomo de la Bnezer-obitelo* kun la gepatroj Paĉ Alumed kaj Panj Uragan kaj, apud Eta Bnezer mem, du pli junaj fratoj de nur akcesora graveco.

Maja Floret *<Daisy Mae>*
Belega, volupta (kvankam virte vivanta) junvirino, konstante vestita sammaniere en kurta jupo kaj duone malfermita bluzo. Ŝia sola vivcelo estas akapari non* Eta Bnezer.

Paĉ Alumed *<Pappy Lucifer>*
La tute senefika, pigrega, analfabeta, malsprita, kaj facile trompebla nanstatura patro de Eta Bnezer.

Panj Uragan <*Mammy Pansy*>
La fortkaraktera, viglega, kaj batalema patrineto de Eta Bnezer, kun ĉiamaj laĉobotoj kaj kun pipo en la buŝo. Ŝi estas la ne proklamita registino de Hundêbed, kiu tranĉas ĉiun diskuton aŭ kontraŭstaron per seka *"Mi parolit !"* aŭ per sia timata pugnobato, nomata *"Dormu bone, karul !"*.


Salamet <*Salomey*>
Ĉarma porkineto dorlotata de ĉiuj membroj de la familio kaj ofte akompananta la heroon. Ŝi estas sole restanta reprezentanto de la aparta pork-specio *Lardus rozcolorus.*

Sentima Sfinkter <*Fearless Fosdick*>
Fakte parodio de alia bildstria heroo konkurenca, la detektivo Dick Tracey. Tiu senkompate elpelas krimulojn de ĉiuj specoj kaj pruviĝas kapabla postvivi ĉiun ajn atencon.

La Volonta Celtabulo

En la sekva historieto, kun nur kelkaj elĉerpaĵoj, grandurbaj gangsteroj hazarde aŭtoveturas tra Hundobedo. Ili ekvidas Etan Bnezer kaj pensas ke li estas ilia kolego Gorgojla Galoŝ, kiu trompis la bandon kaj fuĝis kun la "asocia" mono. Estante ne komisiitaj por tion fari, ili ne mortpafas lin, sed promesas ke venos murdistaj knabegoj* post du semajnoj, en la silvestra vespero, por "estingi lian kandelon"*. Ili krome diras al li, ke interdume li nur amuziĝu kaj profitu de la vivo. Eta Bnezer ensorbas nur la duan ideon kaj gaje foriras. Ĝuste en tiu momento Geedziga Admon, la predikisto, preterrajdas sur sia mulo. Tiu subaŭskultas la konversacion kaj plendas la naivulon. Krome aperas aŭtomobilo, kiun stiras asekura makleristo. Tiu proponas al la predikisto tute esceptan asekuron kontraŭ subita morto "de iu alia persono elektebla". La de ili promesata sumo estos 100.000 dolaroj, giganta valoro, pro kio ankaŭ la premio estas sufiĉe alta: 100 dolaroj pagotaj ĉiumonate. Ĉar la predikisto certas pri la promesita morto de Eta Bnezer post nur du semajnoj, li decidas asociigi ĉiujn vilaĝanojn — escepte kompreneble de la Jukuloj, ĉar Panjo Uragan tiutage malestas en Hundobedo — por kunkolekti la

bezonan premion. Ili ĉiuj estas ja malriĉaj sed havas siajn dometojn, kiuj estas hipotekeblaj ĉe Jedispona Jan, la vilaĝa grandkomercisto. La vilaĝanoj konsentas en la espero iĝi ĉiuj riĉaj kaj laŭdas Etan Bnezer, ke li estas tiel sinofera por la komunumo. Ili eĉ organizas festenon je lia honoro, kio ege feliĉigas kaj emociigas la naivulon. Sed fine, kiam ĉiuj hipoteke riskis siajn domojn, la fatala vespero alvenis kaj Eta Bnezer staras preta sur monteto por esti mortpafata, nenio okazas. Venas la novjara mateno kaj nia heroo ankoraŭ vivas. Katastrofo ! Geedziga Admon sendas telegramon al la krimula firmao demandante kiam alvenos la knabegoj. Returne li ricevas telegramon ke ili eksciis ke temas nur pri sozio, kaj sekve ne estas bezono likvidi la junulon.



Specimena teksto el la usona originalo

| 3 | - That's th' "Business Front" of **America's most ruthless** killers !! Why are **"The Boys"** going to do this to you, lout ?

- They said ah is bad fo' their "business".

*- But, shecks ! It don't come up fo' two weeks ! Meanwhile, all ah gotta do is **injoy** mahself – "Th' Boys" said !!*

- (No sense **wastin'** this horrible tragedy !! Mus' be **some** way t'make a soft dollah outa it !!)

*- ?!! –s –sounded like yo' said – 14 solid days o' fun an' re-lax-ayshun an' then **"Th' Boys" knocks yo' off !!***

*- "Have nothin' but fun until then" th' Boys said !! Them were thar **very words** !!*

- (His brain kin absorb only one thought at a time ! He' so pleased at th' fun part – he fo'gits th' **killin'** part !!)


Dissemi la onidiron ke ci eskapis al Sud-Ameriko, sed dume kaŝi cin en tiuj ĉi montetoj estis vere inĝenia, bubo !
Ho, sit bagatel ! (hihi, zi kredat mi ingenia !)
Ci komprenas ke estus fuŝkomerco por ni lasi cin vivanta. Ci ja scias, ĉu ?
Ho, tserte ! (mi fakte **nej** stsiat, mo zi nej pensu mi malklera!)
Ci konas la famon de la Suda Pinkesta Konstru-Kompanio tro bone por provi eskapi !
La knabegoj estingos cian kandelon post du semajnoj. Ĝis tiam amuzu cin, kamarado !
Dank, kamarad! Devot faraj nio alja ol amuzaj mi dum du plenas semajns ! Hura !!
Devot faraj nio alja ol amuzaj mi dum du plenas semajns. Jupijupi !
Kaj kio poste, bubego ?
Ed tam los knabegs estingot ma kandel. Zi opiniat as mi konat lo fam de lo Suda Pinkesta Konstru-Kompani tro bone por provaj eskapaj !
!!


Ĉu vi diris ke via asekur-kompanio pagos centmil dolarojn, se iu alia subite mortas ?
Ekzakte, se iu havas la kuraĝon investi en tiu alia persono.
Ŝajnat as mi awdit ci diraj: du plenas semajns de plezur ed distraĵ ed tam los knabegs estingot ca kandel !?
"Ĝis tam, amuzu ci" sit zas veras parols !
Vi do volas diri ke, se mi asekurus ekzemple tiun grandan sanan bubon tie kaj li subite malaperus, mi ricevus centmil dolarojn ?!
Ekzakte. Tio estas: se vi pagis la premion de 100 $ ĉiumonate. La sekva pago estus je . . .
Ne zorgu pri la sekvanta pago !
Mi havas teruran novaĵon por ĉiuj. Pro cirkonstancoj ekster nia kontrolo, la knabegoj estingos la kandelon de Eta Bnezer en la silvestra vespero !
Ho, lo povra anim !
Fortranĉida en lo flor de junaĝ !!
Mi vat fam de fera mem-regadz, mo vidu mi jen, blekande kel orfa infan !!
Adie, dolĉa Eta Bnezer !
4


Eta Bnezer, ni los civitans de Hundebed, sciande as ci sot mortigida en lo silvestra vesper, montrat na fid en ci per invest de giganta asekur sur ca viv !!
Ni intencat hipotekaj nas doms por pagaj lo wona depag de 100 $!!
!!? Vi pretat riskaj vas hejms por investaj 100 Dolars en mi ?
Ho, mas karas kuncivitans to mi memorot tom longe kom mi vivot !!
Prefere, to nej sot tro longe, amiket !!
To wona depag sat cirke sjo ko ni kapablat.
Zorgu do, as no netsesot dua !!
Ci dezirat hipotek de 100 Dolars sur hiu dom en Hundêbed ? Nu, sjus tus eluzidas kabans kunas nej valorat pli ol cend Dolars !!
Do po 2 $? Sat bona afer !
Memoru ! Se mi nej re-ricevot ma mon post tri-dek tags, sju mizera hejmŝata rat en Hundêbed sot elpelada !!
Kompreneble !! Mo, ci rericevot ca fetora mon jam ante ol to !
6


Eta Bnezer igot ni sjus riĉas venonda silvestra vesper !!
(Hi, hi, hi !!) Sat ma infan ! ?? Hu, ko li sat farond ??
MORTAJ !
Mo nej zorgu, Panj Uragan, li sat asekurida ! Ni hipotekit sju dom en Hundêbed por kolektaj lo bezona mon !
Niam sot dua depag. Los knabegs estingot la kandel ante to !!
Zi farot ?! Pro ko ?
Ni nej sciat ed, honeste, ni nej vat interes !
Niam rigardu ĉeval en lo buŝ, kel oni dirat.
Devat egzistaj rimed por savaj ma infan !! Mi aranĝot tus "knabegs"
Nej tuŝu tus knabegs!!
Nej fuŝu lo tuta entrepren, Panj !!
Mi helpot al Eta Bnezer eskapaj ante ol tus knabegs mortigot li !
Vat-ci vere lo intenc fuŝaj na tuta entrepren !??
Se tu mortig nej okazot lawplane ni sjus perdot nas doms al Jedispona Jan !!
Ni hipotekit zi sjus por pagaj lo asekur !
Mo se lo mortig sukcesat ni sjus naĝot en riĉec !!
8


No sat muĉe por manĝaj en tu ĉi banked de "ripozu en pac" pro to ke ni sat platpoŝas, amik, mo post okaz de donida event ku ni arde atendat . . .
Ni vot plena tegmentleva manĝeg, tuj post ca mort ! Nej pensu as ni intencat uzaj lo tuta asekur-mon nure por ni mem !
Ni organizot "Eta Bnezer Memoriga Banked" ku ci nejam forgesot !! Sukerida ŝink, sukeridas ostrês, sukerida ŝafid, ed sukeridas barbfiŝas skwams por desert.
S A L I V !!!
To igat al oni venaj akwe en lo buŝ, as ver, filet ?
Ci certe pravat ! (ŝmac) ? ? ? ? (singult)
Los knabegs estingot ca kandel senkunrigarde, mo ci nej sot totala perd ! Ante ol lo lasta eĥ de ca rasladz perdiĵot, sjus Hundêbedans sot riĉas kel nababs pro ca asekurkapital ! Povu tu ĉi pens ĝojigaj ci, filet, dum ci suprepaŝat lo soleca monta voj !!
REKTE ANTEE
ETA BNEZER
10



Ni sjus fidit je ci, fil, mo nun ni sat ege seniluziigidas ! Oni nej povat kolektaj asekurmon pro vivanda bub, sciu !!
Se to su spritaĵ, mi nej vidat lo spritec !!
Los knabegs devit estingaj ca kandel en lo vesper. Mi esperat as ci nej ofendit zi !?
Niu aperit dum lo tuta nokt (singult), escepte de kolera mefit ed agacida agle super ma kap.
XXX
FARUN
Eble la knabegoj misnotis la daton ? Mi tuj sendu ekspresan telegramon !!
Al mi nej urĝat !!
Fermu lo klap ! Al ni almene sat ege grava !!
TELEGRAMO
Al la knabegoj - Chicago, USA
Hundobedo urĝe atendas mortigon juna Jukul. Kiam vi faros krimon ?
= Edziga Admon =
TELEGRAMO
Al Edziga Admon - Hundobedo, USA
Plu ne cerbumu. Erare kredis Jukul esti Gargojla Galoŝ. Deziras al li miljon jarojn.
= La knabegoj =
Jipijipijipi !! Mi vivot plu !!
Jen la plej aĉa novaĵo, kiun Hundobedo iam ricevis, kaj li ĝojas pro tio !!!
FINO
12

05. **Wannes Raps**
« kristnaska novelo »



Ernest **Claes** (1885-1968), doktoro pri ĝermanida filologio, estis ege populara flandra rakontisto kaj multverkisto, kiu scipovis verve priskribi la vivon kaj morojn de flandraj kamparanoj kaj etburĝoj. En Esperanto aperis de li la verketo *Kristnaska Triptiko*, origine folklora teatraĵo. En pluraj liaj verkoj aperas dialektaj dialogoj. Kiel hazardan modelon mi elektis la rakonton pri vaganta helplaboristo sen familio, Wannes Raps, kiu parkeris longan (eble memfabrikitan) sorĉopreĝon por protekti farmbienojn kontraŭ malbonaj influoj. Superstiĉaj kamparanoj volonte rekompencis lian deklamadon de tiu "ĉevala patronia" por ŝirmi siajn havaĵojn.

Specimeno de la flandra originalo

"Moar," vroeg Jan van Gille dan, *"zoa 't toch serieus woar zijn dat er é hel bestoat …?"* Hij zei dat op een toon alsof dit vraagstuk hem erg temteerde, want Jan van Gille, die vroeger zowat de socialist had uitgehangen en naar geen kerk ging, was alleen opnieuw katholiek geworden uit schrik voor de hel. Wannes bekeek hem bij die vraag aan met een koppel ogen die Jan deden koud worden, en antwoordde dan: *"As ge 't soems nie geluêft, Jan, dan zal 'k oe gedoeme es loate zien dat er é hel is …"* En ze waren een beetje bang dat Jan zou aangedrongen hebben.

La sorĉformulo

[Wannes ĵus finis deklamadon de sia longa sorĉformulo kun multaj strangaj vortoj kaj versoj en ĝi.]

Preskaŭ unuspire Wannes tion debitis, rigardante al neniu, kaj iam tiam li faris tiel mirigajn gestojn per manoj kaj kapo, ke la koncernaj strangaj paroloj

akiris kroman misteran signifon. Kiam li ĉesis, neniu kuraĝis malfermi la buŝon. Ŝvebis mistera timo en la ĉambro, io kion ili ne povis aŭdi aŭ vidi, sed jes palpsenti en la mallumo ekstere, kontraŭ la nigraj vitroj de la fenestroj. Ili ĝemetis mallaŭte al si mem, reŝovis siajn pantalonojn, remetis siajn deprenitajn ĉapojn kaj okulis al Wannes, kiu nun restis muta kaj aperis al ili kiel tute alia homo.

<La Araneo> ekpensis kun korpremo ke estos tiel preme soleca vojo laŭlonge de la lago por pliposte reiri hejmen. Felke de Netekes sidis tie ŝvitanta kaj anhelanta kvazaŭ io okazis al li. Ĉe la unua parolo kiun unu el ili prononcis ili vekiĝis el la timiga etoso kaj ili ekĝojis povi denove paroli pri ordinaraj aferoj.

- *"Mo,"* tiam demandis Jan de Gile, *"sut-do toĥ vera ke egzistat lo Infer ?"* Li diris tion tiel intensege kvazaŭ la problemo lin ege turmentis. Jan de Gile ja, kiu antaŭe iom kondutis kiel sendia socialisto kaj eniris neniun preĝejon, refariĝis katoliko nur pro timo por la Infero. Ĉe tiu demando Wannes lin fiksrigardis per okuloj kiuj frostigis non* Jan, kaj tiam respondis: *"Se ci foje nej kredat to, Jan, mi tondre montrot al ci ke ĝi egzistat …!"* Kaj ili ĉiuj iomete ektimis ke Jan insistus pri sia demando.

- *"Mi pensat as tu sat maldeca vir, Jan, por hio to demandaj !"* komentis Per Gejskens. *"As lo Infer egzistas ja sciat sju ajn !"*

<La Araneo> sentis sin ege malkomforta. Li suĉis je sia pipo kvazaŭ volante elsuĉi sian animon. Li jam tiom ofte kverelis en sia vivo, tiom ofte kantis erotikajn kanzonojn, ke li ege maltrankvilis pri la temo de infero kaj diablo. Li ĉirkaŭrigardis kun malespera petego en la okuloj, ĉu tiu aŭ alia eble bonvolus ion diri je lia favoro.

- *"Certe devat doloregaj,"* opiniis Paneke Pastor, *"tel senĉese bruladzaj. Mi foje ricevit kuirpot da bolanda*


akwê sur ma pied… depost tam mi bone sciat !` Wannes ne partoprenis kaj restis rigardante antaŭ si al la planko; li kraĉis apud sia seĝo kaj ĵetis sian glaseton da brando en la gorĝon.

Kiam ili reiris al siaj hejmoj en tia vespero, laŭlonge de la lago, trans la sablovojo kaj la digo, tiam estis neniu kiu en la mallumo ne murmuris kelkajn citaĵojn:

Hoktit Boktit
Bovida vost ku rompit
Ed hund sa puget perdit …

por teni ĉiujn noktajn timigaĵojn kiom eble plej for de si.

De ĉiuj viroj el tiu epoko restis nur Viktalis, kiu ankoraŭ plene scipovis la “ĉevalan patronian” de Wannes Raps, kaj mi de li ĝin lernis.



06. **Silas Marner, la teksisto el Raveloe**

George Eliot estas pseŭdonimo de la angla verkistino Mary



Ann EVANS (1819-1880), kiu preferis viran aŭtornomon por pliigi siajn ŝancojn je sukceso ĉe eldonistoj kaj la publiko. Ŝia stilo tute hejmas en la t.n. "viktoriana epoko" de (ne malofte hipokrita) severmora socio kaj multa protokolo en la interrilatoj. La tekstoj estas markitaj per longaj kompleksaj frazoj kaj elĉerpa detaligado de eventoj, ĉirkaŭaĵoj, psikologiaj motivigoj.

En la drama romano "Silas Marner, la teksisto el Raveloe" la heroo estas false akuzita pri murdo kaj prirabo, por kio li devas fuĝi el sia hejmo kaj eskapi al vilaĝo en la kamparo. Tie li vivas tute morne kaj izolite ĉar la vilaĝanoj ne tre afablas al fremduloj, ĝis kiam en iu frosta vintra nokto li subite malkovras en sia domo junan knabineton, kiu tien enpenetris. Li tuj eliras por serĉi responsulojn pri la infano, sed iom pli fore li trovas nur virinon morta en la neĝo, sendube la patrinon.

Ĉar neniu en la komunumo ŝajnas koni la mortintinon, li decidas gardi la infaninon ĉe si, nomante ŝin Eppie. Tiu orharara kaj orkora knabineto iĝas por li nova vivocelo kaj ĝojo. Eppie elkreskas ĝis belega junvirino, tre ŝatata de la vilaĝanoj, kiuj kondutas pro ŝi ankaŭ pli amike al ŝia adoptopatro.

Sed jen, post tiom da jaroj, eksciatas ke la mortinta patrino envere estis sekreta edzino de la loka grandbienulo Godfrey, kiu interdume denove edziĝis. Tial ke la bienula paro restas malfeliĉe seninfana, ili decidas agnoski kaj adopti non Eppie kiel sian laŭrajtan filinon. Tamen, tiu ĉi havas neniun deziron forlasi sian amatan adoptopatron, eĉ ne por iĝi riĉa

kaj nobela. Ŝi do rifuzas kaj edziniĝas al simpla bonkora knabo. Ili ekloĝas ĉe Silas, kies domo estas renovigita kaj larĝigita je kosto de la nobeloj. Ĉio bonas kio finiĝas bone…

La rakontoj de Eliot ĝenerale emas akre kritiki la misfarojn de eklezianoj kaj nobelaro, kaj reliefigi la gravecon kaj dignon de simplaj metianoj aŭ kamparanoj, kio kredeble dankindas al tio ke la aŭtorino naskiĝis kaj edukiĝis en tia medio. Ŝi cetere tre lerte scipovis redoni ankaŭ la parol- kaj pensmanierojn de popolanoj, pro kio la posta fragmento.

Specimeno de la angla originalo:

"Ay, ay; go that way of a dark night, that's all" said Mr. Macey, winking mysteriously, "and then make believe, if you like, as you didn't see lights i' the stables, nor hear stamping o' the hosses, nor the cracking o' the whips, and howling too, if it's tow'rt daybreak. <Cliff's Holiday> 's been the name of it, ever sin' i were a boy; that's to say, some said as it was the holiday Old Harry gave him from roasting, like. Though there's folks nowadays know what happened afore they was born, better nor they know their own business."

Fantomaĵoj

[Grupo de vilaĝanoj iun vesperon sidas en sia trinkejo, aŭskult-ante al maljuna Macey, paroĥa komizo kaj tajloro.]

Ĉiu en la aŭskultantaro de Macey jam multfoje aŭdis tiun ĉi rakonton, sed oni ĝin aŭskultis kvazaŭ ĝi estus sukcesmelodio kaj, ĉe tiu aŭ alia detalo, la blovado de la pipoj momente ĉesis, por ke la aŭskult-antoj povu dediĉi sian tutan atenton al la atendataj paroloj. Sed io pli estis venonta; kaj Snell, la trinkej-estro, ĝustatempe faris la ĉefdemandon:

Mo, nej rakontit oni as l'olda Sir Lammeter vit bela fortun, kam li alvenit en tu ĉi region ?

Nu, da, diris mastro Macey, *mo maopinie Sir Lammeter nej farit muĉe por gardaj ĝi sendifekta. Bikos oni kutimit rakontaj as niu kapablit riĉiĵaj sur la Kunikluj; kwankam li akirit ĝi malmultekoste, konsiderande as ĝi ja sit telnomada Karitata Land.*

Da, ed sat malmuĉe da homs ku sciat, tel bone kel ci, kumaniere ĝi fariĵit Karitata Land, nej vere, mastro Mejsi ? diris la buĉisto.

Kele zi povut? diris la maljuna komizo kun ioma malestimo. *He, ma av tajlorit lo ĉevalista livre por tu Sir Cliff, ku venit ed ku konstruit los grandas stals sur lo Kunikluj. Ed tus stals sat kwarfoje tom grandas kom tus de Moŝt-Sir Cass, bikos li pensadzit pri nio alja ol ĉevals ed ĉasadz, tu Cliff — tajlor el Lunnon law hies dirs — ku til frenezec trompŝajnigadzit. Bikos li nej kapablit rajdaj; Di kompatu ! oni dirit as li vit tom malmuĉe da firmten je ĉeval ol se las gambês estindut kurbastonets: ma av aŭdit lo olda Moŝt-Sir Cass diraj to oft' ed oftfoje. Mo rajdaj li toĥ farit, kwaze lo Peĉa Joĉ* [populara nomo por la diablo] *sut pelinda li; ed li vit fil, diksesjara knab; ed lo patrê nej permesit al tu ĉi faraj aljo ol rajdaj ed rajdaj — kwankam lo knab muj timit to, onidire. Ed sit kutima diraĵ as lo patrê dezirit forrajdigaj lo tajlorec el sa fil, ed faraj sirul le li — malgre as mi sat tajlor mi mem; mo konsiderande as Di farit mi ta, mi sat fiera pro to, bikos <Macey, tajloro> sat skribida super ma pordê, ŝon de ante kam lo kap de l'Reĝin ekaperit sur los Ŝilingomoners. Mo Cliff, li hontit saj nomada tajlor, ed li amare ofendiĵit kam oni mokit la rajdadz, ed niu el lo ĝentilular ĉi tea povit toleraj li. Sjel ajn, lo povra knab malsaniĵit ed mortit, ed lo patrê nej longe post-vivit al li, pro ko li iĵit pli stranga ol hiam ed oni-rakontit as li kutimit eliraj meze de l'nokt, kun lantern en lo man, al los stals, ed lumigaj en ĝi amas da lums, bikos li fariĵit senkapabla je dormadz; ed li kutimit staradzaj te, krakigande sa vipil ed rigard-ande sas ĉevals; ed oni dirit as sit*

bonŝanc as los stals nej forbrulit kune kun los povras mutas kreitaĵês interne. Mo finfine li mortit delirande ed oni eltrovit as li sit postlasinda sa tuta propraĵ, Kunikluj ed sjo, al karitata societ en Lunnon, ed jen kelmaniere lo Kunikluj fariĵit karitatland. Kwankam, kom koncernat los stals, Sir Lammeter niam uzat zi — zi sat komplete senhavas — Di kompatu ! Se ci ĵetut pordê ferma en zi, sonegut kwaze tondrê tra duon de l'paroĥ !

Da, mo toĥ okazat pli en los stals ol los homs vidat ĉe taglum, no, mastrê Mejsi ? diris la trinkejestro.

Da da, ci nur iru te en malluma nokt, jen sjo, diris Macey, mistere okulumante, *ed tam imagu, se ci kapablat, as ci nej vidat lums en los stals, nek awdat stampfadz de ĉevals, nek krakadz de vipil, ed hurladz anke, kam sat ĉirke tagiĵ. Lo <Festêtag de Cliff> sat l'esprim por to, ekde kam mi sit junknab; nome: hius diradzat as sat to lo fest ku Peĉa Joĉ al li donacit, kwaze kompense por lo rostadz. Jen ko rakontit al mi ma patrê, ed tu sit racia vir, kwankam hoditage troviĵat homs kus pretendat sciaj afers, okazindas ante ol zi naskiĵit, pli bone ol sas propras afers.*

Ko respondat-ci al to, he, mastrê Dowlas ? diris la ejestro, turnante sin al la hufoferisto, kiu estis arde atendinta sian parolvicon. *Jen nuks krakenda fare de ci !*

Dowlas estis la negativisma spirito de la grupo kaj li estis fiera pri tiu sia pozicio.

Dirat? Mi dirat ko diraj <u>devat</u> hom ku nej fermat l'okuls, rigardande al vojindikil. Mi dirat as mi sat preta vetaj diks Pundês kontre ku ajn kuraĝot deĵore staraj kun mi, dum sekwa nokt en lo herbej ante los stals de l'Kunikluj, as ni nek vidot lums nek awdot brus, escepte lo blovadz de nas propras nazês. Jen ko mi dirat, ed mi ŝon mucĉfoje parolit same; mo niam trov-

eblat hiu ku riskot dikspunda monbilet por tus fantoms pri kus li tom certat !

Nu, mastrê Dowlas, to sat facila vet, porcerte, diris Ben Winthrop. *Ci povut same bone vetaj al vir as li nej kaptot rumat, starande til lo kol en laget dum frosta nokt. Sut granda ĝoj por tu vir, gajnaj lo vet ed poste eksuferaj je rumat. Homs kus kredat je l'Festê-tag de Cliff, nej sat riskondas si en ĝa proksimaĵ pro nura dikspunda risk !*

Se mastrê Dowlas dezirat eksciaj lo ver pri ĝi, diris Macey, kun sarkasma rideto kunfrapetante siajn poleksojn, *li tute nej bezonat faraj vet — as li ja povat ekiraj ed gardostaraj li mem — sat niu ku malhelpot al li; ed tam li povot informaj los paroĥans ĉu zi malpravat.*

Dank ! ci sat muj kompleza, diris la hufoferisto, snufante malestime. *Se hius uls sat malsaĝas, nej sat ma afer. Mi nej bezonat vetadz, sjo honeste ed malkaŝe. Hiu ajn vetu kun mi diks Pundês ed mi ĉeestot lo Festêtag de Cliff; mi ekirot ed deĵorot te tute sola. Nej bezonat akompanand. Samfacile mi farut to, kel mi plenigat tu ĉi pip.*

Ha, mo ku kontrolut ci, mastrê Dowlas, ed vidut ci faraj to ? Nej sat honesta vet, diris la buĉisto.

Nej sat honesta vet ? demandis Dowlas kolere. *Mi ŝatut awdaj vir te ĉi ekstaraj por deklaraj as mi intencat vetaj malhoneste ! Ed nun, mastrê Lundy, mi ŝatut awdaj ci parolaj tele.*

Sendube ci ŝatut, diris la buĉisto, *Mo niel sat afer por mi. Ci nej format part de mas vetaĵês, ed mi nej sat provonda kontestaj ca prez. Se hiu te ĉi volat akceptaj ca defi, li faru. Mi, mi sat por pac ed trankwil, sciu !*

Da, tel sat sju jelpanda hundaĉ, kam oni minacat ĝi per baston, diris la feristo. *Mo mi timat nek hom nek*

fantom, ed mi sat preta faraj honesta vet — nej mi sat vostokaŝa hundaĉ !

Certe, mo enestat anke alja element, mastrê Dowlas, diris la trinkejestro, parolante kun malkaŝemo kaj toleremo. *Sat persons, maopinie, kus nej kapablat vidaj spirits, eĉ nej se tus starut ante zi tel klare kel promenbaston. Ed sat grund por to. Bikos jen ci vat ma edzin ku nej kapablat flaraj, eĉ nej se ŝi vut plej fortodora fromaĝ sub lo naz. Mi niam vidit fantom mi mem, no, mo mi rezontat tele: Verŝajne mi nej posedat lo flarpov por zi. Mi volat diraj: metande fantom anstate odor, o aljel inversmaniere. Ed tele mi prenat parti por ambe tendars; bikos, mi dirat, lo ver kuŝat hie inter zi. Ed se mastrê Dowlas devut iraj te ed postenaj, ed diraj as li vidit eĉ nej ombrê pri lo Festêtag de Cliff dum to tuta nokt, mi apogut li; ed se alju dirut as lo Festêtag de Cliff sat certege vera, spite sjo, mi apogut anke tu. Bikos sat lo flarkapablê law ku mi rezonat …*

La analoga argumentado de la trinkejestro ne trovis bonan akcepton ĉe la hufoferisto — viro intense oponanta kompromisojn.

Ba ba, diris li, demetante sian glason kun freŝa incitiĝo, *Ku rilat vat lo flarkapablê kun to ? Hiam fantom batit-ĝi bluokul al hom ? Jen ko mi ŝatut eksciaj. Se los fantoms volat as mi kredu je zi, tam zi ĉesu ŝtelvagadzaj en lo opskur ed en solecas lokês. Lasu zi aperaj te ke troviĵat kompani ed kandels.*

Kwaze fantoms dezirut saj kredadzas fare de hiu tagrade senscia, diris Macey, kun profunda naŭzo antaŭ la senkompetento de la feristo percepti la kondiĉojn de fantomaj fenomenoj.

07. **Memoraĵoj de Kuracisto pri la lukto kontraŭ veneraj malsanoj**

En la fruaj jaroj de la dudeka jarcento, multe da hispanaj kuracistoj pioniris pri seksmalsanoj ĉe virinoj, provante anstataŭigi la mankantan moralon per higieno. Inter ili estis Doktoro **Jaime** **ESPINEL**, kiu batalis por elradikigi ĉiujn spurojn de "seksa komunismo" el la virinoj de Hispanijo. Pri siaj multjaraj spertoj li verkis popularajn memoraĵojn (1963) humanajn el kiuj mi prenas unu rakonton.

Specimeno de la hispana originalo:

- Eres andaluza, ¿no?
- Zí, zeñó, nasida a la mismita vera de la Giralda, Zevillana de pura sepa. ¿Conose uzté Zevilla, dotor? E lo mehor del mundo.
- ¿ Y cómo te has ido tú de allí ?
Maribel se echó a reír.
- La vida, dotor, la vida … Y los hombres, que sois tos unos majaretas. ¡Uy, qué majaretas sois los hombres !

Maribel kaj ŝia nigruleto

Kiam Maribel la unuan fojon venis al la dispensario por submeti sin al la regula kontrolo, ŝi venis sola. Blonda kaj sprita virino estis ŝi, kun ŝvelaj korpoformoj. Ŝi senĉese parolis lispante troige. Proksimume dudek kvin jarojn aĝa kaj tre gaja ŝi estis.

- Vi estas andaluza, ĉu ne ?

- Da, Sir, naskiĵinda ĉe lo flank mem de La Giralda, Seviljanin el purrasa deven. Konat-si Seviljê, doktor ? Ĝi sat lo plej bona en lo mond.

- Kaj kial vi foriris de tie ?

Maribel ekridis.

- Lo viv, doktor, lo viv ... Ed los virs; pro ke vi sjus sat frenezetuloj. Uj, kel frenezetas sat los virs !

Mi volis serioziĝi, sed mi nur sukcesis rideti. La intimeco de tiu kompatinda ulino havis nenion ofendan. Sensence ŝi babiladis nur pro la plezuro babili. Tiu virino kapablis paroli horon post horo, se oni ne interrompis ŝian paroladon. Tamen, en tio kion ŝi diradis, neniam estis maldigna penso, sed ia instinkta maliceto amuze natura.

La duan fojon ke Maribel venis al la dispensario, ŝi venis akompanata de nigruleto proksimume tri aŭ kvar jarojn aĝa. Estis belega knabeto kun viglaj okuloj kaj kun korpo animita de gracia senĉesa movado. Li ne restis kvieta eĉ unu momenton kaj liaj okuloj senĉese iradis de unu persono al la alia, de unu objekto al la alia, kun netrankvila scivolemo.

- Li sat ma infanet, doktor. Donu kis al lo sir doktor, Julĉjê.

La etulo senĝene alproksimiĝis al mi kaj mi ekkaŭris por kisi lin.

- Ĉu li estas filo via, Maribel ?

- Da, Sir. Li naskiĵis en senluna nokt, ed pro to la kompatindulet vat lo hawt tel malhela.

Mi intrige rigardis ŝin. Kiu estus la patro de tiu kreitulo?

Julĉjo estis malkovrinta mian kareseman kateton flavan, Micifu, kaj li ekludis kun ĝi sub la tablo. Post malmultaj minutoj la nigruleto tiel hejme sentis sin, ke Maribel devis konvinkege paroli al li por ke li foriru kun ŝi.

- Lo venonda semajn ni revenot ed lo sir doktor permesot al ci ludaj kun lo katet; nej vere, sir doktor?

Kiam ili estis forirantaj mi donis al la infano skatoleton da maldanĝeraj pasteletoj kontraŭ tusado, kiuj efikis kiel frandaĵo, kaj li okulpinĉe signalis al mi kun friponeta kontento. Ni jam estiĝis amikoj. Mi eĉ ne pensis en tiu momento, ke ni estos de tiam amikoj por multe da tempo, en efektivo la tutan vivon.

Nature, Maribel daŭre venis en la dispensarion ĉiusemajne. Kelkajn fojojn ŝi venis sola dum aliajn fojojn kunprenante sian nigruleton, kiu atendis sian patrinon ludante kun Micifu en la antaŭĉambro, dum mi ekzamenis non* Maribel.

En iu okazo Maribel, tute plorgrimacanta kaj afliktita prezentis sin ĉe mi en la dispensario.

- Kio estas al vi, Maribel ?

- Ha, sir doktor…! Ha, sir doktor, kel malfeliĉa mi sat!

- Sed kio okazis al vi, virino ?

Maribel senĉese kaj senkonsole ploradis kaj la singultoj permesis al ŝi prononci nur nefinitajn lamentojn. Kiam fine ŝi iomete trankviliĝis, ŝi rakontis, ke sia viro — la klasika ekspluatanta fanfaronulo, kiun plimulto el la prostituitinoj renkontas en sia vivo — estis forkurinta, ŝtelinte ŝian tutan ŝparaĵon kaj ĉiujn novajn vestaĵojn.

- Li lasat mi preske nuda, doktoro. Sjo kunportit lo granda rabist. Eĉ won centim li nej restigit al mi. Terura ponardvundo oni faru al li !

- Ĉu vi jam komunikis la aferon al la polico ?

Maribel kun miro rigardis min.

- Lo polic …? Ko, krom nio, devat konaj lo polic pri ĉi tu afer ?

- Kial vi diras, ke la polico ne devas ekscii tion ? Tute certe ĝi devas interveni. Tio estas eĉ la ununura agmaniero por reakiri kion tiu viro forŝtelis de vi.

- Mo, sankta Di, doktor… Nej komprenat-ci ke oni nej devat permesaj al lo policans meti sas nazês en familias afers !?

Ŝi ne permesis al mi konvinki ŝin. Mi opinias, ke ŝi eĉ iomete malŝatis min pro mia insistado. Tiu virino, same kiel ĉiuj prostituitinoj, abomenas tion, kion ili nomas “hipokrita denunco”.

[Laŭ traduko de Antonio Sarmiento]



08. **Maria Barton, rakonto pri la industria socio**

Unu el la unuaj priindustriaj romanoj de Britio venis el la plumo de virino: **Elisabeth Cleghorn Gaskell** (1810-1865), Same kiel en pluraj aliaj modeloj [→ La Teksistoj] kun sociala temo, ŝi pli verigis sian romanon *Mary Barton, a Tale of a Manchester Life* per dialektaj dialogoj. Ĝi raportas la gravajn konfliktojn kiuj okazis inter britaj entreprenistoj de la teksindustrio (kapitalistoj) kaj laboristoj (proletoj), kulminintaj en 1839 ĉirkaŭ la fikcia familio Barton.



John Barton, honesta kaj idealisma tekslaboristo, pro privata malbonŝanco kaj pro la kreskanta senkoreco de la dungantoj, iom post iom iĝas amara homo kaj fanata socialista klasbatalanto. La filo de la fabrikestro, Henry Carson, dum sortodecidaj intertraktoj kun kolektivo de laboristoj, kiuj ja luktas por sia nuda ekzistokapablo, igas la grupon tiel priridinda, ke ili perdas la proceson. Ili lotumas kiu inter ili devos venĝi la laboristaron, mortigante la sentaŭgulon. La fato trafas non* Barton, kiu obeas kaj post la krimo fuĝas el la urbo. La suspekto pri la murdo tamen falas ne sur lin, sed sur la fianĉon Jem de lia filino Maria. Tiu ĉi lasta hazarde ekscias kiu estas la vera murdinto kaj provas havigi alibion al sia amato. Post multaj komplikitaj eventoj, la kulpigito tamen estas savita de mortkondamno. La patro fine, pro amaraj konsciencriproĉoj, revenas kaj konfesas al la direktoro ke estis li la kulpulo. Mary kaj Jem elmigras al Kanado.

Specimeno de la originalo

“Something is up,”said Mary. She went to the door and stopping the first person she saw, inquired the cause of the commotion. *“Eh, wench, donna ya see the fire-light ? Carsons’ mill is blazing away like fun,”* and away her informant ran.

La Incendio

[Unu el la teksadaj fabrikoj ekflamis kaj popolamaso alkuras por vidi la incendion. Alarmitaj pro la kuregado en la strato, Maria kaj ŝia fratino Margaret decidas ankaŭ observi la teruran spektaklon.]

Maria preskaŭ deziris sin aliloke, tiel timiga (laŭ la eldiro de Margaret) estis la vidaĵo, kiam ili aliĝis al la amaso kuniĝinta por rigardi la fajregon. Trakuris murmuro de multaj voĉoj kiam la muĝado de la flamoj ĉesis dum kelkaj momentoj. Estis facile senteble ke la amaso havis grandan intereson por la fi-evento.

- “Kion ili diras?” demandis Margaret al najbaro en la grupego, kiam ŝi rimarkis kelkajn parolojn, pli klarajn kaj distingeblajn ol la ĝenerala bruado.

- “Certe estas plu neniu en la teksejo!” kriis Maria, kiam la maro da levitaj vizaĝoj agorde turniĝis al la orienta flanko, direkte al la Dunham-strato, la mallarĝa malantaŭa vojo antaŭe menciita.

La okcidenta flanko de la uzino, kien la vento pelis la flamoj, kroniĝis kaj turiĝis per la triumfa fajro. Ĝi dissendis siajn inferajn langojn tra ĉiu fenestrotruo, lekante la nigrajn murojn kun amfuriozo; ĝin ŝancelis aŭ faligis la potenca ventego, nur por poste leviĝi pli kaj pli alte, por muĝi kaj ruinigi ankoraŭ pli sovaĝe. Tiu ĉi parto de la tegmento kolapsis kun konsterna frakaso, dum la homamaso baraktis pli kaj pli por enpenetri la straton, ĉar kio estis la terure belegaj

flamoj, kio estis la falantaj traboj aŭ ŝanceliĝantaj muroj kompare kun homaj vivoj ?

Ja tie, kie la vorantaj flamoj estis forpuŝitaj de la ankoraŭ pli potenca vento kaj kie nigra fumo vomis el ĉiu truo — tie, en unu el la fenestroj de la kvara etaĝo, aŭ pli ĝuste pordokadro en kiu argano estis fiksita por suprentiri varojn, oni okaze distingis la petegantajn formojn de du viroj, kiam la densaj fumblovoj parte klariĝis dummomente. Pro tiu aŭ alia motivo ili estis postrestintaj kiam la resto de la teksistoj jam forkuris. Eble tial ke la vento pelis la fajron al kontraŭa direkto, ili perceptis neniun signon aŭ sonon de alarmo ĝis multe tro malfrue — se oni povas nomi ion malfrua en tiu svarmo de teruraĵoj kiuj sin sekvis en malpli ol duona horo — kiam la fajro jam konsumis la malnovan lignan ŝtuparon je la alia parto de la konstruaĵo. Mi ne certas ĉu ne estis la bruo de la alkuranta homamaso malsupre kiu klare avertis ilin pri ilia terura situacio.

- "Kie estas la fajropumpiloj ?" demandis Margaret al la najbaro.

- "Zi alvenat, sendube, mo notu as kredeble pasit apene diks minuts depost malkovrê de l'incendi. Ĝi telege furiozat pro l'vent ed sjo sat telege seka."

- "Ĉu neniu do serĉis eskalon ?" spasmis Maria, vidante la du virojn ne aŭdeble petegi la grandan kunfluon malsupre pri helpo.

- "Da, lo fil de Wilson kaj alja vir paŝit for ante apene kwin minuts. Mo los masonistês, los ardezistês ed ceteras jam forlasit sa labor ed fermit los laborejs."

Wilson ! Do, tiu viro kies figuro pli kaj pli elstaris kontraŭ la daŭre kreskanta ruĝe ardanta lumo malantaŭa, kiam la fumo momente malaperis, tiu estus George Wilson ? Maria malsaniĝis pro la penso. Ŝi sciis ke li laboras por la Carson-entrepreno; sed unue

ŝi ne havis ideon ke ies vivo estus en danĝero. Nun ke ŝi tion konsciis, la varmigita aero, la muĝantaj flamoj, la malcerta lumo, kaj la farema kaj bruanta amaso konfuzis ŝiajn pensojn.

- "Ho, reiru ni hejme, Margaret; mi plu ne kapablas resti !"

- "Ni ne povas foriri ! Vidu kiel la homoj nin ĉirkaŭpremas. Povra Maria ! Vi certe plu ne emos rigardi incendion. Sed aŭdu, aŭskultu !"

Efektive, tra la eksilentanta amaso, hastante ĉirkaŭ la angulo de la teksejo kaj plenigante la straton, aŭdeblis la raslado de la estingomaŝino kaj la pezaj rapidaj hufobatoj de la tirantaj ĉevaloj.

- *"Dank'al Di !"* eligis la najbaro, *"la pumpil alvenit !"*

Sed okazis plia obstaklo; la konektiloj estis rigidaj kaj akvo ne produktebla.

Tiam pasis premo tra la homgrupo; la antaŭaj vicoj puŝis kontraŭ la malantaŭajn, ĝis la junaj virinoj sentis sin sufokiĝi pro la intensa kunpremo. Subite okazis iu liberiĝo kaj ili povis denove spiri pli libere.

- *"Sit l'juna Wilson ed pumpist kun eskal,"* diris la najbaro de Margaret, alstatura viro kiu povis rigardi super la amaso.

- "Ho, diru kion vi vidas !" petis Maria.

- *"Zi fiksit ĝi je la mur de l'alkoholaĵbutik. Won el los virs en lo fabrik falit dree; senkonscia pro lo fum, mi konjektat. Lo plank te ankore nej cedit. Ho Di !"* li diris, mallevante la okulojn, *"l'eskal sat tro kurta ! Sat finida kun zi, los povras uls. Lo fajrê alvenot anke te, mal-rapide mo certe. Ante ol oni akirit akwê o pli tawga eskal, zi sot definitive mortas. Lo Sinjor kompatu zi !"*

Singulto, kiel de escititaj virinoj aŭdeblis en la subita muteco de la homamaso. Alia premego kiel la antaŭa !

Maria kaptis la brakon de Margaret per forta pinĉo. Ŝi estis perdonta konscion kaj senton por povi eskapi la pezegan moralan tension. Unu aŭ du minutojn.

- *"Zi portit lo eskal en la Tempêl de Apolo. Eble nej povat reiraj kun ĝi al la kort de ke ĝi venat ?"*

Potenca krio estiĝis; sonego por veki mortintojn. Supre, balancante en la spaco ekvideblis ekstremaĵo de la eskalo, ŝovata el subtegmenta fenestro de la gabla parto de la ĝinpalaco, preskaŭ rekte kontraŭe al la aperturo kie oni vidis la du virojn. Personoj en la homamaso, plej proksimaj al la fabriko kaj sekve en plej taŭga loko por klare vidi la subtegmentan fenestron, vokis ke kelke da viroj firmtenis la alian parton de la eskalo tiel ke eblis ŝovi ĝin al la pordo-truo. La fenestrokadron ili estis forrompintaj antaŭ ol la publiko malsupre rimarkis la novan manovron.

Finfine — ĉar ŝajnis daŭri longe, mezurate per la emocie batantaj koroj, kvankam eĉ ne du minutoj pasis — la eskalo eksidis firme, spaca ponto je sveniga alteco trans la mallarĝa strato.

Ĉies okuloj estis fiksitaj kun sendevia korpremiteco. Ĝis la spirado mem de tiu popolo ŝajnis haltigita pro streĉo. La du malfeliĉuloj plu ne estis videblaj kvankam la vento, nun pli forta ol iam, pelis la flamojn al la kontraŭa direkto.

Maria kaj Margaret nun ankaŭ vidis; ĝuste supre ondis la eskalo en la vento. La amaso tiris sin for sub ĝi. Kaskoj de pumpistoj aperis en la fenestrotruo. Ili firmtenis la eskalon sur kiu ekpaŝis iu viro per konstantaj singardaj paŝetoj kaj senmova kapo, la brakojn etenditaj, irante transen. La multularo eĉ ne flustris dum li paŝis sur tiu danĝera ponto kiu vibr-etis sub lia pezo. Kiam li atingis la alian esktremon, relative pli sekura en la fabriko, aklamego leviĝis, sed nur unu momenton. Ili neniel deziris ĝeni la nervojn

de tiu kuraĝulo, kiu riskis sian vivon en tia hazard-ludo kun tiel malcerta rezulto.

- "Jen li denove !" elbuŝigis multaj spektantoj, kiam li reaperis en la pordotruo, starante tie dum unu momento kvazaŭ por enspiri plenpulmon da pli freŝa aero, antaŭ ol ekpaŝi returne. Sur siaj ŝultroj li portis senmovan korpon.

- "Estas Jem Wilson kaj lia patro," Margaret flustris, sed Maria jam sciis.

La homoj iĝis preskaŭ malsanaj pro la terura situacio. Li ja plu ne kapablis teni sin egalpeza per etenditaj brakoj. Ĉio dependis nure sur nervoj kaj okuloj. Ili rimarkis ke la lastaj restis senmove kon-centritaj pro la pozicio de lia kapo, kiu ne deviis. La eskalo komencis skui sub la duobla pezo, sed li ne turnis la kapon — li ne riskis rigardi malsupren. Ŝajnis daŭri eraon antaŭ ol la transvojaĝo estis plenumita. Fine la fenestro tamen estis atingita. La portanto demetis sian ŝarĝon kaj ambaŭ malaperis el la vido.

Nun la multnombraj spektantoj povis aplaŭdi kaj jubili; ilia aklamego superis la muĝadon de la flamoj kaj la blovadon de la ventego pro la sukceso de la brava entrepreno.

Jen aŭdeblis akrasona krio, kiu demandis:

- *"Sat lo oldul ankore viva o aspektat li ta ?"*

- *"Da,'* rekriis unu el la kaskitoj de supre al la publiko, *"Li bone reaplombiĵat nun as li ricevit ŝprucon de malvarma akwê"*

Li retiris sian kapon kvankam aliaj ardaj enketoj, krioj, kaj ĝenerala bruado kvazaŭ de marondado sekvis la unuan. Sed ne longe. En multe malpli da tempo ol mi sukcesis priskribi la eventojn, la sama kuraĝa heroo denove surpaŝis la eskalon, evidente

kun la intenco savi ankaŭ la viron postrestintan en la senĉese brulanta teksejo.

Li transiris en la sama rapideta sed konstanta maniero kiel antaŭe. La spektantaro nun jam pli libere komentis unu al la aliaj, estante malpli nervo-streĉitaj pro lia antaŭa sukceso. Kelkaj kriis informojn pri la progreso de la incendio je la alia flanko de la konstruaĵo kaj pri la provoj de la fajro-brigado akiri akvon. Estis plu ne same kiel dum la antaŭa silentado senspira. Mi ne scias ĉu estis pro tiu kaŭzo, pro la memoro pri la jame spertita danĝero, aŭ pro tio ke li ekrigaris malsupren, en la momento de enspiro antaŭ ol repaŝi sur la mallarĝan ponton kun la rest-inta persono (eta malpeza viro) ĵetita super siaj ŝultroj, sed la movoj de Jem Wilson montris sin malpli firmaj, liaj paŝoj malpli sekuraj. Li ŝajnis pied-palpe serĉi la sekvan rungon de la eskalo, heziti, kaj fine li eĉ haltis duonvoje. Pluraj homoj forturnis la kapon aŭ fermis la okulojn por ne devi rigardi la minancantan katastrofon; ĝi ŝajnis okazonta. La brava viro ŝanceliĝis tien reen, unue kvazaŭ nur por konservi la egalpezon, sed tiam evidente perdante la regon kaj eĉ sian palpsenton. Estis fakte admirinde kiel la besta instinkto de memkonservado ne sukcesis subpremi ĉiun senton de sinofero kaj inciti lin faligi la senhelpan kaj senmovan korpon kiun li portis. Eble estis la sama instinkto kiu instruis al li ke la subita liberiĝo de tiel peza maso povus esti same granda kaj tuja danĝero.

- “Helpu al mi, ŝi svenis !” kriis Margaret. Sed neniu atentis. Ĉiuj okuloj estis direktitaj supren. En tiu kritika momento unu el la pumpista brigado lerte lanĉis ŝnuron kun glitanta maŝnodo, lazon, super la kapon kaj tiam ĉirkaŭ la du homojn. Vere, estis iom kruda kaj ne fajne ĝustigita lanĉo, sed eĉ malperfekte ĝi taŭgis kiel firmiga gvidilo; ĝi rekuraĝigis la ŝancel-iĝantan koron, la konfuzitan kapon. Ree Jem plu-

paŝis. Lin ne hastigis iu paŝo aŭ ektiro; malrapide kaj laŭgrade la ŝnuro estis revindata, malrapide kaj laŭgrade li povis fari la kvar aŭ kvin paŝojn inter li kaj sekureco. La fenestron li atingis kaj ambaŭ homoj estis savitaj. La homamaso en la strato nepre dancis pro la triumfo; ĝi hurais kaj kriadis ke oni espektus iliajn voĉojn krakontaj. Poste, kun la kapriceco de interesoj, kiun manifestas granda grupo de homoj, ĝi komencis interpremiĝi kaj stumbli, sakri kaj blasfemi, por kiel eble plej rapide eliri la straton kaj reveni al la scenejo de la incendio, kies potenca diapazono de muĝantaj flamoj formis teruran akompanon al la krioj, vokoj, kaj insultoj de la kirlanta amaso.

Dum tiu ĉi maldensiĝis Margaret restis, pala kaj preskaŭ cedanta sub la pezo de Maria — kies korpon ŝi daŭre klopodis teni rektestara, tenante siajn brakojn forte ĉirkaŭ ŝia talio — konstante timante, tute prave, renverson kaj distretadon fare de ne-konsciaj piedoj.

Nun tamen ŝi povis milde lasi ŝin gliti sur la puran malvarman trotuaron. La ŝanĝo de sinteno kaj la diferenco de temperaturo rapide restaŭris la knabin-on al rekonsciiĝo, nun ke la homoj plu ne premis ŝin de ĉiuj flankoj. Ŝia unua rigardo estis malcerta kaj konfuzita; ŝi forgesis kie ŝi troviĝas. La frida malmola lito impresis stranga; la sombre ruĝa lumo en la ĉielo ŝin timigis. Ŝi fermis la palpebrojn por enpensiĝi, re-memori. La sekvan rigardon ŝi direktis supren. La danĝera ponto estis malaperinta; neniu plu videblis en la aperturo.

- "Ili estas sekuraj," diris Margaret.

- "Ĉu ĉiuj? Vere ĉiuj, Margaret ?" demandis Maria.

- "Demandu do al la pumpisto tie; li certe povos diri al ci pli ol mi. Sed mi bone scias ke ĉiuj estas savitaj." La pumpisto tuje konfirmis la parolojn de Margaret.


- “Sed kial vi do lasis non* Jem Wilson iri du fojojn ?”

- *“Lasaj-li ? – Ni eĉ nej povit bremsaj li. Tuj kam li rekonit lo voĉ de sa patrê (ed to nej daŭrit longe) Jem pafit for kel kuglê, dirand nur as li sciit pli bone ol ni ke troveblat lo alja vir. Ni sjus sit pretas iraj, se li nej estintut tel hasta, bikos niu povot diraj as los pumpists de Manchester sat malkuraĝas ĉe danĝer !”*

Tion dirinte li kuris for. La du knabinoj, sen plia rimarko aŭ diskuto, returnis hejmen. Sed ilin paŝ-atingis la maljuna Wilson, tute pala, fulgokovrita, ŝvelokula, sed tamen tiel sana kaj forta kiel antaŭe. Li pasumis unudu minutojn ĉe ili, raportante pri sia en-fermiĝo en la teksejo. Tiam li adiaŭdiris, aldonante ke li devas hasti al sia hejmo por certigi al la edzino ke li estas sana kaj bonfarta. Sed, farinte nur kelke da paŝoj, li abrupte turnis sin kaj revenis al Maria sur la trotuaro. Per intensa flustro, kiun Margaret ne povis ne kunaŭdi, li diris:

- “Maria, se mia knabo alirus vin hodiaŭ vespere, estu afabla al li, je mia intenco. Bonvolu, mi petas, vi estu bona ino.” Maria mallevis la kapon senresponde, sed li jam estis malaperinta.

(…)



Tuj kam li rekonit lo voĉ de sa patrê,
Jem pafit for kel kuglê

09. **La Paroĥo**

Fragmento el la romano *Sognet* de la dana verkisto kaj folkloresploristo **Thorkild GRAVELUND** (1879-1939), kiu forlasis instruistan karieron por verkado kaj folkloragado, apenaŭ konata ekster sia hejmlando.

Specimeno de la dana originalo kun zelanda dialekto:

Knud kørte, Kresten sad ved Siden af. Knud var i det nysseligste Humør over at være med i det lange Optog. Efterhaands fik han Bagvognen fyldt med Fodgængere der laa og stak deres Støttekæppe ud til alle Sider.
- *Jen sku vel åller trov, vi kørte for en Bunke Sosjalister ?* sa Kresten.
- *Ded sku ma jo itte antå,* svarede Knud. *Men ded ka helles nok være. Eller kaske Rebeller ?*
- *Ded kan og være gall nok det.*
(…)
- *Ja, se dær vil a no itt ta Ansvar !* sa Kræn og greb uvilkaarlig efter Tømmen, for Knud kørte uden om en Vogn helt ud paa Veikanten.

La Baloto

En la tago de la baloto la longan vojon kovris polvonebulo kiel interne de malnova muelejo. Veturiloj, bicikloj kaj piedirantoj sin direktis al la alta celo, la tribuno, podio ĉe la trinkejo, el kie sonis laŭtaj paroloj pri la sorto de la popolo.

Knud direktis la ĉevalojn, Kresten sidis ĉe lia flanko. Knud estis en benita humoro pro ties ĉeesto. Iom post iom lia veturilo pleniĝis per piedirantoj, kiuj eksidante disstarigis siajn bastonojn ĉiuflanken.

- *Sat kredeble as ni veturigat socialista band ?* diris Kresten.

- *Nej eblat,* respondis Knud. *Aw toĥ ? Eble eĉ ribelandoj ?*

- *Tel malbone ?!*

- *Da, perfortuls egzistat … mo tus ĉi ja irat voĉdonaj, ka ajn zi estat, ed zi nej havat veturrimed. Lasu zi kunveturaj; ju pli muĉas ni sat hodie, des pli bone.*

- *Tute prave, mo mi ege preferut lo elekt de Per.*

- *Ni vidot, as tu rezistot lo fiadvokat,* diris Knud, kontenta ke Kresten tiel fervore partoprenas la sorton de la distrikto. – *Mi opiniat as elektiĵot tu ĉi Reĝ Salomon – li ja nomiĵat Salomon, vere ?*

- *Povat saj as ci mem sat ribeland ?*

- *He-he, se oni ne sat, oni eble sot ?*

- *To mi nej esperat por ci. Sut fipolitik.*

- *Povat saj. Mo por to necesat anke pluras persons. Ni nej sjus povat faraj lo sole ĝusta politik. Aljakaze ni sjus samopiniut pri sjo kaj niam okazut hio. To sut tro aĉa plezur. Diablês dancu ! Anke egzistu pluraj por fari fipolitik.*

- *Eble bone, mo nur se nej mi respondecot !* diris Kresten kaj li provis kapti la kondukrimenon, ĉar Knud preterkuris alian veturilon preskaŭ ĉe la vojrando.

Sed Knud forte krakigis la vipon plu veturante, ĝis li estis la unua.

- *Aljas respondecu almene won foj. Za afer !*

Kiam la ĉevaloj estis maljungitaj ĉe la gastejo, la baloto ankoraŭ ne estis komencinta. Tial Knud volis, ke ili manĝu la kunportitan nutraĵon por pli bone rezisti la tagon. En la gastejo ili ĉetabliĝis inter aliaj kun tri el la bienlaboristoj, kiujn ili ĵus kunveturigis.

Biero fluis kaj ankaŭ brando. Unu laboristo kunportis botelon, kiun li rondirigis ĝis malplenigo.

- *Tus nej sat nas amiks,* rimarkigis Kresten forirante.

- *Nu, zi almene nej ofendit ni,* respondis Knud.

- *Ante lo vesper zi eble da ofendot sufiĉe per elekt de la socialist.*

- *Da, o Salomon mem,* rikanis Knud.

Homgrupeto staris dense arigita sur la podio, kaj sub tiu vaste ondis homoj. El la grupeto unu krie adresis la publikon kaj el la kontraŭa direkto kelkiuj respondis per interrompoj, ne ĉiuj afablaj. Per Enevoldsen estis kolera kaj ruĝvizaĝa, sed kiel rutina parlamentano li sukcesis diri kion li intencis kaj tiam detiriĝis. Poste sekvis la advokato sub aklamo de multaj fervoraj voĉoj, kaj ankaŭ li oratoris. Li estis tre populara. Li trafe traktis Per rilate al doganaferoj, imposto, armeo, kaj kompromisoj.

- *Ĵus nej parolit-Per militeme, favore al fortikaĵês, kwanke li pli frue argumentit kontre ? Do, parols por la propra gajn ! Mo lo fiadvokat mem certe anke iam akirot grasprofit. Certe !*


Kresten kaj Knud iris al la domo, kie oni starigis budetojn por la voĉdonantoj de la paroĥo Landslev.

- *Nej sit pli ol etbon to, ko Per farit,* diris Knud. – *Fakte, li sat pli kapabla ol to. Se li volut, ni povut sufiĉe ridindigaj lo fiadvokat. Mo sat ja nej facile por kamparan egalnivele traktaj ta ul, kwanke Per sat maljuna vulpê !*

[Laŭ traduko de Poul Thorsen]

10. **Fantomoj por vendo**

Jan DE HARTOG (1914-2002), estas la sola nederlanda verkisto kun vere granda internacia famo, parte pro tio ke li verkis ankaŭ anglalingve. Pluraj el liaj romanoj kaj teatraĵoj, kiuj pliparte temas pri navigado, aperis ankaŭ kiel filmoj. Li havis multajn profesiojn, inter aliaj havenpolicano, kaj estis jam kiel juna knabo tre aventurema vojaĝanto. En Usono li aniĝis al la Kvakeroj pri kiuj li kompilis la historion *The Peacable Kingdom.*



En liaj detektivromanoj ĉefpersonas la inspektisto Bojarski kun tre personaj esplormetodoj, kaj lia superulo, komisaro Pusiat. En *Fantomoj por vendo* tiuj frenezaritme evoluas en la havenurbo Amsterdamo ĵus antaŭ la unua mondmilito, ĉasante la farintojn de same strangaj kiel sangelverŝaj murdoj. Antaŭ ol la inspektisto sukcesas aresti la realan krimulon, li devas malligi multe da kompleksaj nodoj. Ekrolas eĉ fantomoj kaj okazas buĉado inter maljunulinoj de iu hejmo. Feliĉe li sukcesas organizi helpokampanjon en la grandurba krimulmedio, post establo de militpaŭzo inter ili kaj la polico. Roligo de tiu socia submedio havigas al la aŭtoro okazon apliki slangon apud kelkajn dialektajn dialogojn [→ Militpauzo kun la Medio (Gavaro)].

Specimeno de la nederlanda originalo

Hejntje Pusiat wies zich juist de mollige armen onder de pomp, toen het slepend geluid van slofstappen haar het gepapillotteerde hoofd deed omwenden en zij haar zwaarlijvige broeder waarnam die, mompelend onder zijn piratensnor, de grindweg afbeende naar het huis.

- *“Zoa, Wiebe, hedde-ge korte örrekes, man?”* riep zij vrolijk, terwijl ze een natte arm om de nek van de commissaris wierp en hem een smakzoen op het bezwete voorhoofd plaatste.
- *“Morrie Beebee,”* bromde Wiebe Poesiat, *“heb je wat onder de kurk voor een half dooie…?”*
- *“Hedde-ge een zwoare nacht ‘ehad, mien jong ?”*

Komisaro Pusiat dancas kun hejmspirito

Komisaro Pusiat forveturis per la unua trajno al la floranta Betuwe, lia devenregiono, en la senespera intenco je la sepa povi aperi antaŭ la dormanta domo de lia fratino Bebe, kiu komercis pri prunoj.

Hejntje Pusiat ĵus estis lavanta al si la molajn brakojn sub la pumpilo, kiam trenaj pumpaŝoj igis ŝin turni la frizopinglitan kapon kaj ŝi rimarkis sian pezkorpan fraton kiu, murmurante sub sia piratomustaŝo, gambis sur la gruzvojo al la domo.

- *“Nunu, Wibe, vat-ci kurtas hors, vir ?”* ŝi vokis gaje, dum ŝi ĵetis malsekan brakon ĉirkaŭ la kolon de la policisto kaj deponis ŝmackison sur lia transpiranta frunto.

- *“Maten, Bebe,”* grumblis Wibe Pusiat, *“vat-ci hio subkorka por duona mortind ?”*

- *“Vit-ci peza nokt, ma knab ?”*

- *“Mirakle peza nokt !”* la brusto de la komisaro ŝvelis ĉe la memoro. *“Mi pensit as mi frakasut sa panim*, tu porkê !”*

- *“Murdint !?”*

La komisaro momenton rigardis al ŝi senvide. *“Nej, trompist !”* li respondis simple. *“Ci ankore vat cas frizêpinglês surkape.”*

Duonan horon pli poste la kurtenoj zorge fermiĝis antaŭ lito kun la mortema volvaĵo de Komisaro

Pusiat, nun plena je lardaj patkukoj, kaj Hejntje, kurte nomata Bebe, eliris sur la piedopintoj.

- *"Ma frat pasintnokte malvualit trompist,"* ŝi flustris mistervoĉe al la domservisto de la nobelino, kiu vivis en la kasteleto de la vilaĝo. *"Sat lo plej timada policist de l'mondbul !"*

La domservisto ridetis ĝentile, ekprenis la ansojn de la korbo kun boteloj da prunsuko kontraŭ dispepsio, kaj foriris senresponde.

(...)



Sat lo plej timada policist de l'mondbul !

11. **La Teksistoj**



Gerhart HAUPTMANN (1862-1946) estis elstara germana poeto kaj verkisto, kiu akiris nobelpremion. Li estis malsukcesa en siaj studoj pro maltrankvila karaktero, eĉ provis establi sin kiel skulptisto. Sed liaj teatraĵoj, plejparte naturalismaj kaj kun socikritika fono, renkontis daŭre grandan sukceson ĉe la publiko.

La 19-a jarcento en Eŭropo estis tiu de la naskiĝanta peza industrio, kiu vidis aperi socian abismon inter unuflanke riĉegaj kapitalistoj, kiuj posedis maŝinojn kaj uzinojn, kaj aliflanke mizeregaj proletoj kiuj devis tiujn priservadi. En germana Silezio, kie situis konsiderindaj teksentreprenoj, simile kiel en aliaj landoj la maldigna ekspluatado je-de la laboristaro kaŭzis sinsekvajn popolajn ribelojn, unu post la alia brutale dispelataj de registaraj policanoj aŭ soldatoj. Tiu ĉi teatraĵo pentras bildon pri tia lukto el 1844 ĉirkaŭ kelkaj rolantoj kaj ties familianoj.

Specimena teksto el la germana originalo

Pfeiffer (springt mit dem Ausruf) Das möcht ich doch mal sehen ! (nach der Glastür und ruft in's Comtoir) – Herr Dreissiger, Herr Dreissiger, möchten Sie mal so freundlich sein !
Dreissiger (kommt; junger Vierziger, fettleibig, asthmatisch; mit strenger Miene) – Was gibt's denn, Pfeifer ?
Pfeifer (glupsch) – Bäcker will sich das Maul nicht verbieten lassen.
Dreissiger (gibt sich Haltung, wirft den Kopf zurück, fixiert Bäcker mit zuckenden Nasenflügeln) – Ach so, Bäcker ? – (zu Pfeifer) Ist das der …? (die Beamten nicken)
Bäcker (frech) – *Ja, ja, Herr Dreissiger !* (auf sich zeigend) *Das is der* (auf Dreissiger zeigend) – *und das is der.*
Dreissiger (indiquirt) – Was erlaubt sich der Mensch ?!
Pfeifer – Dem geht's zu gut ! Der geht also lange auf's Eis tanzen bis er es einmal versehen hat.

Bäcker (brutal) – *O du Fennigmanndl, halt ock Du Deine Fresse. Deine Mutter mag sich woll ei a Neumonden beim Besenreit'n am Lucifer versehn hab'n, dass aso a Teiwel aus Dir gewor'n is.*

[Akto I – La teksistoj liveras siajn laboraĵojn por kontrolo kaj ricevas "salajron" kompense en la kontoro de Drejsiger la direktoro. Ili ne kuraĝas protesti kontraŭ la almozo kiun ili ricevas, pro timo ke ili entute plu ne ricevos laboron kaj enspezon, tie aŭ aliloke. La aperte ribelema reago de unu el ili, Beker, marksisto, pliposte kondukos al perforta konflikto inter la direktoro plus ties oficistoj kaj la laboristaro.]

Akto II – Moritz Jeger, ĵus reveninta post longa restado en alia regiono, instruas al siaj familianoj kaj kamaradoj novan protestkanton (kiu efektive tiam ekzistis).

Akto III - La kanto rapidege disvastiĝas ĝis la burĝa registaro sentas sin devigita ĝin leĝe malpermesi.

Akto IV – La revolucia etoso eksplodas al amasa perforto. La ribelantoj rompe kaj detrue enpenetras en la vilaon de la uzindirektoro kaj elpelas tiun, liajn familianojn kaj la tutan servistaron. Ankaŭ la paroĥestro, kiu pledis kontraŭ ribelado — pro tio ke Eklezio kaj Registaro kutimis subteni unu la alian — estas mistraktata.

Akto V – Maljuna teksisto, kiu pro religie inspirita submetiĝo al la reganta socia "ordo", ne aprobas la ribelon, hazarde perdas sian vivon en la konflikto.

Por igi sian verkon pleje realisma, Hauptmann paroligas la laboristojn dialekte.]

Elpagotago

[Grupo da gelaboristoj venis al la kontoro por lasi siajn laboraĵojn inspekti kaj ricevi "kompensan" salajron. Najman ricevas sian monon kiel unua]

Najman (teksisto, proteste) – *Mi no povat sat kontenta kun to !*

Rojman (kasisto, sen fari atenton al li) – Hajber, dek arĝentogroŝojn, minus kvin pro antaŭpago, faras kvin arĝentogroŝojn. (etendas la monon)

Hajber (teksisto, antaŭenpaŝas, rigardas la monerojn, skuas la kapon nekomprene kaj hezite enpoŝigas ilin) – *Povra mi, povra mi ! Nu, ja …*

Bomert (maljuna teksisto al Hajber) – *Da da, Franĉjê, to povat naskaj suspirs.*

Hajber (parolante malfacile) – *Vidu, ma vat malsana knabin hejme. Necesut botelet da medicinaĵ !*

Bomert – *Ko do mankat al ŝi ?*

Hajber – *Nu, jam kel beb ŝi sit malforta idin. Mi tute nej sciat … nu, al ci mi povat diraj … tus fikrizês ree ed ree riskat portaj ŝi al lo tombê.*

Bomert – *Preske sje sat sama rakont. Wonfoje en mizer alvenat fiaĵ post fiaĵ. Niam venat halt o sav.*

Hajber – *Ko ci do enpakit en tu tuk ?*

Bomert – *Hejme ni sat preske mortandas pro malsjat. Pro to mi lasit buĉaj na hundet. Mo ve, no sat muĉe da viand, ĝi ja mem sit preska skelet. Sit malgranda saĝa bestet. Mem ĝi mortbataj mi ne povit; mankit al mi lo kor.*

Pfajfer (kontrolisto, dume ekzamenis alian teksaĵon, vokas) – Beker, dek tri kaj duona arĝentogroŝoj.

Beker (laŭte) – *To sat skabia almoz, mo nej salajrê !*

Pfajfer – Tiu kiu ricevis sian monon devas forlasi la ejon. Estas apenaŭ loko por moviĝi.

Beker (samtone al siaj gekolegoj) – *To sat skabia servêmon, nio pli ! Oni devat pedalaj de frua maten til noktêfal ed kam oni dum dek kwar tags sidit kurbida super lo teksil, sjuvespere elĉerpida til swen, duone*

*sufokande pro polvê ed varmeg, tam oni su feliĉa meritaj diks tri ed duonas rats**

Pfajfer – Tie ĉi oni ne voĉumas !

Beker – *Ha, de ci mi certe no lasot fermaj lo fawkê !*

Pfajfer (salte leviĝas) – Tion mi ŝatus ja sperti ! (kuras al la vitroframo en la fono kaj krias en la interno) – Sinjoro Drajsiger, Sinjoro Drajsiger ! Ĉu vi bonvolas veni momenton?

Drajsiger (la direktoro, ĉirkaŭ kvardekjarulo, dikstatura, iom astma, envenas kun severa mieno) – Nu, kio estas, Pfajfer ?

Pfajfer (kaŝmalice) – Beker ne lasas al si fermi la faŭkon !

Drajsiger (impone rektigas sin, levas la kapon, liaj nazaloj tremetas) – Ha, jes, Beker ! (al Pfajfer, fingromontrante) – Ĉu tiu ? (la oficistoj kapjesas)

Beker (impertinente) – *Dada, Sir Drajsiger !* (montrante al si mem) *sat tu* (montrante al Drajsiger) *ed sat tu.*

Drajsiger (mishumore) – Kion permesas al si tiu ulo ?!

Pfajfer – Tiu fartas tro bone ! Tiu dancos sur la glacio tiom longe ĝis ĝi rompiĝos.

Beker (brutale) – *Aĥ, ci kukviret, fermu lo klap anke tu ! Ca patrin kredeble miskondutit kun lo diablê dum balailrajdadz ĉe novlun, por naskaj ta demon !*

Drajsiger (kolerante kriegas) – Fermu la klapon ! Tuje fermu la klapon aŭ … (tremas pro emocio kaj faras kelkajn paŝojn direkte al la sentimulo)

Beker (kuraĝe frontante la direktoron) - *No sat surda. Mi ankore bone awdat !*

Drajsiger (malfacile regas sin kaj ŝajnaferece demandas al la oficisto) – Ĉu tiu viro eble ankaŭ partoprenis ?

Pfajfer – Estas teksisto el Bielau. Tiuj partoprenas ĉie kie okazas miskondutoj.

Drajsiger (tremante) – Mi do avertas ĉiujn: se ankoraŭ unu fojon okazos, ke tia duonebria bando, tia hordo de nematuraj bubaĉoj bruegas preter mia domo, kiel hieraŭ vespere, pompaĉante tiun abomenan kantaĉon, tiam ...

Beker – *Lo "Sangêjuĝ" ci celas, he ?*

Drajsiger – Ci ja scias kion mi intencas diri. Mi do avertas vin ĉiujn: se mi aŭdos tion ankoraŭfoje, tiam mi igos unun el vi elekti kaj – je mia honoro, mi ne spritas – transdonos al la justico. Kaj se mi ekscios kiu inventis tiun abomenan fikanton, tiam ...

Beker – *Sat bela kant, to !*

Drajsiger – Plu neniu komento aŭ mi atentigos la policon — tuje kaj senprokraste. Kun tiaj krimuloj kiaj ci mi ne intertraktas. Mi jam dresis pli spitemajn knabojn !

Beker – *To mi volonte kredat. Ta establida fabrikist, ta vorat ja du- til triĉend teksistês sen turnaj lo man. Eĉ nej won mizera osteto tu preterlasat. Ta person vat kwar stomaks kel bovin ed dentar ka lup. Nej, pri to mi nej dubat !*

Drajsiger (al la oficistoj) – Tiu ulo ricevos plu neniun laboron ĉe ni !

Beker – *Ba, as mi mortot sur teksêseĝ o en strata defluil al mi sat egal.*

Drejsiger – For ! Malaperu !

Beker (firme) – *Wone mi volat ricevaj ma mon.*

Drajsiger – Kiom ricevas tiu animalo, Nojman ?

Nojman – Dek du arĝentogroŝojn kaj kvin pfenigojn.

Drajsiger (haste kaptas la monon el la manoj de la kasisto kaj ĵetas ĝin sur la tablon, tiele ke kelkaj moneroj falas al la planko) – Jen ! Kaj nun ek el mia vido !

Beker (senmove) – *Wone mi volat ma salajrê !*

Drajsiger – Tie kuŝas cia salajro; kaj se ci nun ne hastas eksteren... Estas ĝuste la dekdua... Miaj farbistoj ĵus estas ĉe manĝopaŭzo ...

Beker – *Ma salajrê decat en ma man. Te ĉi devat venaj ma salajrê !* (li frapetas per la dekstra montrofingro en la maldekstra manplato)

Drajsiger (al la oficeja lernanto) – Deprenu la monon, Tilgner.

Tilgner (faras tion kaj senparole metas ĉiujn monerojn en la manon de Beker)

Beker – *Sjo ta devat iraj law lo kutim !* (li metas ĉion en saketon, sen hasti)

Drajsiger – Kaj nun ? Ĉu mi devas helpi cin eksteren?

(Inter la densa grupo de gelaboristoj subite aŭdeblas longa profunda ĝemego kaj homa korpa kolpasas. Ĉies intereso direktiĝas al la nova evento.)

Drajsiger – Kio do okazas ?

Viroj kaj virinoj el la grupo – *Hiu kolapsit – Sat eta malgrasa infan – Sat-to lo granda malsan ?* [tuberkul-ozo]

Drajsiger – Ĉu vere? Sveninta aŭ kio ? (proksimiĝas)

Maljuna teksisto – *Li kuŝat te senmove.* (oni faras liberan lokon kaj oni ekvidas ĉirkaŭ okjaran knabeton kuŝadi kvazaŭ morta)

Drajsiger – Ĉu iu konas la knabon ?

Maljuna teksisto – *Nej apartenat al ma vilaĝ.*

Bomert – *Li similat al los Hajnriĥês.* (ekzamenas pli proksime) – *Da, da, sat lo eta Gustav Hajnriĥ.*

Drajsiger – Kie do loĝas tiuj homoj ?

Bomert – *Nu, super ni en Kajsbaĥ, Sir Drejziger. Lo patrê sat muzikist vespere ed nokte. Dumtage li pendat super sa seĝ kel ĉifon. Zi vat naw infans ed diksa sat survoje.*

Kelkaj viroj kaj virinoj – *Tus homs vivat en granda mizer – Ĉe zi pluvat tra l'tegment – Lo patrin vat nur du ĉemizês por los naw etuls.*

Bomert (provas levi la infanon per siaj malfortaj brakoj) – *Nu, knabet, vekiĝu do ! Ko mankat al ci ?*

Drajsiger – Helpu lin remeti la infanon surpiede. Kia malsaĝo irigi tiel malfortan infanon tiom longan vojon ! Pfajfer, alportu iom da akvo !

Virino (kiu helpas la infanon) – *Nej prenu lo malsan, ocjê, prefere mortu !*

Drajsiger – Aŭ konjakon, Pfajfer. Konjako estas pli taŭga.

Beker (kiu staris observante, nun metas manon sur la pordoklinkon kaj krias laŭte kaj moke) – *Donu anke hiom por manĝaj; to muj rapide sanigot li !* (li iras for)

Drajsiger – Tiu bubaĉo finos malbone. – Prenu lin subbrake Nojman – Malrapide … malrapide … tiel .. jes. Portu lin al mia kontoro.

Nojman – Li provas ion diri, Sinjoro ! Li movas la lipojn.

Drajsiger – Kio do ? Kion ci volas, knabeto ?

Knabeto (per malforta voĉo) – *Mi… mi … ege malsjatat !*

Drajsiger (mientorde) – Oni ne povas kompreni lin.

Virino – *Mi kredat as li dirit …*

Drajsiger (haste interrompante) – Ni jam vidos, enportu lin ! Li povas ripozi sur mia sofo. Mi petos la kuraciston klarigi.

(Drajsiger, Nojman, kaj la teksistino portas la knabon al la privata ejo. Estiĝas ioma malordo inter la gelaboristoj, kvazaŭ en lerneja klaso kiun ĵus forlasis la instruisto. Oni streĉas kaj movas sin pli libere, tretas de unu piedo sur la alia, komencas flustri ĉiam pli laŭte, ĝis ĉiuj bruegas.)

- Kurteno -



Oni devat pedalaj de frua maten til noktêfal

12. **La provizora restado de Nifarand**

Inter la multenombraj libroj, eseaj kaj fikciaj, de la nederlanda verkisto **Adriaan Michiel de Jong**, sendube plej furoras liaj ok rakontoj pri Meroĉjo Gejsen [Merijntje Gijzen], kampara knabo tute naiva kaj spontana kaj ties travivaĵoj kun plen-kreskuloj, spertoj kiuj foje rezultas en tragedio. La fonon de liaj travivaĵoj liveris propraj memoraĵoj de la aŭtoro el sia junaĝo. Kio pleje interesas nin estas, ke la dialogoj en tiuj ok verkoj ofte aplikas la dialekton de la provinco Brabant.



En la volumo pri Nifarand [*Flierefluiters Oponthoud*], sen-dependa vagabondo, Meroĉjo iĝas mesoservisto de la vilaĝa katolika paroĥestro. Kiam oni malkovras ke la sakristiano, prizorgisto de la preĝejo, ŝteladas monon el la oferujoj, kie fideluloj deponas kontribuojn, oni tiun hontige forpelas el la vilaĝo. Portempan anstataŭanton la pastro trovas en la gaja Nifarand, kun kiu li, same kiel la juna knabo, forte amik-iĝas. La vagemulo, el sia vivofilozofio, provas relativigi la amaran kulposenton de Meroĉjo pri senvola perfido okaz-inta en la antaŭa volumo, same kiel pri religiaj mis-konceptoj de la infano.

Sed kiam la maljuna paroĥestro mortas, Nifarand kon-sideras siajn taskojn kaj devojn finitaj; li denove vagas for. Por la knabo tio konsistigas duafoje amaran perdon de ŝategata amiko.

<u>Specimeno de la nederlanda originalo</u>

- *Edd' op 't pelisiebero gezete ?* vroeg moeder vol schrik.
- *Joa, meins … tot vanoaved allef acht toe … Toen… joa, da roaid' in duzend keere nóg nier … toen is Bets gekomme om me t'oale !*

- Je vrouw ?
Verstomd keken de Gijzens hem aan. Flierefluiter lachte ruw.

Geedza Kverelego

Nifarand rakontis plu. Lia moktono iom post iom transformiĝis al seriozeco. La profunda ĉagreno de lia malvenko, lia plendinda malsukceso ekkapti feliĉon en fine trankvila, ordoplena interrilato [kun la junvirino Bets, lia ĵusa edzino] denove regis lian pensadon kaj igis liajn parolojn pezaj pro kontrolata malĝojo kaj detenata kolero. Ke ŝi de tempo al tempo kokris lin kun tiu aŭ alia virulo … aĥ, tion li estus povinta al ŝi pardoni … li, kun sia propra pasinteco, estus ja la lasta por tial misrigardi virinon … li bone povis kompreni tiun ne venkeblan sopiron al incitaj aventuroj kaj povis okulon fermeti … virino kun tiel arda sango kaj liberama naturo … Sed kun Bets statis aliel. Ŝi havas malnoblan karakteron; akiravidan. Ĉio ĉe ŝi fariĝis avido. Nenion ŝi donis, neniam. Eĉ kiam ŝajnis kvazaŭ ŝi estus ĉion donacanta, ŝi nur akaparis. Ĉio estis nure por ŝia plezuro, por ŝia volupto, gajno por ŝi … ŝi trompis ĉiujn; la amantojn unuavice … ŝi uzuris kun sia tieldira amo samege kiel kun sia malpura fimono. Ŝi ne havas koron, por neniu kaj nenio. Senpasia kalkulemo, ardege besta deziro, mono kaj sensoj, neniam io alia. Diablino …

La maniero per kiu ŝi elsuĉis la sangon al tiuj ŝimaj malriĉuloj en la kvartalaĉo, estis tiel abomena, tiel ne direble dura kaj kruela, ke oni ektimus. Ŝi mokis onin, kiam oni klopodis mildigi ŝin. Kompaton ŝi ne konas …

- *Kel povit-ci eltenaj tel longe ?* miris Gejsen [la patro de Meroĉjo]. *Mi pensat as mi sut ŝon delonge frakasind' al ŝi lo cerbê.*

- *Mi ja tro muĉe amit ŝi,* respondis Nifarand senespere. *Jen lo malfeliĉ. Furioza mi foje sit, furioza por sjo dispecigaj, mo kam m'alrigardit ŝi, tam sjo denove forfandiĵit… Dum ma tuta viv mi sit mokinda pri tas afers: al mi niam hio ta povut okazaj… Mo kam oni sat kapt-ida, oni sat kwaze ŝafid… to mi nun sciat… Ed se mi hodie ne sut trafinda ŝi ĉe l'klopod delogaj Meroĉ, tam mi denove reirut al ŝi kun pendandas orels… Mo to mi nej kapablit englutaj… Pro ko, mi fakte mem nej komprenat. Ja, pro ko gravut ? Meroĉ nej sit lo wona, ed li anke ne sot lo lasta… Mo li sit tele senhelpe timanda, tu knab, ed ŝi tel sjorompe malmorala, as mi subite plu nej kapablit eltenaj l'afer… Defalit ŝton de ma kor.. o no: sit kwaze oni deprenut de mi mankatens… Nomdedi, kel mi batregalit ŝi …!*

Li rikanis, kun fiksa rigardo, la pugnitan manon antaŭ si sur la tablo.

- *Nu, anke ci mem ricevit porci !* diris Gejsen.

- *Ŝi nej sat katid ku oni povut karesaj sen gantês,* grimacis Nifarand. *Ni interbatalit kwaze leons ed ursês… Tuta sa aĵar disflugit til pecets ed lo stratet sit en kirlê kaj tawzê… Necesit eĉ kwar policists por kondukaj mi al l'oficej.*

- *Sidadit-ci en lo policej ?!* demandis la patrino, ektime.

- *Da, virin… til hodie vespere je l'oka kaj duon… Tam… nu, to vi nej divenut en miljas jars… tam venit Bets serĉaj mi !*

- *Ca edzin ??*

Konsternite la geedzoj Gejsen rigardis lin. Nifarand ridis krude.

- *Ĝuste, ma virin ! Ŝi jelpit. Ŝi volit rehavaj sa vir. Sit nej tele drame intencida. Ed sit ŝi ku komencit… Kurte, l'inspektist ridit al si apopleksi ed lasit mi foriraj. Braken-brake ni paŝit al ekstere… Okazit tel ĉi: na*

montroŝrank antee falit ed ŝi nej kapablit restarigaj ĝi. Aljul ŝi nej fidit por to, bikos sa mon kuŝit en won el los librês… Nu… mi helpit al ŝi …!

Li eksplodis per ridoj; preskaŭ ne povis rekvietiĝi.

- *Nu do ?* demandis Gejsen, scivolege.

- *Nu, vir,* rideksplodis Nifarand – *kam mi sit restariginda lo ŝrank, mi kaptis tu librê kune kun sjus los bilets ed ŝtopit zi en lo fornê ! Mi ŝon vidit muĉas afers en ma viv, homs, mo ta furi ka tu fivirin, kam ŝa fortun ekflamit, to sit ankore hio nova por mi. Ŝi alsaltit mi kwaze rabia kat, ed kam ŝi nej povit venkaj, ŝi ruliĵit sur lo plank, ed denove kunkriegit los najbars; ŝi batadzit per los pugnês sur lo plank, ŝi elŝirit sa harar. Sit anke monkestet kun florens ed regnotalers… tus mi disĵetit en lo stratet… Tam ŝi swenit lo wona foj en sa viv… Ed mi forpelit mas piedês. Mo antee mi rakontit al los najbars, as zi bezonot redonaj al Bets plu nej duonspes, bikos sjus ŝuldopruvês sit forbrulindas. Mi vetut ma kap as lo tuta stratet ĉimomente sat festanda ed as zi sot ĉivespere ebrias kel turbês.*

Ree li ridis tondre kaj Gejsen tutkore lin aprobis.

- *Blasfemudi ! … jen denove malnovmoda rakont de Nifarand !* li kriis ridegante.

Sed Panjo Gejsen ne ridis kun ili. En siaj gamboj ŝi sentis teruron tremadi pro tiaj vivkondutoj. Ke io tia povas ekzisti ! Tiaj fivirinoj ! Tia besteco ! …

- *Ed ko nun ?* demandis ŝi, kiam la viroj iom trankviliĝis. *Hiam ci ja devot reiraj al sa edzin ?*

Nifarand dorseniĝis for de la tablo, kun ŝirme etenditaj manoj kaj kun mieno kiu esprimis plej grandan abomenon.

- *Reiraj ?* li kriĉit. *Plu niam en ma viv…! Nun ni sat definitive kwitaj ! Mi turnat los kalkans ed ŝi povot*

serĉaj alja povrul por gardaj sa dom bonfasona… Vidu, mi denove ekserĉit ma olda amik ed per-laborandil !

Li allumen tiris sian malnovan fluton, muntis la pecojn kaj volis ekludi. Sed liaj masakritaj lipoj ne permesis eligi tonon el la instrumento. Suspirante, li rezignis.

- *Sat rapide finite,* li rimarkis, farante mizeran provon ekridi. *Se sjus vundês tel rapide resaniĵut, kel tus ĉi, tukaze sut facile elteneble, nej vere, Mariet ?*

Li okulumis al ŝi per la sana okulo kaj ŝi preskaŭ kredus ke staris larmoj en ĝi. Sed li laŭte ekridis, batis per la manplato sur la tablon, jubilante:

- *Vivu lo ĝoj ! Ni suririot lo ŝtatŝose ed postlasot sjus cerbumaĵês ! Irat nio super liberec… ed mi komprenat to nun pli bone ol hiam antee !*



Vivu lo ĝoj !

13. **La Nekonata Soldato**

Väinö LINNA (1920-1992), finna verkisto de pluraj realismaj romanoj pri la sensenceco kaj hororo de militado kaj de militarismo. Li mem partoprenis kiel serĝento en la milito inter Finnlando kaj la Sovjet-Unio, aliance kun la germanaj armeoj, en la espero definitive liberigi sin de la konstantaj minacado kaj subpremado fare de la rusa urso.
En sia plej sukcesa kaj ankaŭ eksterlande fama kvazaŭa aŭtobiografio *Tuntematon Sotilas* (La nekonata soldato) li pentras en flamaj koloroj, sendetene, ne nur la teruraĵojn mem de ofensivo ĝis malvenko, sed ankoraŭ pli la ofte konfliktajn rilatojn inter simplaj soldatoj kaj iliaj oficiroj, inter pacamantoj kaj batalamantoj, inter heroeco kaj malkuraĝeco. La antimilitarismo de liaj verkoj paralelas tiun de E.M. Remarque kaj similaj. Lia ĉefromano, el kiu sekvas ĉerpaĵo, kaj postaj kaŭzis en lia hejmlando ardajn disputojn en ĉiuj tavoloj de la socio, tielege ke la sufiĉe ĝenerale reganta nacifiera batalemo — bazita sur mitoj kaj hipokriteco — ŝanĝiĝis al sobre realisma pripensado de celoj kaj valoroj. Liaj temoj enfunde estas la universalaj problemoj de la homaro koncentritaj en finnlanda kunteksto. Ankaŭ tie ĉi aplikado de dialekto igas la tragedian historion pli versimila.

<u>Specimeno de la suoma originalo</u>

Talvi kului ja tuli uusi kesä. Saksan tappio alkoi tulla yhä näkyvämmäksi, ja vain Salo jaksoi yhä uskoa. Häntä eivät Italiankaan tapahtumat järkyttäneet. Toiset vähän kiusailivatkin hänen hyvää uskoaan ja jokaisen turmanviestin jälkeen sanottiin:
- Eiköhän olisi aika ottaa uudet aseet käytäntöön.
Salo katsoi yli toisten päiden jonnekin kauaksi ja sanoi:
- Tarpehen tullesa. Taropehen tullesa … Ne päästää lähemmäksi ja tuhuaa vasta sitten sen. Ja sinne on kuulemma tuotu kaheksantuumasia tuonne taskse. Kyllä lähtee rautaa jos se alkaa törmäämähän.
- Ai perkele … No sit ei ook hättää ..

Niin sanoi Rokka, ja Salo jaksoi vielä epäillä, oliko sittenkään ivaa.

Ĉu Disciplino ?

La vintro forpasis kaj nova somero alvenis. La malvenko de Germanio komencis akiri ĉiam pli netajn konturojn. La sola kiu ankoraŭ kredis je venko, estis Salo. Eĉ la okazaĵojn en Italio ne sukcesis ŝanceli lian fidon. La aliaj tial iam tiam dancigis la paljason pri lia naiva kredemo kaj post ĉiu senkuraĝiga novaĵo li devis aŭdi de ili: *"Nej iĵat urĝe as los Germans funkciigu sas novas armils ?"*

Tiam Salo faris seriozan mienon kaj enpensiĝis: *"Nu, se vere necesat … mo vere, sciu … Mo zi sat ekstreme taktikas, sciu … zi lasat los Rusês tute proksimiĵaj, ed tam subite zi sot enskatoligidas … Memoru mas parols!"*

Ĉe Rokka rimarkeblis simptomoj de silenta amareco kaj profunda seniluziiĝo. Li nun sciis, ke la ekstra enspezo akirita per la ringoj estos vana por la konstruo de nova farmbieno sur sia terpeco en la sudkarelia istmo. Li tamen neniam plu sukcesus establi sin tie. Laŭgrade kiel tiu konvinko firmiĝis en lia kapo, li komencis demonstri iun acerban ironion pri la furora konstruado de bunkroj laŭ ordono de la komandejo.

- *"Zi farigat komfortas seĝês el traboj. Kredeble zi pensat as ni povot te ĉi pasigaj lo tuta viv ĉe l'kamen !"* li mokdiris al la kamaradoj.

En la somero de 1943, iun tagmezon, kiam li devis gardostaradi, li okupis sin apliki ornamaĵojn al lampopiedo fasonita el nuksoligno. Unu el la oficiroj kredis povi "ekkapti" lin ĉe tiu laboreto, sed tio estis la kazo nur en liaj propraj okuloj. Rokka tre bone vidis lin alveni, sed li faris neniun provon kaŝi sian

laboraĵon. Tiu superulo estis iu armea inspektisto, kies tasko estis ekzameni multajn aferojn pri ilia taŭgeco kaj skribi pri tio pezajn raportojn, kiujn apenaŭ iu legis sed baldaŭ translokigis al dosiero, en kiu ili zorge restis klasitaj. La koncerna oficiro ne agis alimaniere ol oni atendus de averaĝa suoma oficiro kaj do ankaŭ ne scipovis elbuŝigi ion alian ol sekan:

- "Kio-estas-tio ?! Kaj kio estas cia tasko ?"

- *"Mi sat gardêstarand ed tu sat hiu ku oni ne tuje albojat,"* Rokka tuje remordis, ĉar la tono per kiu la superulo esprimis sin lin agacis. Spiteme li restis sidanta kaj daŭrigis sian artlaboron. Tamen, iam tiam li atente rigardis tra la periskopo.

- "Diru, uleto, pri kio ci do okupiĝas ?"

- *"Mi prilaborat lampêpied... nej vidat-ci to ? Mi ja pensat as tu objekt jam bona form alprenit. Nu, ĝi fariĵot egzempler montrinda. Ci povat aĉetaj ĝi, se ci dezirat."*

- "Ĉu ci do ne komprenas, kio estas cia devo kiel gardostaranto ?"

- *"Jen pri ko mi teldire cerbumat tag' ed nokte... Por ko mi cetere te ĉi sidadzut ? Ci ja certe mem vidat sen demandaj as mi sat gardostarand, ku dawre rigardat tra lo periskop. Por to oni ja dungit mi."*

- "Cia nomo ?"

- *"Rokka... Anter. Aljas antenoms mi nej posedat."*

- "Pri tio ci ankoraŭ aŭdos novaĵojn !" La majoro formarŝis. Trankvile Rokka daŭrigis sian duoblan laboron — li gardostaris kaj pritranĉis lignon. Post la deĵorŝanĝo li ne parolis pri la okazintaĵo en la bunkro kaj ankaŭ estis konvinkita, ke la minaco de la oficiro ne havos konsekvencojn, des malpli ĉar li plu nenion pri ĝi aŭdis dum du tagoj. Tamen, li estis tro optimisma en siaj atendoj ĉar, post forpaso de tri tagoj,

Korkela telefone ricevis komandon de Kapitano Lammio, ke li sendu non* Rokka kaj ties grupon al li por purigi la ĉirkaŭaĵon de la komandoturo kaj por ornami la randojn de la bunkrovojetoj per rondaj ŝtonoj.

Koskela ne tre bone komprenis la celon de tiu superflua tasko, ĉar eĉ al li tio ŝajnis stulta. Li do respondis tra la telefono kun malkomforta antaŭsento: "Bone, mi transdonos la ordonon."

"Transdoni" ĉe Koskela signifis ke li ne plene aprobas la ordonon, kaj tion li ankaŭ klare montris, kiam li komunikis al Rokka kion oni postulas de li.

Rokka silentis kelkajn momentojn kaj tiam, trankvile sed decide, diris al siaj kompanoj: *"Tu ku dezirat plenumaj lo ordon, iru, mi nej intencat…"*

- *"Mi nej irot sen na grupestêr,"* sciigis Rahikainen. *"Kel ni, simplas knabs, faru hio sen direktadz? "*

- *"Rundas ŝtons, li dirit ? Hihihi !"* Vanhala ridis nur sen fari movon por plenumi la ordonon.

La sinteno de Urskrura estis eksterduba. Por li validis nur la ekzemplo de Rokka, lia granda kamarado kaj protektanto.

Koskela atentigis la kapitanon, ke la grupo rifuzas plenumi la ordonon, kaj li emfazis ke li persone ne intencas fari pli en tiu afero ol devigas lin lia pozicio kiel suboficiro: transdoni la ordonon kaj raporti pri la rifuzo. Lammio nun ordonis al Rokka veni al li en la kompania komandejo.

- *"Kal ne,"* komentis Rokka, *"mi irot."*

Survoje li zumkantis, ie tie haltante kaj plukante ruĝajn berojn laŭlonge de la vojo. Tiel li bezonis plenajn du horojn por la iro kaj, kiam li fine atingis sian celon, Lammio estis eksplodonta. Rokka vigle eniris la bunkron kun plena rezignemo, deponis sian

ĉapon sur la tablon kaj eksidis sen invito. Li ankoraŭ tenis kvin herbotigojn en la mano sur kiujn li arigis berojn, de tiuj ĉiufoje deprenante unu kaj puŝante ĝin en la buŝon dum la konversacio. Antaŭ ol la kapitano trovis okazon por ion diri, li jam demandis: *“Nu, ko do pezat sur ca kor ?”*

Lammio konsilis kelkajn momentojn ĉe si mem, kiel plej bone manipuli la aferon.

- “Aŭskultu, Rokka,” li diris. “Ci ŝajnas serioze serĉi konflikton kun la armea disciplino.”

- “Nej komprenat ko ci celat. <Konflikt> sat klera vort – mo eblat ĝi manĝaj ? Prefere parolu klare suome kun mi. Mi sat nur eta farmist el lo terlangê ed ta klera rezonadz mi nej komprenat.”

- “Tiukaze mi eksplikos pli klare. Ci faras kvazaŭ la armea disciplino tute ne koncernas cin kaj tion mi ne ŝatas.”

- “Anke vat niu afer kun to.”

- “Ĉu vere? Nu, tion oni do rapide enkapigos al ci !”

- “L’arme certege nej instigot mi ekkaptaj sorĉista hors!”*

- “Sorĉista horso? Ĉifoje estas mi kiu bezonas klaran suoman vorton.”

- “Ci nej sciat ko sat sorĉista hors ? Ja signifat balail ĉe vi te supre. Ed ko sat nun prava, pensat-ci ? Lo sensalec sat-ĝi severa o nej ? Pri to ni, simplas soldats el orient ed okcident, jam diskutadzat lo tuta milit, sed sen akordiĵ.”

- “Mi ne estas specialisto pri dialektoj. Mi estas cia kompaniestro kaj mi havas la intencon instrui al vi ĉiuj ke ankoraŭ regas tie ĉi io kia armea disciplino !”

- *“Kaptu ĝi lo diablê ! Mi balau lo bed ed ornamu lo voja rand per ŝtons. Ko fakte blovit en ca kap, kam ci venit al ta ide?”*

- “Rigarde al oficiro, kiu faris inspekton tie ĉi, ci kondutis arogante. Mi ricevis tiun informon kaj la ordonon puni cin. Tamen, punon mi ne opinias celtrafa. Do, por elprovi cian obeemon mi elektis tiun tasketon. Se ci rifuzos, mi devos irigi la okazaĵon pli supren. Kaj mi celas cian tutan grupon, ĉar tiu cin egalas. Jen la fruktoj de cia ekzemplo. Cia antaŭulo, la suboficiro Lehto estis samkaraktera kaj fuŝis la internan ordon. La soldatoj iĝis miskondutaj kaj obstinaj.”

- *“Ed ci vere kredat as mi obeot to ?”*

- “Mi ĉiel ajn ege konsilas tion. Ci staras senpova kaj izolita. Kun cia impertinenteco ci sukcesos nur tiom longe kiom oni toleros. Kaj pri tio nun estas fino. Definitiva fino !”

- *“Ci kredat as mi timat ?”*

- “Ho, tute ne ! Mi agnoskas cian kuraĝon, ĉar mi mem tion havas. Sed ci postulas por tiu sinteno jam delonge ekscesan prezon. Mi jam pli ol sulfiĉe toleradis. Estas mia espekto* ke ci tamen montros prudenton. Ciaj batalmeritoj povus fari el ci portanton de la plej alta honormedalo, se ci estus same kavalireca ankaŭ aliloke. Se ci kondutus kiel decas al soldato, precipe vide al ciaj superuloj, la honorkruco estus cia tiel facile kiel oferto de cigaredo. Multiuj jam akiris ĝin, kiuj faris malpli ol ci. Mi perfekte scias ke ci savis la batalionon el danĝera situacio antaŭ du vintroj, kaj eble protektis ĝin kontraŭ kompleta neniigo. Mi do cedas volonte ke ci estas la plej taŭga viro en bataloj kiun mi iam renkontis, kvankam mi jam vidis plurajn kuraĝegulojn. Sed plu ne kredu ke tio sufiĉas por ebligi ĉion !”

Ree Rokka plukis kelkajn berojn de siaj tigoj. Duonserioze li respondis: *“Nu do, faru el mi honormedalul ! Tus ja ritsevat mon !”*

- “Mi jam diris ke tio nun plu ne eblas. Estus honorigi malobeon kiel modelon. Cia impertinento estas pli danĝera ol moki la armeon, kiel permesas al si Honkajoki, kaj al kio mi cetere ankaŭ metos finon. Mi jen donas al ci la okazon por ripari. Prezentu cin kun cia grupo tie ĉi kaj plenumu la ordonitan taskon.”

- *“Mi nej venot !”*

- “Tio signifos Milita Tribunalo !”

- *“To signifat ankore muĉe pli. Komprenu, anke mi pripensit kelkas afers.”*

La gaja senzorgo de Rokka subite malaperis. Lia tuta korpo komencis tremetadi. Lia voĉo altiĝis pro kolero, kvankam li flanktordis la buŝon al speco de rideto: *“Mi volat hio al ci diraj. Per mi ci nej povat ludaj. Ci pensat as ci povat al mi rompaj lo nuk. Mo to ne sukcesot al ci, ed al niu alja nej ! Ma edzin, sciu ed bone awskultu, ma edzin ku atendat infan, tu devat hejme sur lo terlang mem falĉaj lo sekal, vira labor ! Ed ci, kompatinda idiot, ci volat devigaj mi te ĉi deponaj ŝtonets lawlonge de l’voj ! Do pensat-ci, satan, as ma pacienc niam venat al fin ? Tuta jar mi fajladzit ringês por hiom da mon perlaboraj, mo sju tu mon perdida sat por lo nova dom, ku mi niam vidaj povot, se los ruĝuls rekonkerot lo terlang. Ed nun mi provat ĉizeladzaj lampêpieds por akiraj hiom da enspez en lo esper uzaj to post lo milit. Mo malante nas dorsês te oni starigat admirindas komandejs, mebêls ornamidas per pirografaĵ. Ed los gazets tam ricevat bildês de taspeca bunkêr <ku los virs de lo divizi konstruit por sa adorada komandant>”. Nu, kal tus nej konstruut se zi ricevat tu ordon ? Nur mi, mi nej intencat en to partêprenaj. Su certa pri to ! Nej vidat-ci kee sjo to kondukat? Kredat-ci los Rusês pensat: <Nur lasu tus*

sidadzaj en su nest tom longe kom zi dezirat ?!> Plu nej dawrot longe ol ni sidot en lo fekaĵ kel niam antee ! Certe duon el ni borot lo naz en lo grund ed vi koraks de malfeliĉ nur paroladzat pri disciplin ed disciplin. Se vi oficirs intencat dawrigaj tu ludet ankore longe, vi devot egzekutaj muĉas virs ankore. Mi ripetat, nej ordonu al mi vicigaj cas ŝtonets. To ko postulat lo milit, mi farot senproteste, mo tas ludets mi nej partêprenot. Ed nun faru ko ci volat. Irigu mi ante lo milita tribunal, se plaĉat al ci. Mo bone enkapigu as mi no lasot mi mortpafaj kel hund ! Vi egzekutit tus du soldats te je lo sawna mur. Kun mi vi to no farot sen as tu o alju wone pasot lo barier. Notu to dre cas orels; nun mi irat !"

Rokka ekkaptis sian ĉapon, levis falintan bertigon de sur la planko, kaj formarŝis. La kapitano silentis. Li ankaŭ ne estus povinta respondi ion; tiel rapide Rokka malaperis el la bunkro. Lammio sentis sin malcerta. La honesta kaj profunda kolero de Rokka, spite ĉion, iom lumigis al li pri la reala situacio. Plurajn momentojn li restis senhelpa kaj senkonsila. Laŭ la paroloj de Rokka ŝajnis al li sencele daŭrigi la konflikton. Sed poste venis al li dubo ĉu Rokka nur pretendis kaj prononcis vanan minacon, malgraŭ lia firma sinteno. Strangis ke la kaporalo, ĵus antaŭ sia malapero ankoraŭ eklevis la tigon kun ruĝberoj. Tiu penso redonis al li firmecon. Klare, la viro estis kuraĝega, sed jenkaze li provis elturniĝi per blufo. Li ne estus rimarkinta la falintajn fruktetojn se lia kolero estintus reala !

Lammio faris kontakton kun Sarastie, skribis raporton kaj proponon pri taŭga puno. Unue la majoro estis sendecida, sed la kapitano insistis, turnante la situacion favore al si, ĝis kiam Sarastie cedis kaj ordonis ke Rokka prezentu sin la postan tagon en la komandejo, kie oni lin esplordemandos kaj redaktos punprotokolon. La majoro tamen scipovis pritaksi la famon de Rokka tiel pozitive kiel negative. Tio lasis lin

suffiĉe longe en embaraso. La motivo de Lammio kompreneble estis tute prava. La aroganteco de la viro estis ĝenerale konata. Ankaŭ la okazintaĵo kun la inspektisto ne estis unika. La rakonto pri lia mok-reago jam disvastiĝis inter la soldataro kun granda admiro. Danĝeran ekzemplon liveras tiu virego. Sed ĉu la kontraŭa ekzemplo estus malpli danĝera ? En bataloj Rokka estis sendube la plej elstara soldato de la bataliono. Ankaŭ tiurilate li estis efektive legenda. Ĉu estus tial pravigeble sendi lin dum pluraj semajnoj al la aĉaj fosadlaboroj en la marĉoj kaj forpreni liajn honorinsignojn ? Kiun efikon tio produktus je la sol-dataro ? Ĉagrenis lin, ke li lasis la kapitanon okupi sin pri tiu kazo. Celo kaj rezulto certe fuŝiĝus se oni provus humiligi tiun heroon per punlaboro.

Sed aliflanke la majoro sentis personan ofendiĝon. Estis tiu sento kiu finfine igis lin konsenti al la propono de Lammio. Ĉe inspektado lia bataliono je ĉiu kosto ne aperu malinda !

[Laŭ germana traduko]



Mi sat gardêstarand ed tu sat hiu
ku oni ne tuje albojat.

14. **Normandaj Rakontoj**

Louis Octave MAILLOT (1861-1949), franca licenculo pri beletro kaj profesoro pri la angla kaj pri filozofio, apartenas al malgranda grupo de verkistoj kun profunda intereso por la normanda lingvo, kiun oni ĝenerale konsideras kiel unu el la dialektoj de Francujo, sed kiu pro sia longa historio skriba kaj parola meritas pli dignan statuson — jam la fama Kanto de Roland estis en ĝi skribita kaj multaj ĝiaj vortoj miksiĝis kun la anglosaksa en Anglujo.
Bone scipovante la normandan, li dum jaroj kolektadis rakontojn, nur parole transdonataj en la regiono, seriozajn kaj amuzajn, kiujn li kunigis en la du volumoj de sia "Rakontaro", eldonita de R. Guénot, Vire, Francio 1937. Ili atestas pri atentoplena observado de la moroj de liaj samtempanoj, pri ilia agrokultivada vivo.
Mi elektis kiel demonstron unu el la komikaj eroj, kiujn li aperte redaktis kun iom moka okulumo al la legantoj.

Specimeno de la franca originalo

En voyant Courtignon coiffé de la marmite, en un clin d'oeil il saisit la situation dans toute son horrible simplicité.
- "Vous voyez, Médéric, dit le maire, Mr. Courtignon a la tête prise dans la marmite. Que faire ?"
- *"M'est avis,"* dit Médéric, *"que devant que de casser la marmite an devrait essayer de l'arracher. Piésque la tête est entrée, o devrait ressorti."*

La Marmito

[Sinjoro Courtignon, emerita impost-kolektisto, ĵus aĉetis de ruza farmistino, Panjo Kvar-Eskudoj, je multe tro alta prezo malnovan kaj malpuran marmiteton kupran, por aldoni al sia kolekto de antikvaĵoj el agrokultivado. Sed, portante ĝin hejmen, li stumblas tiamaniere ke li falas kapon antaŭen en la marmiton, kaj plu ne sukcesas libergi sin mem el tiu stranga kapornamo. Feliĉe venas

al li renkonte juna kamparano kiu pretas konduki lin al la forĝisto por disbatigi la metalpoton.]

Courtignon, kroĉita al sia gvidanto, ripetis per sufok-ita kaj plenda voĉo:

- "Haste konduku min al la forĝisto."

- *"Lasu ni trairaj !"* kriis Cabuche. *"Disiru de l'voj, ekstaru flanke !"*

Ili ne flankenstaris. Courtignon, trenata de Cabuche, puŝbatiĝis ĉiupaŝe kontraŭ scivolemulojn; kaj pli-parto el ili ne flankeniris antaŭ ol esti frotiĝinta je la malpura marmito de Panjo Kvar-Eskudoj.

La iron tra la homamaso, el kiu leviĝis intermikse kompatoĝemoj, elkrioj, kaj sarkasmaj ridoj, kostis al Courtignon kaj al Cabuche kvin karajn minutojn — oni ne eniras forĝejon samkiel muelejon. Penetrante en la metiejon, ili tie ne trovis la metiiston je kiu esperis Courtignon por liberiĝi el sia kasko. Médéric, la forĝisto, ĵus estis hufoferuminta la ĉevalinon de bredisto el la ĉirkaŭaĵo kaj, post tiu operacio sufiĉe fortostreĉa por la metiisto same kiel malagrabla por la juna kaj vigla besto kiu tion spertis unuafoje, li estis irinta al najbara trinkejo. La edzino de Médéric kuris tien.

- *"Oni petat ci, Médéric, venu preste !"*

- *"Oni petat mi… Ku petat mi ?"*

- *"Sir Courtignon. Li bezonat ci. La kap sidat en marmit. Necesat as ci rompu ĝi…"*

- *"Rompaj al li lo kap ?!"*

- *"No, lo marmit. La kap enestat ed …"*

- *"Nu, as li eltiru ĝi !*

- *"Li nej kapablat. Venu preste rompaj lo kaldron, aljel li certe sufokiĵot !"*

Kvankam Médéric tute ne ŝatis engluti kafon kiel medicinaĵon, li malplenigis sian tason per unu gluto, viŝis al si la lipojn per la mandorso kaj, grumblante, postkuris sian edzinon.

Vidante non* Courtignon ĉapelumita per la kuirpoto, li ektaksis la situacion en tuta ĝia terura simpleco.

- "Kiel ci vidas, Médéric," diris la vilaĝestro, "la kapo de Sinjoro Courtignon estas kaptita en marmito. Kion fari ?"

- *"Mi pensat,"* diris Médéric, *"as ante ol batrompaj lo marmit ni devat klopodaj eltiraj li. Se la kap povit enîĵaj, ĝi anke devut povaj eliraj."*

- *"Komprenat-ci, Sir Courtignon?"* demandis Cabuche.

- "Neeble !" ĝemis Courtignon. "Rompu, haste rompu la marmiton ! Mi sufokiĝas !"

- *"Mi opiniat same kel Médéric. Lo kap enirit, ĝi do anke povat eliraj. Mo eble ni devot wone turnaj lo marmit, kel oni farat kun pajlokolum."*

- "Rompu la marmiton !" petegis Courtignon.

- *"Rompande lo marmit,"* gruntis Médéric, "*mi povut facile rompaj al li lo kap !"*

- "Kompreneble," diris la tabakvendisto, "la tasko estas malfacila kaj delikata. Hm, hm ! estus pli bone — se tio eblus — fari truon, kiu permesus al Sinjoro Courtignon spiradi pli komforte, kaj eĉ iom nutri lin … Eble eĉ ke oni povus trasegi la kaldronon… Ĉu vi havas ilojn, Sinjoro Médéric, por bori aŭ segi tra gisaĵo ?"

- *"Se tas egzistat,"* diris la hufoferisto, "*mi nej konat zi."*

La urbestro proksimiĝis al Courtignon.

- “La operacio estas danĝera,” diris li; “ĉu vi estas preta deklari ke vi nepre volas tion ?”

- “Jes !” respondis Courtignon, “mi prefere riskas ke oni rompu al mi la kapon, ol morti sufokita en tiu ĉi diabla marmito !”

Li lasis tiri sin al la amboso kaj, kiam la kuirvazo kun lia kapo estis sur ĝi en bona pozicio, Médéric ekkaptis grandan martelon.

- *“Sat do konsentide, Sir Courtignon, vi dezirat as mi frapu. Se vi tel volat, anke mi volat. Mo — vi komprenu — mi poste nej ŝatut vaj malfacilaĵês pro to!”*

- *“Ho !”* rimarkis la ŝuisto, kiu ŝatis diri spritaĵojn, *“se ci rompot al li lo kap, li certe nej protestot plu !”*

Médéric firme tenis la martelon kun manoj tute proksimaj al la metalmaso, por ne frakasi la homkapon kune kun la gisaĵo, se eblus. Li do ekbategis seke, kaj tuje, tra vasta breĉo, oni povis vidi la nigran kaj graskovritan kapon de Sinjoro Courtignon. Ĝi ne difektiĝis kaj du aliaj batoj, malpli fortaj, finfaris la liberigon. Granda spiro eskapis el ĉies brusto. Courtignon, abomena kaj la vizaĝon fendita de larĝa ridgrimaco, premis la manojn de la forĝisto en patosa korelverŝo:

- “Ha, dankon, dankon ! vi savis al mi la vivon !”

- “Mastro Médéric,” aldonis la tabakisto, “gratulojn ! Jen admirinda bato, specialista bato ! Firma kaj tamen mola ! Majstroverko de forteco kaj lerteco !”

La forĝisto, flatite ŝvelfieris sed kun modero kaj ne malgracie, dum Courtignon ne ĉesis obstine premadi liajn manojn. Sed Médéric, kiu komencis malpacienci pro tiu senĉesa premado, elturne liberiĝis dirante:

- *“Sir Courtignon, vi bone farut lavaj vi. Vi nej sat alrigardindza !”*

Efektive, la viktimo estis ŝmirumita ĝistimige — eĉ por forĝisto.

- *“Ernestine, alportu akwê ed sap !”*

Oni nun jam ridis kaj elkore; kaj se tiuj ridoj estis pli malrespektaj ol dezirus Courtignon, li tamen estis tro feliĉa por ofendiĝi. Li purigis sin laŭeble kaj, reakirinte aspekton preskaŭ homan, li flanken metis la ruinaĵon de la kaldrono … por povi ĝin reglui pli poste. Li ne volis perdi tiun ĉi artobjekton. Fine li diris, per voĉo kiu restis raŭka:

- “Gesinjoroj, mi reiras hejmen, mi iras manĝi. Sed post tio — akurate je la oka — rendevuo en la Kafejo de la Paco, kie mi invitas vin ĉiujn al vinregalo !”

* * * * * * *

La kunvenintaro estis multenombra, se ne selektita. Ĉiuj laborkapablaj homoj kaj pliparto el ties edzinoj venis al la kafejo, gratuli Sinjoron Courtignon kaj trinki je lia sano, kaj je lia monujo. La festo estis gaja, longa, brua; ĝi kostis multe, pli multe eĉ ol la marmiteto. Courtignon trovis la kalkulon altcifera; li tamen estis sufiĉe sinrega por ne montri tion.



Lo kap enirit, ĝi do anke povat eliraj.

15. **Forblovita de la Vento**

La daŭre populara romanego *Gone with the Wind* de la ĵurnalistino **Margaret MITCHELL** (1900-1949) — kiun ŝi verkis por sin distri dum deviga ripozo plurmonata — akiris mondfamon pro filmigo en 1939 kun unuaranga skipo; kaj la filmo mem iĝis klasikaĵo.



Ĉeftemo estas evoluo en la rilatoj inter la bienulaj geamantoj Rhett Butler kaj Scarlett O'Hara, kies sentoj alternas inter pasia amo kaj venĝema malŝato, ĝis finfina fiasko. Ilia historio disvolviĝas en la sudaj ŝtatoj de Usono kies ekonomio staris sur ekspluatado de nigrula sklavaro, kadre de la usona civilmilito (1861-1865).
Dialektajn dialogojn ni renkontas en la tipa parolado de nigrulaj geservistoj.

Specimeno de la usona originalo

Mammy's victories over Scarlett were hard-won and represented guile unknown to the white mind.
"Ef you doan care 'bout how folks talks 'bout dis fambly, Ah does" she rumbled. *"Ah ain' gwine stand by an' have eve'body at de pahty sayin' how you ain't fotched up right. Ah has tole you an'tole you, dat you kin allus tell a lady by dat she eat like a bird. An' Ah ain' aimin' ter have you go ter Mist' Wilkes an' eat lak you feel an' gobble lak a hawg !"*

Malgranda Disputo

[Hodiaŭ la sendisciplina fraŭlino Scarlett devas pretiĝi por eksterdoma rost-festo, en najbara sinjora bieno. Ŝi vokas sian nigrulan vartistinon Mammy, por ke tiu venu helpli en la vestado. Sed tiu eniras la ĉambron kun granda pleto da manĝaĵoj.]

En la ekscitiĝo de surprovado de roboj, ŝi estis forgesinta la ferumtegitan regulon de Mammy ke, antaŭ ol iri al iu festo, la knabinoj O'Hara devos esti jam tiel plenŝtopitaj per nutraĵo, en sia hejmo, ke ili estos nekapablaj manĝi iun ajn frandaĵon dum la festeno.

- "Estas vane. Mi ne manĝos ĝin ! Ci povas tuje reporti tion al la kuirejo !"

Mammy metis la pleton sur la tablon, kaj rektigis sin, manojn en la koksoj.

- "Toĥ, Mamzel, ci sat ! Mi nej volat as reokazu k'okazit ĉe tu antea rostfesten, kam mi sit muĉe tro sika pro l'febrê por povaj havigaj manĝ al ci, ante ol ci irit for. Ci sat manĝonda sju pec de to ĉi !"*

- "Mi ne estas ! Kaj nun venu tien ĉi kaj laĉu min pli malvaste, ĉar ni estas jam malfruaj. Mi aŭdis la kaleŝon alveturi la fronton de la domo."

La tono de Mammy fariĝis kaĵola.

- "Nu, Mamzel Scarlett, su saĝa ed ekmanĝu almene pecet. Mamzel Carreen ed Mamzel Suellen manĝadzat lo tuta temp."

- "Ne mirige," diris Scarlett malestime. "Ili havas ne pli da cerbo ol kuniklo. Sed mi ne faros ! Estas finite kun pletoj. Mi neniam forgesos la tempon kiam mi manĝis tutan pladon kaj iris al la Calvert-domo, kaj ili servis tie glaciaĵon el glacio kiun ili estis transportintaj la tutan longan vojon ekde Savannah, kaj mi kapablis manĝeti ne pli ol unu kulereton da ĝi. Hodiaŭ mi amuziĝos kaj manĝos tiom kiom mi deziros!"

Je tiu defia herezo la brovoj de Mammy kurbiĝis pro indigno. Kion juna fraŭlino rajtas fari kaj kion ne fari, estis tiel distinge diferencaj kiel nigra kaj blanka en la pensoj de Mammy; troviĝis neniu mezkonduta ebleco

inter ili. Suellen kaj Carreen estis argilo en ŝiaj fortaj manoj kaj respektplene aŭskultadis ŝiajn avertojn. Sed estis senĉesa lukto instruadi al Scarlett ke pliparto el ties ĉi naturaj impulsoj estas ne sinjorinecaj. La venkoj de Mammy super Scarlett estis penege gajnitaj kaj reprezentis ruzecon nekonatan de la blankula menso.

- *"Se ci nej zorgat pri l'manier en ku los homs parolat pri tu ĉi famili, mi da,"* ŝi grumblis. *"Mi nej intencat restaj senaga dum sjus en lo festê sot dirandzas as ci nej sat bonedukida. Ed mi nej celat irigaj ci al Sir Wilkes por manĝegaj kwaze porkaĉ !"*

- "Panjo estas sinjorino kaj tamen ŝi manĝas," rebatis Scarlett.

- *"Kam ci sot edziniĵinda, ci anke povot manĝaj,"* rediris Mammy. *"Kam Mamzel Ellen sit ca-aĝa, ŝi niam hio manĝit ĉe festadz, same kel ca Onklin Pauline o ca Onklin Eulalie; ed zi sjus edziniĵit. Junas mamzels ku ege manĝat preske sjam nej kaptat edzês."*

- "Mi ne kredas tion. En tiu rostofesto, kiam ci estis malsana kaj mi ne manĝis antaŭe, Ashley Wilkes diris al mi, ke li ŝatas vidi knabinon kun sana apetito."

Mammy emfaze skuis, la kapon.

- *"Ko ĝentilhoms dirat ed ko zi pensat, sat du malsamas afers. Ed mi nej rimarkit Sir Ashley montraj em edziĵaj je ci."*

Scarlett, ofendita, estis akre respondonta sed tuj detenis sin. Tie Mammy kaptis ŝin kaj refuto ne estis ebla. Vidante la obstinan esprimon sur la vizaĝo de Scarlett, Mammy reprenis la pleton kaj, kun la miela ruzeco de sia raso, ŝanigis alian taktikon. Ekirante al la pordo, ŝi suspiris:

- *"Nu bone, Mamzel. Mi dirit al Kuirinjê, dum ŝi sit preparanda tu ĉi plet <Oni sjam povat ekkonaj Dam*

per to ko ŝi sat manĝinda> ed mi krome rakontit al Kuirinjê <Mi ankore niam vidit blankula dam, ku manĝat malpli ol farit Mamzel Melly Hamilton, tu foj kam ŝi vizitit Sir Ashley> — Mi volat diraj: vizitit Mamzel India."

Scarlett pafis rigardon kun akra suspekto al ŝi, sed la larĝa vizaĝo de Mammy portis nur esprimon de senkulpeco kaj de bedaŭro ke Scarlett ne estas sama sinjorino kiel Melanie Hamilton.

- "Deponu tiun pleton, kaj venu pli malvaste laĉi min," diris Scarlett incitite. "Kaj mi klopodos iom manĝi pli poste. Se mi devus manĝi nun tuje, ci ne povus laĉi min sufiĉe strikte."

Kaŝante sian triumfon, Mammy remetis la pleton.



… por manĝegaj kwaze porkaĉ!"

16. **La malica demono Kanajlovagemulo aŭ La Diboĉema Trifolio**

Farsa teatraĵo kun kantado el 1833 fare de **Johann Nestroy** (1801-1862), tre populara aŭstra teatroludisto, kantisto, kaj satiristo, kiu lerte scipovis meti homajn malvirtojn kaj sociajn mismorojn al la pilorio per ridige sarkasmaj dialogoj kaj akrobataj vortludoj.

La funda temo estas veto inter du potencaj feinoj, Fortuna kaj Amorosa, por regi la sorton de tri simplaj metiistaj amikoj: Gluo la ĉarpentisto, Ŝufliko la ŝuisto, kaj Fadenulo la tajloro — ĉiuj tri sufiĉe diboĉemaj rolantoj [origine *Leim, Knieriem, Zwirn*]. La unua feino estas konvinkita ke nur mono kaj materia bonfarto povas liberigi homojn el malmorala vivkonduto, dum la dua pensas ke tion kapablas realigi nur la amo. La malica demono Kanajlovagemulo [origine *Lumpazivagabundus*] instigas la feinojn elprovi siajn teoriojn je la "diboĉema trifolio".

Fortuna inspiras al ĉiuj tri en sonĝo la numeron 7359, el kio ili konkludas ke tio devas esti la gajnanta numero en okazanta aŭstria loterio. Ili efektive gajnas centmil Talerojn, tiutempe kolosa sumo, kiun ili inter si dividas. Por tiun sumegon eluzi kaj por vidi kiu inter ili pleje sukcesis en la vivo, ili decidas disiĝi kaj revidi sin post unu jaro ĉe komuna konato, la majstro-ĉarpentisto Hobelmann. Tiu ĉi lasta havas ĉarman filinon Petreta [*Peppi*] al kiu senespere enamiĝis Gluo.

La tajloro komence prosperas en siaj entreprenoj, sed estas tiel vanta kaj paradema, ke li blinde lasas sin ruinigi de falsaj adorantoj. La ŝuisto, kiu flegas astrologion, firme kredas ke la mondo post unu jaro pereos pro alveno de timiga kometo, kaj li tial komplete fordiboĉas sian kapitalon. Nur la ĉarpentisto, nun inda svatanto, akiras sian amatinon, iĝante eĉ pli riĉa. Kun helpo de sia edzino li

zorgas ke liaj du mizeraj kompanoj ricevas duan ŝancon, enamiĝas siavice kaj finfine ankaŭ rezignas sian diboĉadon, iĝante decaj burĝoj.

Fortuna agnoskas sin venkita kaj ambaŭ feinoj forpelas la malbonan spiriton el la Feoregno.

La tuto memorigas iom pri la fama teatraĵo "Somernokta Sonĝo" de William SHAKESPEARE.

Specimeno de la aŭstra originalo:

(Der böse Geist Lumpazivagabundus oder
Das liederliche Kleeblatt)

LEIM – *Da, schau'her, das sind meine Kameraden, die das große Los mit mir g'wonnen hab'n – reiche Kerls, man sieht's ihnen an !*
PEPPI – Es freut mich herzlich, die alten Freunde meines Mannes kennen zu lernen.
ZWIRN – *Erlauben's mir … und das liebe Goscherl da nit böse wird.*

Gluo – *Rigardu, jen mas kamarads kus gajnit lo granda lot kune kun mi – riĉas bubs, kel zi ja aspektat …!*

Petreta – Mi tre ĝojas ekkoni la malnovajn amikojn de mia edzo.

Fadenulo (tre galante) – *Permesu al mi kisaj ca bela man – ed as lo alja man nej iĵu kolera – ed as tu ĉarma maĉujet nej iĵu kolera.* (ekprovas kisi ŝin).

Hobelmann (la bopatro, saltas inter ilin) – Haltu, tajloro !

Gluo – *Fadenul ! Ko farat ci ?*

Fadenulo – *Nej su infaneca, frat, ni ja sat kamarads.*

Gluo (al Fadenulo) – *Kun ci, Fadenul, kun ci aparte mi vat muĉe priparolindza !* (al Reserl kaj Gertrud, la

servistinoj, kiuj dume alportis viandon kaj vinon) *Portu tus afers al ni en lo ĉambrê. Venu, Fadenul, venu kun mi !*

Fadenulo (al Reserl, pinĉetante ŝin en la vangoj, dum li paŝas for kun Gluo tra flankpordo maldekstra) – *Ho, ci ĉarma kokidin !* (La knabinoj portas la viandon kaj vinon maldekstren for, revenas kaj paŝas dekstren for).

Hobelmann (al Petreta, lia filino, montrante al Ŝufliko) – Komuniku al li senprokraste mian planon ! (dekstren for)

Petreta (la edzino de Gluo) – Certe, patro.

- - - - - - - - -

(Petreta verŝas herbolikvoron en glaseton kaj donas ĝin al Ŝufliko).

Ŝufliko – *Ples, nej vat-ci alja glas ?*

Petreta – Kial do ? Tiu ĉi ja konvenas al likvoro ?

Ŝufliko – *Ha nej – te mi vidat apogilglas.* (Deprenas grandan glason de la tablo.) *Ĉe etas glasets oni ĝenat al si tro muĉe per enverŝadz !* (Li enverŝas mem kaj trinkas.)

Petreta – Nu, mia kara, mi esperas ke vi fariĝos ekde nun konstanta amiko de nia hejmo. Vi devus eksetli* tie ĉi kaj fariĝi ĉeftajloro.

Ŝufliko – *Mi iĵu ĉef ??*

Petreta – Kompreneble. Kiel gustumas la likvoro ?

Ŝufliko – *Bone, muj bone. Mo toĥ mi havat pet.*

Petreta – Kion do ?

Ŝufliko – *As ci donacu al mi dudiksspes, por as mi povu iraj al la drinkej.*

Petreta – Kial necesas ? Vi ja ricevos ĉe ni ĉion pli bonkvalite.

Ŝufliko – *Sirin, ci nej komprenat to. Hejme gustumat al oni eĉ nej lo plej bona trinkaĵ; en lo drinkej oni devat saj; jen lo ĝu; te lo plej mava trinkaĵ iĵat anĝelhaladz.*

Petreta (donas monon al li) – Nu, jen vi havas. Mi tamen devas diri, ke tio tre ĉagrenas min pri vi.

Ŝufliko (akceptas la monon) – *Mi kisat lo man …*

Petreta – Vi devus fariĝi solidpozicia, vi devus konduti pli dece !

Ŝufliko – *Nu, mi nej farot to. Nej indzat lo pen pro l'kurta temp. Balde venot lo komet, tam lo mond pereot!*

Petreta – Ĉesu kun tiuj stultaĵoj ! Mi jam scias rimedon por ŝanĝi viajn pensojn: vi devas edziĝi. Estas ekzemple la vidvino Leist, tre bela virino. Kun tiu vi baldaŭ disponus metiejon.

Ŝufliko – *Mi bezonat nek virin nek metiej ! Por ko mi penigut mi en lo lasta jar ? Plu nej valorut !*

Petreta – Kun vi nenio estas farebla. Vi estas kaj restas diboĉemulo !

Ŝufliko – *Sirin, pensu pri lo komet …*


Petreta – Ĉesu pri via idiota kometo ! (al si mem, dum foriro) Por tiu zorgu mia patro, tiu ja certe konvinkos lin. (dekstren for).

Ŝufliko – *Mo Sirin, lo komet …!*

\- - - - - - - - -

Ŝufliko (sola) – *Tu nej kredat je l'komet, tu ja mir-rigardot ! Mi ŝon delonge malkovrit lo fenomen. L'astralofajrê de lo suncirklê el l'ora nombrê de l'Orion en lo konstelaci planedsistema trafit en l'univers de los paralaksês, pere de lo fiksstela kwadrant, en l'elips de l'ekliptik. Sekwe devot, pro lo diagonal de lo proksi-*

mum de los perpendiklas cirklês lo venonda kometo koliziaj kun lo ter. Tu ĉi kalkul sat tel klara kel ŝuvaks. Verdire, nej sju mastrat lo scienc tele per lo eta fingrê, kel farat mi; mo anke malpli kleras uls povut sjutage rimarkaj sufiĉe da afers, kus nete pruvat as lo mond nej plu longe starot. Kurte, supre ed sube oni vidat ne haltigeble proksimiĵaj lo pere !



17. **En malnova bieno**

La litova verkistino **Marijà PEČKAUSKAITÉ** (1878-1933), en sia lando pli konata per la kromnomo *Šatrijós Rágana* (Sorĉistino de Monto Ŝatrija), elektis kiel ĝeneralan temon por siaj rakontoj la kultur-konflikton kaj -batalon kiun spertis la litova popolo sub rusa imperiismo en la 19-a jarcento (1864-1904), kiu volis neniigi la nacian lingvon kaj severe malpermesis publicadon de tekstoj en la litova lingvo. Litovio nome estis rom-katolika en tiu tempo dum Rusujo ortodoksa. Kiel reago estiĝis la "Librokontrabanda Movado" *(Knygnešiai)* kiu kaŝe reproduktis kaj distribuis verkaĵojn en la propra lingvo aŭ simple plurakontis historiojn rilatajn al la propra kulturo. Unu ties membroj estis la legenda Levanarda, devena el nordokcidenta parto de la lando, kie oni parolas specialan dialekton. Li rolas en la posta fragmento.

Specimeno de la litova originalo

Ir Levanarda seka vis naujas, vis kitokias ir niekados negali atkartoti seniau papasakotų.
- Kas tave išmoke tiek pasakų ? – stebimés.
- *Greitasparnis vies munij anų priūži, tumsiasis mišks pri-šnibždieje, auksa žvaigždeles primirkčioje,* atsako jis.

La Libroheroo

(…)

Remetinte siajn varojn, Levanarda komencas rakont-adi al la servistaro. Li parolas pri eventoj el la sankta historio, pri la vivo de sanktuloj, pri tio kion li legis en aliaj libroj, spertis dum sia vivo, aŭ simple elpensas. Ĉion tion li faras tre bele, nete adaptite al la homa vivo kaj indikante, kiel ĉiu devas vivi. Lia elokvento

fluas kiel akvo kaj la aŭskultantoj aŭskultas kun okuloj direktitaj al liaj lipoj, unu flustrante al la alia:

- Kiel li povas tiel rakontadi, ne estante pastro ?

Krom tio, Levanardo devas ankaŭ al ni, infanoj, multon rakonti. Dum la krespusko ni sidigas lin en la manĝoĉambro sur kanapon aŭ en aleo sur benkon kaj, eksidinte mem apud li, ni petas rakonti fabelojn. Tiam Levanardo rakontas ĉiam novajn, ĉiam aliajn historietojn kaj neniam ripetas pli frue rakontitajn.

- Kiu instruis al ci tiom da fabeloj ? – ni miras.

- *Lo rapidflugila vent al mi zi almuĝit, lo malhela arbar alflustrit, ed los oras stelets alpalpebrumit,* - respondas li.

Ni montras al Levanarda la tutan nian mastrumon kaj ludilojn, gvidas lin en nian domon apud neston de cikonio en la malantaŭo de la ĝardeno, kie kreskas altaj konvolvuloj. Tie ankaŭ estas vito, kiun al ni alveturigis "sinjoro cikonio" el Afriko kiel gastdonacon. Levanarda manĝas la vinberojn, laŭdas ilian bongustecon, kvazaŭ li mem estus infano. Kaj tio al ni senfine plaĉas.

Panjo regalas lin, sed li manĝas nur malmulte.

- *Kal mi bezonat muĉe manĝaj, ja mi nej farat peza labor,* - li respondas.

La plej bonaj manĝaĵoj iras al li, teo kun kuko kaj Panjo prezentas al li ĉiam alian bongustaĵon. Post kiam li eltrinkis la teon, venas la kuiristino por peti ĉiujn al la vespermanĝo por kiu ŝi preparis apetitigan supon.

- *Dank, dank, Fabet,* - diras li ridante, - *kel mi manĝot nun sup, kam mi jam sattrinkit teet ? Ja ci mem komprenu as oni ne povat sidigi kamparan sur sinjor.*

Paĉjo ŝatas lin iom inciti. Kiam Levanardo alveturas, li ĉiufoje demandas lin kial li ne edziniĝas, ke jam delonge estas tempo por tio, ke li jam estas grizhara; pli poste neniu virino lin ankoraŭ deziros. Kaj li mencias al li tiun aŭ alian fraŭlinon, laŭdante ties belecon kaj taŭgecon. Sed Levanarda nur ridas, dirante ke ĉiuj fraŭlinoj estas por li belaj kaj bonaj, kaj ke li amas ilin ĉiujn, sed ne povas unu el ili elekti. Unu fojon tamen, serioze kaj sen ŝerci, li diris:

- Mi niam edziĵot. Vidu, Sir, al unu hom sat destinida ta viv dum al alja nej ta. Al mi edziĵ nej sat destinida. Rigardade el unu flank, ma labor sat muj danĝera, mo satande sola, mi nej timat pro ma fel; mi dediĉat mi al to kaj laborat. Se aperut edzin ed infans, sut forta ligiĵ ed mi tuj komencut tremaj pro zi. Toĥ nej nur to; rigardade el alja flank, tu ma stat ŝajnat saj pli altnivela. Certe, anke stat de geedzec sat sankta – ja Jesu Krist mem ĉe-sit en lo nupt de Kana – mo ŝajne anke hiom pli proksima al animals. Dum mi, kwankam satande mizera homet malklera, skulpt-ande mas sanktuls, pripensat za viv ed dezirat saj hiel pli proksima al zi.

Gastinte du tagojn, Levanarda veturas hejmen "al Panjo". Ni akompanas lin ĝis la arbaro kaj sincere adiaŭas, petante ke li revenu en plej proksima tempo.

[laŭ traduko de Adam Vaitilavičius]



Kel mi manĝot nun sup, kam mi jam sattrinkit teet ?

18. **POEZIO**

Kvankam ne estas la celo apliki Popidon al plenaj tekstoj, kiuj plivole meritas verkadon aŭ tradukadon per norma lingvo, mi tamen enprenas unu poemon komplete en dialekto – kun helpo de la karmemora Rik De Roover - por demonstri ke la metodo utilas same bone en poezio kiel en prozo. Ĝi estis originale verkita de **Jean PIRARD**, valona esperantisto, kiu volonte ĝin havigis al mi por tia traduko.

Li Tchésseû

On powête, c'èst-on tchèsseû
Qui s'pormonne a l'avinteûre:
I n'a nin tofér l'aweûre
Et rinteûre sovint pèneû.

Çou qui porsût, c'èst ledjîr:
Li minde zûvion l'ènêrêye.
Come in-oûhê, ça vol'têye
Inte lès-åbes ou s'piède è cîr.

Mins c'est si bê , si tem'tant,
Qui mågré cohètes è spénes,
Li feû d´rîmes, foû d´aléne,
Coûrt èt nah´têye, èspèrant…

I såye, sins discorèdj´mint,
Dè r´trover l´vûzion pièrdowe.
Qwand i veût ´ne foye qui s´rimowe,
I roufèle: Mins, c´esteût l´vint !

Tot l´minme, ènn-arrive a bout,
Ça l´èst div´nou pus-abèye.
Adon, i v´s/apice l´îdèye
Sins tchik´ter èt tot pièrdou.

Qu´ènnè va-t-i fé ? On tchant ?
Ine pådje di rîmês ? On conte ?
I n'èl sét nin. Çou qui compte,
C'èst qu'i tint l'oûhê vivant !

Oûy, dj'a volou fé l'tchèsseû
Et dji coûre a l'avinteûre.
Mins dji n'sé s'dj'årè l'aweûre
Ou s'dji rinteûr'rè pèneûs …?

Lo Ĉasist

Poet, li sat kwaze ĉasist,
ku arde aventurs postkurat.
Nej sjam bonŝanc al li susurat.
Lo vakreven sat ofte trist.

Ko li alstrebat sat leĝer;
pro eta vent ĝi forbloviĵat,
bird, ku til los arbs leviĵat
o til ĉielê de liber...

Mo vat ĝi log tel grand ed bel,
as spit' al dorn- ed branĉ-macerê,
kurserĉat, peland li l'esperê
lo rimfreneza, penanhel …

Li provat, sjame diligent,
l'vizia siluet retrovaj.
Se vidat foliet si movaj,
eksaltat li: Mond, sit lo vent !

L'poet, li restat nun senplan'
As rim li verku, o rakontê ?
Mo ŝon nej gravat formkonfrontê;
Lo bird ja vivat en sa man !

Al ĉas mi hastat kun ardem,
renkont' lo tenta aventurê.
As plenot mi pro korplezurê,
o hejmrevenot mi sen-tem ?

19. **La Buŝumo**

La germana juristo **Heinrich SPOERL** (1887-1953) estas konata pro siaj humuraj kaj soci-kritikaj romanoj kaj rakontoj. Plej fama estas lia verko *Die Feuerzangenbowle,* cetere filmigita. Tie ĉi, pro enesto de dialektaj dialogoj kaj eĉ slango aperas ĉerpaĵo el lia *Der Maulkorb*. Temas pri farso situigita en la prusa epoko [→ #25 La Kapitano el Köpenick]. Ambaŭ la justica protokolo kaj la ŝtata protokolo estas en tiu ridindigataj pro superŝveligo de ordinara poramuza petolaĵo.



Prokururo von Trezkov, kies tasko estas kulpigi akuzitojn nome de la ŝtato, althonora ofico, en malfrua horo mortebrie forlasas trinkejon en akompano de sia granda hundo. En la mateno, patrolantaj policistoj rimarkas kun hororo ke la kavalira statuo de la imperiestro, kiu fieras meze de la ĉefa placo, portas eluzitan buŝumon de hundo. Majest-ofendo ! Identigado de la kulpulo tamen montriĝas malfacilega entre-preno, unuflanke ĉar la prokuroro mem plu ne memoras kiel li revenis hejmen en la fatala nokto, kaj aliflanke ĉar ĉiuj spuroj kiuj kondukas al li estas aŭtomate konsiderataj falsaj. Fine, la magistrato decidas promesi rekompencon de 3000 Markoj, granda sumo, al tiu kiu povos liveri la kulpulon. Du malkleraj mizeruloj decidas denunci unu la alian. La urbaj respondeculoj — kiuj trafis en veprejo pro la multaj ne akcepteblaj indikoj, duboj, kaj intrigoj — plu ne scias kiamaniere elturniĝi, por ke la hierarkia strukturo ne kolapsu sub skandalo. Ili do volonte akceptas la tieldiran "krim-farinton", des pli ĉar tiel aperas la ebleco, ke temos plu ne pri majestofendo sed pri simpla "vandalaĵo", tial ke la akuzito ne sciis kio reprezentas la statuo. Per tiu ruzo neniu devos suferi pro skandalo kaj ĉio rekvietiĝas en la urbeto.

Specimeno de la germana originalo

Das ist das Geheimnis der grossen Zahl, dass sie unfassbar, unvorstellbar ist. Dreitausend Mark sind ein unübersehbarer Reichtum für den, der sein Leben nach Groschen rechnet. Vor dreitausend Mark verblassen alle Bedenken. Schon um einen geringeren Preis als einen Berg Kartoffeln sind Tugenden gefallen.

- “Du, Wimm.”
- “Wat denn?”
- “Ich han noch en janz angere Idee.”
- “…?”
- “Mer mache dat jenau umjekehrt. Ich zeig dich an, un du jehs sitze.”
- “Nä, Bätes, dat is nix.”
- “Waröm is dat nix ?”
- “Ich muss doch dat Jeld verwahre. Un dat Sitze kanns du besser. Du has en dickere Popo”.

Komploto

[La magistrato decidis promesi rekompencon de 3000 Markoj, granda sumo, por tiu kiu liveros la kulpulon.]

Kelke da horoj pliposte aperis ruĝaj afiŝoj kun la graspresitaj ciferoj 3000. Ili pendis je afiŝkolomoj kaj reklamtabuloj, sed ankaŭ en la trinkejoj kaj kavernoj*. La polico havas efikan rilaton kun la malaltaj socitavoloj kaj scias, kie troveblas homoj kontaktendaj.

En “La Kanono” renkontiĝas neniuj oficialuloj aŭ intelektuloj, sed viroj de la manlaborado kun ĉapoj kaj koltukoj: koĉeroj, riverboatistoj, havenlaboristoj kaj domservistoj, sed ankaŭ sezonlaboristoj kaj vojtretistoj*, kiam iu bonfaranto al ili groŝon donacis.

Ĉe la tri mallarĝaj lignotabloj en la malvasta klientoĉambro ne multo okazas. Homoj, kiuj jam posttagmeze sentas soifon, forigas tiun en stara pozicio, interpremiĝante ĉe la vendbufedo, aŭ ili treniĝas

ekstere en la koridoro kaj tenas sian glason de superfermentita biero enmane, aŭ lokigas ĝin sur fenestrokornicon aŭ sur ŝtuparbreton. Tie ili konversacias, la riveranoj flegmeme, po glaso unu frazon, la okcidentanoj tiel verve ke impresas kvazaŭ ili kverelus. Multaj diras tute nenion, fikse rigardante en la malplenon per humidaj okuloj kaj de tempo al tempo forviŝas per la mandorso bierŝaŭmon desur sia franĝa mustaŝo.

Kontraŭ foruzita murtabulo pendas la ruĝa afiŝo. Neniu atentas ĝin. Nur Rabanus, la instiganto, lokigas sin antaŭ ĝi, ŝajnigas surprizon kaj saĝumas al la publiko ĉirkaŭe:

- *"Trimil stels ? Bela stak da mon por tel malgrava afer. Tondre, drugs*, to valorat lo pen ! Domaĝe as mi nej sat lo krimfarind. Se da, mi certe elektut hiu por mi denuncaj; poste sidadzaj dum nur tri o kwar monats en lo fortê* ed finfine dudividaj lo monamas kun li. Sut bela interkonsent !"*

Rabanus parolis laŭtvoĉe. Ja ankaŭ ne estu solparolado. En tiaj ĉi drinkejoj ĉiu parolas al ĉiu cetera, kiel al li plaĉas. Li dume kaŝobservis la homojn, sed devis konstati, ke lia afereca pripenso ŝajnas ne fari efikon. Unuj tute ne aŭskultas kaj plu babilaĉas, aliuj malvigle duondormas super siaj glasoj.

Sed tamen ! – Tie ĉe tablo sidas du uloj kiuj jen kunmetas la kapojn kaj komencas flustradi. Flustrado tie ĉi estas nekutima, eĉ ne ĉe altpolitikaj temoj; devas do temi pri io tre speciala. Rabanus alŝteliĝas, streĉas la orelojn kaj estas kontenta pri la aŭdataĵo.

- *"Hej, Ŝtipul,"* diras Vilĉjo.

- *"Ko ci volat?"* post momento respondas la alparolita.

La ruzaj etokuloj de Vilĉjo eklumas. *"Ŝtipul, mi vat ide !"*

- *"Lasu mi en pac,"* rediras Ŝtipulo.

- *"Atentu: tus trimil stels al ni bonfarut, ne vere ?"*

- *"Ci sat freneza,"* diras Ŝtipulo.

- *"Nej diru to !"* Vilĉjo montras per polekso al la afiŝo. *"Kel sut pri ni du ? Mi denuncat ci ed ci irat en karcer. Nej bone, to ?"*

- *"Ci kaksak,"* respondas Ŝtipulo.

- *"Nej, mi volat diraj: Tu mon ni dividot inter ni. Por mi mil kwinĉend ed por ci mil kwinĉend."*

Ŝtipulo malrapide vekiĝas el sia duondormo kaj grimacas. *"Ci, bub, to ja nej eblat."*

- *"Kal to nej eblat ?"*

- *"Mi ja nej farit ĝi."*

Vilĉjo intime alklinas sin. *"Ci, simi, to anke nej necesat ! Ci devat nur kondutaj kwaze ci farit ĝi. Nej komprenat ?"*

- *"Ne-e-e"*

- *"To certe glitot glate. Mi irat al lo policej ed dirat, as ci farit tu afer je l'statu. Ed ci irat te ed anke dirat da. Povat-ci diraj <da>?"*

- *"Da-a".*

Ŝtipulo apogas sian dikan kapon kun stopla barbo sur manplato kaj pene cerbumas. Rezulto: *"Vilĉ, mi nej kuraĝut !"*

- *"Aĥ, ci stultul, sat por bonega rekompenc ! Pripensu, 3000 Stels, to egalat tridek mil glasês da bier; o ses-dek mil brandets !"*

- *"Aĥ nej,"* kalkulas la infanriĉa Ŝtipulo, *"to farat dumil kalsonets o mil funts da terpoms."* Li provas imagi tian monton. Al li turniĝas la cerbo.

Jen la potenco de grandegaj nombroj; ili estas ne-kapteble superaj, neimageblaj. Trimil Markoj estas

neampleksebla riĉegaĵo por tiu, kiu dum la tuta vivo estis devigata kalkuladi per Groŝoj. Frunte al trimil Markoj paliĝas ĉiuj argumentoj. Jam pro malpli alta prezo ol tiu monto da terpomoj falus homaj virtoj.

- *"Awdu, Vilĉ."*

- *"Nu, ko sat ?"*

- *"Mi vat ankore tute alja ide !"*

- *"???"*

- *"Ni faru to komplete inverse: Mi denuncat ci ed ci irat sidadzaj en lo karcer."*

- *"Nej, Ŝtipul, sat malĝuste."*

- *"Kal sat malĝuste ?"*

- *"Mi ja devot gardadzaj lo mon. Ed lo sidadz muĉe pli bone konvenat al ci. Ci ja vat pli dika pug."*

(…)



Mi denuncat ci ed ci irat sidadzaj en lo karcer.

20. **Palitro**

Felix TIMMERMANS (1886-1947) estis unu el la plej multe tradukataj kaj produktemaj aŭtoroj de Flandrujo (Belgio). Li estis aŭto-didakto kaj verkis teatraĵojn, historiajn romanojn, novelojn, katolikreligiajn studojn, kaj poemojn. Sed li ankaŭ estis meritplena pentristo kaj desegn-isto, kiu ŝatis mem ilustri siajn librojn, same kiel tiujn de kolegoj. Lia plej konata kaj laŭdata verko estas la romano Palitro [*Pallieter*]. Lia pentrada talento elŝprucas ankaŭ en liaj tekstoj, kie abundegas vervaj kaj originalaj priskriboj, ofte spritaj. Lia patrujamo sin montras ankaŭ pro aplikado de dialogoj en la sudnederlanda dialekto de la urbeto Lier, kie la aŭtoro hejmis.



La romanheroo estas modelo de vivĝuanto kiu sentas sin plene membro de la ĉirkaŭa naturo. Li konstante "plukas la tagon" kaj konsistigas kvazaŭ vivantan himnon unuparte al la Naturo kaj aliparte al la flandra kampara kulturo, per siaj senkonformismaj petolaĵoj kaj senĝenaj eldiroj, tamen ofte kun mistikaj enpensiĝoj kristanaj. Tiamaniere li iom similas al la fripona Til Strigospegulo [vd. Arkaika Esperanto], kiu ankaŭ konsideratas kiel liberama simbolo de Flandrujo.

En sia kampara dometo Palitro vivas kune kun sia mezaĝa dommastrino Charlot, sia granda hundo Loebas, sia kolosa ĉevalo Beiaard, kaj pluraj kortaj bestoj. Dum kermeso, la ĉiujara vilaĝa festo, Palitro enamiĝas en Marika [*Marieke*], la baptofilino de Charlotte, kiu opinias same kiel li. Ili ge-edziĝas kaj ŝi naskas triĝemelon. Sed venas abrupta fino al ilia paradiza vivkoncepto, kiam la registaro anoncas ke oni konstruos fervojon tra la vilaĝo, kiu entrepreno alportos naturminacan industriigon. Tion Palitro ne kapablas akcepti kaj kun sia obitelo* li elmigras al la vasta mondo.

Marieke was die stilte zo zwaar, dat ze vroeg:
“Speld is e lieke”
“’k hem ma fluitje ni bij” zei Pallieter.
“Wel zingt er dan iên !”
En hij zong: “Daer waren twee Coninkskinderen” …
“Er is mor da verschil,” zei Pallieter, als het gedaan was, *“dat Charlot, die oude kweene, er nog vier lichtjes zij bijzetten, omdat de joenge ni zij verdrinke.”*
Marieke kreeg een rood koleurken.

La Valkiria Rajdo

[Palitro ĵus enamiĝis en la freŝan naturknabinon Marika. Estas varmega antaŭŝtorma vetero. Por renkonti kaj kune trasperti la baldaŭan pluvegon, ili decidas navigi en boateto sur la rivero.]

Ili paŝis en la ruliĝantan barketon, kiam la grasa voĉo de Ŝarlota ekvokis: *“Mo sat-vi do frenezas veturadzaj ! Plivole manĝu ankore hiom da ĉerizês !”*

“Ni manĝat sun !” revokis Palitro, kaj post du fortaj remilaj batoj ili lasis sin flosadi kunfluen, tra la bakistforne varmega pejzaĝo, kiun ili nun vidis ĉirkaŭ si kuŝadi malferma en sia tuta vigla lumado. Marika sidis malantaŭe, Palitro antaŭe, kaj ili pendigadis siajn manojn en la varmeta akvo.

Ili silentis, kaj de tempo al tempo rigardis, kvazaŭ prosurprize, unu la alian al la vizaĝo, kaj tiam estis rideto sur iliaj buŝoj kaj lumeto en iliaj okuloj. Ili ne-palpeble drivis pluen kaj vidis lante preteren ŝoviĝadi la unuajn kampojn kaj arbojn, dum la horizonto kaj la foraj fojnamasoj promenadis akompane. Super tiu granda kamparĉifono pendis ne unu suspiro. Al Marika la silentego estis tiel peza ke ŝi petis:

“Foje ludu melodi !”

“Mi nej kunportit ma flut,” diris Palitro.

“Nu, tam kantu won !”

Kaj li ekkantis: <Estiit phoyoe dux Gereghidoy> [1]

“Sat nur tu diferenc,” diris Palitro, kiam ĝi estis finita, *“as Ŝarlota,* <ityu oldam Inacchom>, *ankore almetut kwar lums por as lo junul nej dronu.”*

Marika ekhavis ruĝiĝan koloreton.

Sed tiam Palitro ekvidis ĉe la fluokurbo, senmova kvazaŭ ŝtona figuro, fiŝiston kaptantan per hokŝnuro, kaj li kriis:

“Tu denove starat atendande hiu ku li ankore niam vidit !”

La fiŝkaptisto indiferente ekrigardis supren, kaj tiam haste reen batis siajn okulojn al la ruĝa korketo.

Ili drivis pluen, kaj Marika subite jubilis, fingromontrante al la ĉielo:

“Tondêrkastels, tondêrkastels !”

Kaj vere, el malantaŭ ĉiuj lateroj de la bluaj, arbare liniitaj terfinoj leviĝegis plenŝtopitaj, dikegaj, kapuĉhavaj nuboj supren. Ili aspektis kiel maldelikataj kolomoj, sur kiuj sin apogis la blua ĉielkranio.

“Timat-ci lo tondêr ?” demandis Palitro.

“Mi, certe nej, mi ŝatat ĝi awdaj !”

“Tel sat, tam ni festenot ! Ĝi venu nur !”

Ombro kuregis tie trans la vigla helo de la kampo kaj, en palpebrumo, mergis la mondon en duonobskuron. Ili remis plu kaj la altaj nuboj dume komencis interpuŝiĝadi, kaj tiuj blankaj, orgojlaj kolomoj ŝrumpiĝis, knedumiĝis, eltiriĝis kaj ree kunmiksiĝis en plumbe grizaj sternaĵoj kiuj forfermis la bluon de la ĉielo, kaj estis kiel granda griza tendovelo etendita super la mondo.

Ekis fortega ventopuŝo, kiu kurigis la vojsablon per altaj nuboj unu post la alia. La arboj knaris kaj

hurlis; kiel blankaj paperoj la kolomboj ventŝvebis sur la malluma aero, kaj flako da kornikoj lasis sin svingi supren al la turo, kvazaŭ amaso da nigraj ĉifonoj.

Sed neatendite la vento falis; ekregis subita kvieto kiu haltigis la batadon de la koro. Kaj tie super la rivero Nethe, en purpurobskuro, flamis ruĝa serpentzigzago laŭlonge de la horizonto kaj iom poste obtuze basbruis malantaŭ la nubaro hezitema tondro ĉirkaŭ la tero. El malproksimaj farmbienetoj okulumis briletoj de benitaj kandeloj [por ke sanktuloj protektu onin].

De tri flankoj, pli alte nun en la ĉielo, flamis la fulmo, tondrobomboj diskrakis tiel rumblante kaj grumblante, ke la tero je tio tremis kaj skuiĝis.

"Jen ci vat ! Jen ci vat !" sonoris Palitro kaj Marika. Kaj falis la unuaj grandaj gutoj varmetaj sur iliajn vestaĵojn. Ili malvarmete plaŭdis sur ilian trahejtitan karnon kaj tio havigis profunden sinkantan ĝuon. Kaj tie, super la malproksimaj farmbienoj, la pejzaĝo ombrumis for malantaŭ alsturmanta pluvofalego, kiu estis haste atakanta por tujtuje klaketante ŝmacfrapi la akvon. Pisegis akvo kaj en momenteto ili estis sterke malsekaj. La pluvo torentis per barelplenoj ĉie sur la kamparon, la vaporo staris pro ĝi unu metron super la grundo; la fulmoj brilegaĉis, sin interkroĉis, serpentumis unu tra la aliaj kaj la tondro tiel krakadis kaj rasladis, ke oni perdus aŭd- kaj vidpovon. Iu farmistino kuregis, kun siaj jupoj super la kapo tiritaj, trans la kampoj al ŝtipamasego.

Sed Palitro kaj Marika ridis pro ĝuo; la akvo tiel transfluadis iliajn vizaĝojn ke tiuj ĉi lumis kiel speguloj.

Ili navigis plu kaj atingis herbejon, en kiu la ĉevaloj kaj bovinoj de la muelisto maltrankvile stampfadis kaj muĝadis. Palitro subite havis radiantan ideon.

"Altere, altere !" li kriis.

"Pro ko? … Ko sat?" demandis Marika.

"Sur ĉeval o sur bovin, hot !"

"Ho, sat bone, sat bone !" ŝi ĝojis, kaj ambaŭ ili saltis al la grundo. Ŝi lerte grimpis sur l'unue starantan ĉevalinon, frapis manplate sur la postaĵon de la nervema besto, kiu eke kvazaŭ sago el pafarko antaŭen flugis, sekvata de ĉiuj bovinoj kaj ĉevaloj, dudekopaj.

Kaj tiu hordo galopadis antaŭen en klaketanta pluvo, kia vivanta terpeco. Marika firmtenis sin je la abunda kolhararo de la kalcitranta ĉevalino, kaj ŝi ride eligis klarstridajn kvikegojn. Palitro malfikse sidis sur sia propra ĉevalo, svingis la brakojn kaj hurladis, per sia forta gorĝo, la akravibran kornomelodion el la Valkirioj de Wagner. Sonadis kiel trumpeto.

Kaj tondradis kaj fulmadis kaj pluvadis kvazaŭ la lasta juĝo estis venonta. Kaj tratie trotkuris la bloko de henantaj kaj muĝantaj ĉevaloj kaj bovinoj, blindece antaŭen, kiel ĉion frakasonta potencego. Kaj la grundo vibrosonoris, batbruis, kaj ĝemveis sub la pezega maso, dum la pecegaĵoj da grundo flugadis trans la kapojn de tiuj skuegantaj korpegoj.

La malseka hararo de Marika estis malfiksiĝinta, kaj pro la perforto ĝi kiel ventumilo disflugis. Palitro sukcesis flankenstiri sian rajdobeston, kaj eĉ pli rapide sin ĵetis antaŭen tiu amasa karnopecego, kvazaŭ kolosaĵo de la ĉielo. Sed super ĉiu muĝado, henado, tondrado kaj stampfado entuziasme disen trumpetiĝis la ĉionrega "ta, ta, ta, taaa !" de Palitro. Estis potence belege !

Kaj kiam la rapida fulmotondro komencis mildiĝi, Palitro ekbridis, kaj la plumpa amaso ekhaltis, vaporanta kaj brilanta en la hele freŝa sunlumo, kiu de inter la elverŝitaj nuboj ore faskiĝis sur la teron.

Kaj firme belfarba ĉielarko sin streĉis triumfante super la tuta mondo. Palitro, ankoraŭ sidante sur sia ĉevalo kaj ĝis la haŭto malseka, rigardis al Marika kiu, likante pro la pluvo, kun malligita hararo, spire anhelante kaj radiante pro feliĉo kaj vivĝuo, ridetis al li de sur sia giganta ĉevalino.

Tra la malsekaj, blanke muslinaj vestoj, kiuj klare gluis sur ŝia rozeca korpo, li vidis la delikatajn formojn nete desegnitaj, la konturojn de talio kaj femuroj, de ŝiaj junaj, ankoraŭ rektestaraj mamoj.

Li vidis ŝin tiel feliĉa kaj tiel grandioza kaj blanka kontraŭ la granda fundkolora ĉielo, kun la brila, milde verda sunpejzaĝo kun arboj, domoj, kaj muelejoj malantaŭ ŝi kaj la potenca larĝa ĉielarko super ŝia kapo.

Hej ! estis tio supere belega ! Kaj tiam tuŝiĝis lia koro; li pelis sian ĉevalon al ŝi, li abrupte ĉirkaŭbrakis ŝin, kaj kriis:

"Ci farĳot ma edzin, ma mieldolĉa edzin !"

Kaj Marika svingis, kun longeportata suspiro, siajn brakojn malsekajn ĉirkaŭ lian fortegan nukon, longe rigardadis lin per siaj grandaj okuloj, kaj tiam demandis simple sed intense: *"Kam?"*

"Ante ol kwar semajns !" li jubilis kaj donis al ŝi longan, malsekan kison sur ŝiajn lipojn kaj blankajn dentojn.

---

1) Teksto en Arkaika Esperanto. Temas pri mezepoka nederlanda amkanto, kiu rakontas la tragedian amon inter princo kaj princino, en kiu la reĝido dronas, dumnokte naĝante al sia amatino fermita en turo transe de la rivero, ĉar maljuna fivirino estingis la gvidlumojn.

21. **Antaŭ la Paciga Tribunalo**

Fragmento el la kompilaĵo *Morceaux choisis de patois poitevin* de **Emilien Traver** [Elektitaj pecoj en la dialekto de Poitou, nordokcidenta regiono de Francujo.] – Eldono Chef-Boutonne, France 1946.

Specimeno de la franca originalo:

LE JUGE DE PAIX – Mais quel sens attachez-vous donc aux épithètes "catin" et "pouffiasse" ? Que signifient ces mots ?

ROSALIE – *Unue catin et une pouffiasse, M'sieu le Juge de pé, o l'est une femme, soi disant, qui est à tout le monde, sauf vout' respect.*

JUĜISTO (farante geston al la virino Frasine) – Pli poste. Sinjoro Thomas, sidiĝu ! (Thomas sidiĝas). Sinjorino Thomas, bonvolu stariĝi. (Rosalie leviĝas) Vi nomiĝas Sinjorino Thomas, fraŭline Rosalie Bernard, havante hejmon kun via edzo en La Courpière, atinginte la aĝon de … ?

ROSALIE – *35 jars en Novembrê.*

JUĜISTO – Levu la dekstran manon. Vi ĵuras paroli sen malamo kaj sen timo, diri la tutan veron kaj nenion krom la vero. Diru: "mi ĵuras´.

ROSALIE (levante ambaŭ brakojn) – *Mi levot sjo ko vi dezirat, Va Paciga Moŝt. Mi ĵurat al vi !*

JUĜISTO – Vi riproĉas al Sinjorino Boutin, kiu ĉeestas, ke ŝi nomis vin "leĝeruno" kaj "woreino", kio konsistigus vide al la kulpigantino — se la evento pruviĝus — leĝomalobeon traktatan en Artikolo 471, Paragrafo II de la Punkodekso. Bonvolu rakonti al mi, Sinjorino, en kiuj cirkonstancoj vin insultis Sinjorino

Boutin. Mi aŭskultas vin. (La juĝisto apogiĝas en sia fotelo kaj atendas.)

ROSALIE (manojn sur la tenilo de sia pluvombrelo) – *Hiu tag, kam mi starit sur lo sojlê de na pord, kun balail en lo man — mi ĵus finit la purigadz de l'dom — na najbarin Sophie, lo edzin de Paul; vi sciat: Paul lo muelist; mi nej sciat se vi konat li; alvenit ĉe ni, lo vizaĝ plena je farun, ed dirit al mi: Sciat-ci ko mi awdit diraj? – Nej. – Nu, onidire, ŝajnat as Frasine rakontadzat sje as ci portigat du grandegas korns al ca edz. – Kele do? – Da ja. Ŝi dirit eĉ as ci sat "historia" o hio simila al to… Parolande al mi, Va Paciga Moŝt, pensat-vu as mi sut "historia"? Diru … Kredat-vu hio ta, Va Juĝista Moŝt …?*

JUĜISTO – Kion mi do diru ? Mi scias tondre nenion pri ĉio ĉi ! Sed ni glitu trans tion. Venu ni al la faktoj.

ROSALIE – *Kel do, ni glitu trans to ?*

JUĜISTO – Jes, mi volas diri, ke vi malatentu krom-detalojn.

ROSALIE (emfazante per gestoj de la dekstra mano) – *Nu, he, mi sit en granda koler, Va Paciga Moŝt ! – Portigi korns al ma vir, li ku sat tel bona, je sjus anĝels, ed tel lerta law sjus maniers* (kun plora voĉo) *ed tel komplezema en sjus afers ! Nej sut-to pekega krim ? Ko pensat-vu pri to, Va Paciga Moŝt ?* (La juĝisto faras evitan geston.) *Ed super to mi ankore sut historia! … Ha! ed nej sit lo fin ! … Ho ho, mi nej atendit til li* (ŝi montras al sia edzo)*, ku sit ĉe sa labor, sut reveninda. No; mi metit lo balail en angul ed hastit rekte al Frasine, ku sit tute sola preparande sa sup. Ha ! oni rajtat parolaj pri vulturin, Juĝista Moŝt… Mi certigat al vu as mi liverit al ŝi por pli ol lo prez ! Mo ŝi, ku sat malbona kel gal, dum mi sjam tel dolĉa kel lo bona pan, kwankam nej sit danĝer as mi sut tuŝinda ŝi, ŝi donit al mi en lo vizaĝ granda frap… Ŝi sat kapabla je sjo, sciu ! Sat feliĉe as Julien, li, alvenit tu-*

momente, sen ko mi nej imagat ko ŝi sut al mi farinda en lo fin …!

FRASINE – *Di ma, Di ma ! Porsjame perdiĵit l'okaz havigaj al ŝi kelkas bastonbats !*

ROSALIE – *Ed sit ĵus kam mi elirit el ŝa kort, Va Juĝista Moŝt, as ŝi nomit mi leĝerun* ed worein*, du aŭ tri foje ante ma edz. Ho ! dirit mi, to ci pagot kare !* (Turnante sin al Frasine): *Dirot-ci as nej sat lo ver ?*

FRASINE – *No, nej sat lo ver ! Ci sat granda fia kalumniandin ! Sjukaze, se mi nej dirit to, niel malhelpat as sat toĥ vera… Sat nur lo ver ku ŝokat… jen…!*

JUĜISTO – Sed kiun signifon vi do donas al la atributoj "leĝerun" kaj "worein" ? Kion signifas tiuj vortoj ?

ROSALIE – *Leĝerun ed worein, Va Paciga Moŝt, sat virin ku, por tel parolaj, ofertat si al sju ajn — se vu permesat…*

FRASINE (kun malestima mieno) – *Mi mokat …*

THOMAS – *En los diks jars as ni ŝon sat geedzês, Va juĝista Moŝt, niam law ma sci Rosalie farit mispaŝ ! Mi metut los mans en fajêr por to…* (Post paŭzeto) *Mi devut, fakte, propraokule vidaj por as mi povu kredaj je to …*

FRASINE – *Povra kredemul …!*

ROSALIE (eltiras poŝtukon kaj sekigas al si la okulojn).

THOMAS – *Sat por certigaj, Va Juĝista Moŝt, as ni ambe muĉe kolerit, des pli bikos lo Sirin Boutin – kel vi nomat ŝi – ŝon pli frue sit dirinda al lo kudristin, as ma najbar Jacques nuptaĉadzat kun ma leĝa edzin preske sub ma naz, ko sat pozitive malvera. Mi direktat va*

atento, Juĝista Moŝt, al lo graviga fakt as lo virin Boutin tele sat inkluzive "rekulpiĵin"…

<u>JUĜISTO</u> – Se mi bone komprenas, laŭ vi la virino Boutin do kutimas fari tiajn akuzojn ?

<u>FRASINE</u> (plu ne povante regi sin, ekstaras salte) – *Mil diablês ! Ĉu longe ankore dawrot tu intrigadz ?* (kiam Rosalie sin turnas al ŝi): *Ci fia Rosalie, ci nej venu tro proksime al mi o …!*

<u>JUĜISTO</u> (severmiene trankviligas per mangesto ĝis kiam ŝi residiĝas) – Ĉu la sceno, kiun vi al mi rakontis, okazis sen atestantoj ?


<u>FRASINE</u> – *Ho certe, Va Juĝista Moŝt. Sit muĉe pli bone tel, por ni sjus, bikos sit granda hontindaĵ !*



Va paciga moŝt, pensat-vi as mi sat "historia"?

22. **Pudingocerba Wilson**

Mark **TWAIN** (1835-1910) estis la plej konata plumnomo de Samuel Langhorne CLEMENS, usona multverkisto kaj humoristo kun pluraj sinsekvaj profesioj, inter kiuj ĵurnalisto kaj prelegisto. Liaj aventuraj romanoj pri "Tom Sawyer" kaj "Huckleberry Finn" fariĝis tutmondaj klasikaĵoj. De lia ŝajnhistoria sed en realo politik-kritika romano *A Connecticut Yankee at King Arthur's Court* troveblas specimeno de traduko en Arkaika Esperanto. Laŭ viv-percepto Twain estis framasono.



Scenejo de la romano estas fikcia urbeto, Dawson-Alteriĝejo, borde de la riverego Misurio, proksime de Saint-Louis, komence de la 19-a jarcento. En tiu epoko ankoraŭ plene regis tie racismo kaj la socio akre diferencigis inter blankuloj kaj nigruloj, tiel ke oni donis multan atenton al la grado de "mikssangeco", kiu ne povis ne aperi pro la oftaj seksperfortoj kaj eksteredzaj sekskuniĝoj. Eĉ nur iometa "nigrula sango" sufiĉis por iun personon brulstampi kiel negron kaj tiel eĉ en ambaŭ tendaroj. La historio, kiun Twain situigas en tiu kadro, entenas fakte ne unu intrigon sed tri, inter-ligitajn.

Unuparte, David Wilson, ĵus diplomita pri juro, ekloĝas tie kun la intenco establi advokatan oficejon. Bedaŭrinde, jam ĉe l'unua renkonto kun enloĝantoj li diras ion por ili ne kompreneblan, kiu hazardo igas ilin pensi ke mankas klapo en lia kapo, ke li havas "pudingocerbon". Aldone al tio la aŭtoĥtonoj konstatas ke li havas sensencan ŝatokupon: li senĉese kolektas fingropremaĵojn de iu ajn, senrigarde aĝon aŭ metion. Junajn infanojn li registras eĉ plurfoje kun kelkaj jaroj da intervalo. En tiu epoko la policistoj, des malpli ordinaraj civitanoj, ankoraŭ nenion sciis pri tiu procedo. Nur la aŭtoro, kiel mondvojaĝanta ĵurnalisto, sciis pri tiu franca invento. Rezulte, la advokato ne vidas aperi ĉe si klientojn kaj devas akcepti librotenistan laboron por sin vivteni.

Aliparte estas la historio de la nigrula sklavino Roxana (Roxy) kaj la aristokrata familio Driscoll kiun ŝi devas servadi. Ŝi estas nur je 1/16 negra kaj preskaŭ blankhaŭta. Sklavino kaj mastrino

hazarde naskas knabeton en la sama periodo. La juna fileto de Roxana (Valet de Chambers) havas tiel blankan haŭton, ke lia patrino vidas en tio rimedon por evitigi al li sklavan vivon. En momento kiam la blankaj nobeloj lasas sian propran fileton (Tom) sub la sola gardo de la sklavino, ŝi rapide interŝanĝas tukojn kaj bebojn, tiel ke Tom iĝas Chambers, kaj Chambers iĝas Tom. La ruzo sukcesas kaj la falsa Tom Driscoll elkreskas al aroganta, trodorlotita, egoisma, kaj senskrupula aristokrato tute ne konscia pri sia reala deveno. Roxana tenas sian grandan sekreton. Male, la falsa Chambers fariĝas tute deca junviro bonkaraktera, kiu kiel "negra" servisto plurfoje savas sian brutalan mastron Tom el danĝera situacio, sen pro tio ricevi eĉ nuran dankvorton. La intrigo pri interŝanĝo de identecoj memorigas pri alia verko de Twain, *Prince and Pauper,* multe pli konata.
Triainstance aperas en la urbeto du fremdaj aristokratoj, italaj ĝemeloj, kiuj iĝas pro siaj altaj klereco kaj kultiveco favoratoj de la tuta loĝantaro.
La gepatroj de (la supozata) Tom frue mortas kaj lia (supozata) onklo, la ĉie ŝatata Juĝisto Driscoll, lin adoptas kiel sian propran filon, estante cetere seninfana. Bedaŭrinde, inter la multaj malvirtoj kaj krimfaroj de Tom, troviĝas ankaŭ vetludado, pro kio li akumulas ŝuldojn ĝis tia alteco ke li ne kapablas ilin pagi. Premegata de siaj kreditoroj li komencas trompvesti sin kiel virino kaj sukcesas dumnokte ŝteli valoraĵojn el la domoj de aliaj aristokratoj. Sed tio sufiĉas apenaŭ. Li do fine planas ŝteli la bezonan sumon el la monŝranko de sia adoptopatro, sed tiu lin surprizas ĉe la freŝa faro. Okazas furioza lukto inter la "virino" kaj la digna maljunulo. Por sin liberigi la fiulo ponardas sian bonfaranton kaj eskapas tra malantaŭa pordo.
Tuj poste la italaj ĝemeloj venas viziti la juĝiston laŭ antaŭa interkonsento, sed trovas lin murdita. La riĉe ornamita armilo restis kuŝanta apud la korpo. Ili en ĝi rekonas altvaloraĵon ŝtelitan ĉe ili. Kompreneble, ili estos kulpigataj pri la murdo kaj enkarcerigitaj. En sia malespero ili petas non* Wilson defendi ilin en la venonta proceso. Kiel atendeble la "pudingocerbo" solvos la enigmon pri la ponardo, majstre kaj je ĉies mirego identigante la veran murdinton per ties fingrospuroj. Sed ne nur tion. Per sia grandega kolekto de fingropremaĵoj li kapablas demonstri ke okazis interŝanĝo de Tom kaj Chambers kiam tiuj estis ankoraŭ knabetoj.

[Ĉefafero por ni estas ke blankuloj (kiel en realo) parolas laŭnorme dum nigruloj dialekte; kredeble la motivo ke oni ne trovas alilingvajn tradukojn de tiu kompleksa romano.]

Specimena teksto el la usona originalo

Tom was in St. Louis. The servants said he had spent the best part of his time there during the previous two years. Roxy came every day, and had many talks about the Driscoll family and its affairs. Once she asked why Tom was away so much. The ostensible "Chambers" said:
"De fac' is, ole marster kin git along better when young marster's away den he kin when he's in de town; yes, en he love him better, too; so he gives him fifty dollars a month –"
"No, is dat so? Chambers, you's a-jokin', ain't you?"

Amara Revido

[En la posta fragmento Roxana povis hejmenveni post multaj jaroj da servado sur riveregaj ŝipoj. Ŝi sopiregas revidi sian naturan filon, nun Tom, esperante ricevi de li iom da subteno en sia mizera stato. Ŝi petis rajti paroli al li.]

La (vera) patrino de Tom nun envenis, fermante la pordon malantaŭ si kaj alproksimis sian filon kun la kaĵolado kaj servistina petegado kiujn timo kaj bezono povas aldoni al la paroloj kaj gestoj de denaska sklavo. Ŝi haltis unu futon antaŭ la junviro kaj eligis kelke da admiraj ekkrietoj pro lia vira staturo kaj lia ĝenerala bonaspekto. Tom metis brakon sub sian kapon kaj svingis gambon sur la sofodorso por ŝanigi kompletan indiferentecon.

"Ma ĉiel, kel vi kreskit, karul ! Envere, mi deklarat as mi nej sut rekoninda vi, Mastêr Tom ! Efektive nej ! Bone rigardu al mi, memorat-vi lo olda Roxy ? Rekonat-vi va olda negra vartistin, karul ? Nun do, mi povat kuŝiĝaj en pac, bikos mi vidit ..."

"Trančcu la babiladon, damne, tranĉu ! Kion ci deziras?"

"Awdu do ! Sat lo sama olda Mastêr Tom, sjame tel gaja ed petolema kun l'olda panj. Same certe kel ..."

“Ĉesu, mi diras, kaj venu al la temo ! Kion ci volas ?”

Estis amara seniluziiĝo. Dum tiom da jaroj ŝi estis nutrinta kaj fleginta kaj dorlotinta la penson ke Tom estos kontenta revidi sian iaman vartistinon, kaj feliĉigus ŝin kaj fierigus ĝisoste per unu aŭ du afablaj paroloj. Necesis du akraj reĵetoj por konvinki ŝin ke li ne petolas kaj ke ŝia bela revo estas nur stulta kaj idiota imagaĵo, mizera kaj kompatinda eraro. Ŝi estis ĝiskore vundita kaj tiel hontema ke dum momento ŝi ne vere sciis kion fari, kiel reagi. Sed tiam ŝia brusto komencis ondadi kaj larmoj ekgutis. La senkonsilo ŝin instigis provi tiun alian revon sian: apelacii al la indulgemo de sia infano. Kaj tiel, sub la impulso kaj sen pripensi ŝi petegis:

“Ho, Mastêr Tom, va povra olda panj vit tom da malbonŝancês lastatempe ed ŝas braks lametas ed nej laboraj povat. Se vu povut al mi donacaj dolar — nur won eta dolar...”

Tom tiel rapide estis surpiede ke la petantino preskaŭ mem eksaltis.

“Dolaron ! Doni al ci dolaron ! Mi sentas emon strangoli cin ! Ĉu tio estas cia komisio tie ĉi? Malaperu ! Kaj rapidege !”

Roxana malrapide progresis al la pordo sen turni sin. Kiam ŝi troviĝis duonvoje, ŝi funebre lamentis:

“Mastêr Tom, mi flegadit vi kam vu sit malgranda beb ed mi edukit vi tute memstare til vu sit knab. Hodie vu sat plenkreska ed riĉa, dum mi sat povra ed oldeta. Mi te ĉi venit, kredante as vi helpot lo olda panj hiom sur lo kurta voj ku restat al ŝi inter nun ed lo tombê, ed...”

Tom ŝatis tiun melodion eĉ malpli ol la antaŭajn, ĉar ĝi komencis veki en lia konscienco specon de eĥeto. Li tial interrompis ŝin kaj diris decide, kvankam kun malpli da krudeco, ke lia situacio ne permesas helpi al ŝi, kaj li tion do certe ne faros.

“Vu do niame helpot al mi, Mastêr Tom…?”

“Ne ! Nun forkuru kaj plu ne ĝenu min, ci havis cian ŝancon !”

La kapo de Roxana pendis en sinteno de humileco. Sed jen komencis flami en ŝia brusto la iamaj maljustaĵoj kaj ili arde ekbrulis. Malrapide ŝi relevis la kapon, ĝis kiam tiu estis alte levita. Samtempe ŝia volumena korpo alprenis rektan kaj dignan pozon, kun la iamaj graco kaj majesto de ŝia vaporiĝinta juneco. Ŝi levis fingron kaj tiun skuis akompane al siaj solenaj paroloj:

“Vi eldirit lo vort. Vi vit va ŝanc ed vi tretit ĝi subpiede. Se hiam venot dua ŝanc, vi falot surgenue ed petegot por ĝi !”

Frosta fluo ektuŝis la koron de Tom, li ne sciis kial. Venante de tiel nekongrua fonto, kaj tiel solene prononcitaj, la paroloj akiris aspekton de vero. Sed li reagis kiel kutime, respondante per insulto kaj moko:

“Ci… doni ŝancon al mi !? Ci ! Eble mi jam tuje falu surgenue ? Sed en la okazo ke mi ne faros — nur por iom argumenti — kio do okazos al mi, diru !”

“Jen ko okazot; mi irot kel eble plej rekte al va onklê ed rakontot al li til lo lasta misfar ku mi sciat pri vi !”

La vangoj de Teom paliĝis kaj ŝi tion rimarkis. Maltrankviligaj pensoj komencis peli unu la aliajn en lia kapo. “Kiel ŝi povus scii? Sed ja ŝi devas esti ekscinta — tiel ŝi ja aspektas. Mi reakiris la testamenton [de mia onklo, favore al mi, pro rea bonkonduto] nur de tri monatoj kaj ree mi sidas profunde en ŝuldoj. Mi movas ĉielon kaj teron por malhelpi elsarkon de miaj agoj, kun relative bona ŝanco povi ĉion surkovri se lasata en paco. Kaj nun tiu ĉi fiulino enketis kaj tiel aŭ aliel eksciis. Mi scivolas kiom ŝi fakte scias. Ve, ve, ve, estas sufiĉe por premi al iu la koron ! Mi nepre amikigu ŝin — neniu alia solvo.”

Tiam li muntis iun imiton de gaja rido kaj, kun molspina pozo, diris:

“Nu, nu, kara Roxy, malnovaj amikoj kiel ci kaj mi ne kverelu. Jen cia dolaro — do rakontu kion ci scias.”

Li etendis la dolarbileton, sed ŝi restis staranta senmove kiel antaŭe. Nun estis ŝia vico malestimi la trompan persvadon, kaj ŝi ne lasis la okazon perdiĝi. Ŝi diris, kun senkompata malcedo en voĉo kaj sinteno — kiu igis al Tom kompreni ke eĉ estinta sklavino kapablas tuj rememori instultojn kaj mistraktojn ricevitajn returne por laŭdoj kaj kuraĝigoj kaj ĝui venĝon por tiuj kiam la okazo prezentas sin — ŝi diris:

“Ko mi sciat? Mi dirot ko mi sciat. Mi sciat sufiĉe por dispecigaj ca aspirata testament — ed pli ankore, notu, muĉe pli !”

Tom konsternegiĝis.

“Ĉu pli ?” li miris. “Kion tio signifas ? Kie troveblus ankoraŭ pli ?”

Roxana ridis per mokrido kaj defie respondis, kapon levita kaj manojn sur la talio:

“Da — mi divenat, vi ŝatut sciaj — pro via mizeraĉa dolar. Vi ja nej vut mon ! Mi intencat sjo diri al lo onklê — ed mi farot post minut — bikos li al mi almene kwin dolars donot por lo inform, ed sot kontent pri to, anke.”

Ŝi dorsoturnis malestime kaj ekiris for. Paniko invadis lian koron. Li ekkaptis ŝian jupon kaj petegis ke ŝi atendu.

Ŝi returniĝis kaj superece diris: *“Nu, nu, vidu; ko mi anoncit al ci ?”*

“Ci… ci… mi ne memoras. Kio do estis ?”

“Mi awgurit as lo dua foj as mi donot al ci bonŝanc, ci rampot surgenue, petegante por ĝi.”

Dum momento Tom estis ŝtonigita. Li anhelis pro ekscito. Tiam li elpuŝis: “Ho, Roxy, tiel teruran aferon ci tamen ne postulos de cia juna mastro ! Tion ci ne vere intencas !?”

“Mi rapide dirot al ci as mi vere intencat to aw nej ! Ci insultit mi ed kwaze al mi kraĉit kam mi envenit, tute povra ed humila ed submetita, lawdante ci pro ca elkreskê tel bela ed plaĉa, ed memorigaj kel mi kutimit gardaj ci ed vartaj ed flegaj kam ci malsana sit ed nej vit alja patrin en lo tuta mond. Milde mi petegit pri nur won dolar por lo povra olda negrin, por havigaj al ŝi hiom da manĝaĵ, ed ci nur scipovit insultaj ed insultaj, damnu ci ! Da Sir, mi al ci dua ŝanc donot, ed tuj, mo ĝi nur duona sekund dawrot, sciu !”

Tom sinkis sur siajn genuojn kaj ekĝemis: “Jen ja, vidu, mi petegas, kaj estas tute honesta petego ! Nun do, Roxy, diru al mi, diru !”

La heredintino de jardekoj da senkontrola insultado kaj ofendado suben rigardis al li kaj kvazaŭ trinkegis glutojn de kontenteco. Tiam ŝi respondis:

“Fajna juna blankula ĝentilhom genuanda ante negra virinaĉ ! Hio to mi aspirit vidaj ante ol vokot mi lo mort-anĝel. Do, Gabriel, nun ci povat blovaj ca kornê, mi sat preta … Leviĝu !”

Tion Tom faris. Humile li diris: “Roxy, bonvolu plu ne puŝi min. Mi meritas kion ci faris, sed estu bonkora kaj lasu la aferojn kiel ili statas. Ne iru al mia onklo. Mi pretas doni al ci eĉ tiujn kvin dolarojn.”

“Da, mi espektat ci farut, ed okaze eĉ pli ankore. Sed mi nej rakontot lo rest te ĉi. Venu al lo fantoma dom, [ke oni nej povat subawskultaj ni].”

“Ajaj, ne tie !”

“Timat-ci lo fantoma dom ?”

“N… ne.”

“Tukaze do, venu al l’fantoma domo ĉirke lo diksa hor ĉi-vespere, ed grimpu law l’eskal bikos lo ŝtupar difekt-iĵit, ed ci trovot mi. Mi loĝat en tu kaban, bikos no eblat al mi loĝaj aljaloke.”

Ŝi direktiĝis al la pordo sed subite haltis kaj diris: *“Donu ca dolarbilet !”*

Li ĝin donis. Ŝi ĝin ekzamenis, komentante: *“Hm, ŝajnat as lo bank nun sat senmona.”*

Denove ŝi startis kaj denove ekhaltis. *“Vat-ci hiom da viski ?”*

“Jes, iom.”

“Irprenu ĝi !”

Li hastis al la supra ĉambro kaj revenis kun botelo dutrione plena. Ŝi prenis ĝin kaj plurajn glutojn trinkis, la okuloj flagretante pro kontenteco. Tiam ŝi ŝovis la botelon sub sian ŝalon kaj opiniis: *“Ĝi sat alt-kwalita; mi kunportat ĝi.”*

Humile Tom tenis la pordon malferma por ŝi kaj ŝi eksteren marŝis severa kaj vertikala kiel grenadisto.

[La “fantoma domo” estis senhoma ruiniĝinta konstruaĵo. Tie Roxana malkaŝas al Tom ties veran originon; ke ŝi estas lia patrino kaj ke li sekve en realo nigrulo kun sklava naturo kiel ŝi. Li cedas al ŝi la malmultan monon, kiun li ankoraŭ posedas, kaj reiras hejmen, malesperante kion fari por elturniĝi el la timiga situacio.
Dum verkado de tiu ĉi romano, Twain mem troviĝis en grandaj financaj malfacilaĵoj, furioze skribante plurajn manuskriptojn paralele por povi ilin vendi. El tio rezultas plurloke neglektoj kaj misoj en la teksto. Tie ĉi li eĉ forgesis igi non Roxana informi sian filon pri la iama interŝanĝo de beboj, ja la sola maniero por povi lin konvinki.]



… kel mi kutimit gardaj ci ed vartaj ed flegaj …

23. **Bartolo**

Anne DE VRIES (1904-1964) estis nederlanda instruisto kaj verkisto, plej konata pro siaj region-tipaj romanoj pri la figuro Bartolo [*Bartje*], kamparana knabeto. Tiurilate li paralelas al A.M. DE JONG. Li mem difinis sian heroeton jene: "[La librojn pri] Bartolo mi skribis el la fono de miaj emocioj kiel infano, kombine kun miaj studoj kaj spertoj de instruisto [en bazlernejo]. Bartolo celas esti voko al honesteco en edukado, al sincereco kaj neprofitemo direkte al la infano, kiu volonte deziras vidi en ni kamaradon kaj tamen ĉiufoje sentas sin de ni trompita. La libroj volas montri kiel pro tio devas estiĝi en la infano samaj malvirtoj, samaj ruzoj kaj insidoj kun kiuj ni plen-kreskuloj daŭre devas lukti." Pro la furora sukceso, Bartolo iĝis eĉ agnoskita simbolo de la koncerna provinco kaj ricevis tie propran statueton.



Bartolo estas knabeto kiu kreskas en malriĉega obitelo* de hubuloj, kiu iompostiom rifuzas akcepti sian mizeran sorton. En tiu rilato fariĝis populara esprimo lia spitema eldiro: *"Mi nej preĝat por brunas fabês."* Tiel, anstataŭ iĝi simpla terkultivada dungito kiel la patro, li volas elmigri al la vasta mondo. La sorto tamen decidas aliel. Post kelkaj jaroj kiel juna laboristo, la tro frua morto de lia patrino devigas lin preni sur sin la zorgon pri liaj multaj gefratoj.

Specimena teksto el la nederlanda originalo

Hij ligt bijna dubbel van het lachen. *"Hij, kiek, hij daar, die Hannes, dâ's een beste. Die is al tien jaar trouwd en heeft nog geen kiender bij z'n dikke wief… Griep toe, Hannes ! D'r is nog nooit ene zo gemakkeliek an een flinke zeune kommen."* En dan brullen ze weer.

Serĉante novajn gepatrojn

[La juna knabo Bartolo igis sian patrinon promesi ke li ricevos ŝatatan manĝaĵon por la tagmanĝo. Lia patrino tamen, pro multe da laboro, forgesas la haste kaj senatente donitan promeson. Ŝi servas la kutimajn kuiritajn brunajn fabojn. La knabo ribelas kaj ne volas manĝi. Lia patro ekkoleras kaj fine rezultas forsendo el la hejmo, kvazaŭ por ĉiam.]

La manojn en la poŝoj, la okulojn senvage al la vojeto, tiel lin vidas preteren pasadi grupeto de vojlaboristoj. Ili sidas laborpaŭze manĝantaj sur la varmeta deklivo de seka vojranda foso kaj malrapide maĉas sian panon.

- *"He, Bartol,"* vokas unu inter ili, *"ke irat lo vojaĝ, knabet ?"*

- *"Anke bona tag,"* diras Bartolo surprizite. *"Mi tute nej vidit ci, hom."*

Samtempe li rimarkas la panon en iliaj manoj. Lia langopinto aperas kaj ĉirkaŭlekas liajn lipojn. Li rapide proksimiĝas kaj glitas laŭ la bordo ĝis apud ili. Liaj avidaj rigardoj, kvazaŭ de hundeto, saltas de unu al alia. Al la grandaj pecoj kiujn la viroj malrapide deŝiras per siaj brunaj dentoj. Al la bluaj kruĉetoj, dirantaj glugluglu antaŭ iliaj buŝoj.

- *"Mi sat forpelida,"* rakontas li, per tremanta voĉeto.

Ili ĉesas maĉadi kaj alrigardas sin. Unu okulumas.

- *"Forpelida? Kal?"*

- *"Mi nej volit preĝaj."*

- *"Nu, kal do nej?"*

- *"Mi nej preĝat por brunas fabês,"* diras Bartolo. Kaj tiam li rakontas ĉion.

Tondre, ili nun ridas pro tio ! Kaj li povus ploradi pro ĝi. Ili dorsen apogiĝas al la deklivo kaj ridegas, kun siaj plenaj buŝoj malfermitaj. Unu erarglutas sian

kafon kaj al li terure sufokpremiĝas. Unu kamarado devas frapi lian dorson.

- *"Nej ridu tele !"* krias Bartolo kolereme. *"Sat ja certe sufiĉe malbone ! Mi vat malsat kel ĉeval, viro !"*

Kunestas maljuna viro, kun ruĝa rubando ĉirkaŭ la ĉapo. Estas Onklo Ko; tieldire la laborestro. Li havas malgrandajn bonajn okulojn kaj blankan vango-hararon. Kaj amuzan vizaĝon kvazaŭ bruna torfo kun multe da sulketoj. Tiu palpas en sia pansako kaj metas unu tranĉon kun lardo sur la genuon de Bartolo.

- *"Trankwile formanĝu to, knabet,"* diras li afable. Kaj tiam ankaŭ la aliaj fariĝas regalemaj. Ili ĉiuj ĵetas pecon da pano apud lin en la herbon. Panon kun butero, panon kun fromaĝo, kaj panon kun sebumo; tio estas lardograso. Bartolo tion ĝoje kunkolektas farante el ĝi amaseton sur sia genuo.

- *"Multa dank, ular ! Multa dank !"*

- *"Ed ci nej devat preĝaj por to, sciu !"* krias unu.

- *"Mo mi ĝuste toĥ farot to,"* respondas Bartolo.

Li nun sentas sin tiel gaja kaj tiel intense dankema. Jen li ja denove esperis: la Kara Disinjoro ĉiam aŭskultas onin. Nur unu kvaronan horon pli frue li preĝis por iom da manĝaĵo, kaj nun kuŝas tie tuta amaso preta. Tio havigas al Bartolo grandan serenec-on, ĉar nun li scias ke la Disinjoro ne plu koleras kontraŭ li. Tiu ankaŭ plue ja helpos. Jes, estas iom komike eksterdome, sed Bartolo tamen faras. Li kun-igas siajn manetojn super la lardo kaj diras: *"Disir, benu tu ĉi manĝê, Amen."* Kaj ke ili nun denove rideg-as, estas al li indiferente. Estas ja plenkreskuloj.

- *"Ed ke ci do nun volat iraj, Bartol ?"* demandas Onklo Ko.

- *“Nu, vir,”* eksplikas Bartolo, kun plena buŝo kaj strio da lardo je la mentono, *“mi nun sat serĉanda aljas patrê ed patrin, he.”*

Pro tiu diro la laboristoj ree devas manfrapi siajn genuojn. Ili plu ne ridas, ili krias kaj hurlas. Eĉ Onklo Ko kunridetas. Bartolo lasas sian buŝon stari malferma pro miro kaj li rigardegas de unu al la aliaj. Kio okazas? Ĉu li do diris ion tiel ridigan ? Ĉu estas komike serĉadi aliajn patron kaj patrinon ? Eĉ tiam kiam oni ne rajtas havi la koron por returnen iri al sia hejmo?

- *“Hohoho !”* muĝas unu. *“Tam ci sat ĉe lo ĝusta giĉed, knabet ! Ni ŝon konat aljas patrê ed patrin por ci. Mi nej kapablat prenaj ci, kwankam mi ege bedaŭrat, sciu, mi ŝon vat nest plena je geidês. Mo li, kontree…”* Lia voĉo falsetiĝas; li preskaŭ kunfaldiĝas pro ridegado. – *“Li, vidu, li te, tu Hannes, tu sat bonegul. Tu sat ŝon diks jars edziĵinda ed ankore nej vat infans kun sa dika virin. Ekkaptu, Hannes ! Niam hiu tel facile akirit tawga filet !”*

Kaj tiam ili denove ĉiuj hurladas.


Bartolo dubeme alrigardas la indikitan viron.

- *“Rigardu ante ci !”* krias tiu. Li estas ruĝa pro kolero kaj batas per sia pansako al la farsulo. Ŝajnas ke ili reciproke estas ŝirontaj al si la felon.

Ho, Bartolo bone scias, ili jam ree mokas lin. Al li estas egale, ja ! Al li certe estas egale. Poste li parolos kun Onklo Ko. Sed nun li volas manĝi. Jen la ĉefaĵo. Kaj poste li petos al la Disinjoro ke Tiu helpu. Jes, tion Tiu certe faros. Tiam ĉio enordiĝos, same kiel pri la manĝo. Vidu la amuzegon, kiun ili denove havas ! Bartolo plenŝtopas sian buŝon. Li respondos plu neniun vorton al ilia nekompreneblaj komentoj.

24. **La Paroĥo de Mizero**

John WILMS (1893-1978) estis skabeno de la flandra havenurbo Antwerpen, kiu i.a. verkis pri historio kaj folkloro en sia *De Parochie van Miserie,* la kvartalo de Sankta Andreas el kiu li mem devenis. Temas en tiu pri la bunta vivo je fino de la 19-a jarcento, el kiu mi ĉerpis jam antikvan tekston [→ Barbetkaptistoj (I)] kaj ĉi poste dialektan kiu same traktas apartan folkloraĵon, nome la ĉiujaran paradon de "barbetokaptistoj", kiuj estis bredantoj de paruoj (barbetoj) kaj aliaj kantbirdoj, por organizi konkursojn pri ties kantado. Centra persono en tio estis Freneza Rik [*Zotte Rik*] kiu ankoraŭ postvivas sub formo de samnoma folklora giganto, portata dum festoj.



Specimeno de la flandra originalo

- *Mieke, pakte gij ook e pintje ?*
- *'k Stik er nog liever in ! Geft mene prei moar, komoan, da'k frèt veur de joeng kan koeepe…!*
- *Zè moar gerust, oan aa prei kom ekik nie oan. Die zit opzaai, da wette wel, ei ? Hiesie !* En hij toonde daarbij zijn portemonnee.
- *Komoan, gef oep !*
- *Loat maa ze nog wa baaiouwe, Mieke !*

Dat er geen kruid tegen gewassen was, wist Mie beter dan wie ook en zij probeerde hem dan met kalmte te overreden.

Barbetkaptistoj (II)

Freneza Rik estis portisto de ornamita birdokaĝo en folklora asocio de la Paroĥo de Mizero (la kvara kvartalo). Vestita per broditaj tuniko kaj tripinta ĉapelo, li paradis senĉese dancante kaj saltante antaŭ

la kantantaj barbetkaptistoj, ĉirkaŭita de hordo da infanoj.

Li tiel elĉerpis sin mem, ke lia lango elpendis kaj la virinoj de la publiko lin tre kompatis. Sed Rik estis tenaca diablo kaj ĉiam reagopreta, kiam iu kunsenta koro lin admonis konduti iom pli trankvile.

- *"Se mi tuj ricevot brandet, mi ree englutot ma lang. Ko ci volat: frenezul sen kapricês nej sat frenezul !"*

Post kiam Rik delonge estis malaperinta de la barbet-kaptista scenejo, alvenis anstataŭanto, kiu same hejmis en la Andreas-kvartalo: "freneza Broks". Pri tiu oni ne vere rajtas diri ke li estis nenormala, kvankam iuj asertas ke mankis klapo en lia kapo.

Li estis malpurega ulo, kiu laboris ĉe la urba fekaĵo-servo kaj pasigis sian liberan tempon en drinkejoj. Pri sia multnombra obitelo* li malmulte zorgis. Jam la unuan tagon post elpago de lia waĝo* lia edzino devis aĉeti je kredito en la butikoj. La ŝuldon oni notis en kajero per rondetoj, krucetoj, streketoj vertikalaj aŭ horizontalaj, ĉar kutime la vendistino scipovis nek legi nek skribi. Kredeble estis pro tio ke ŝi ĉiufoje faris eraron ... je sia propra avantaĝo, spite la fakton ke ĉe dono de kredito ĉiu artiklo kompense altiĝis per fibro* aŭ cendo.

Por Broks estis plej natura afero en la mondo surmeti la festnazon kun sia ĵus akirita salajro, migrante de unu drinkejo al la sekva. Kiam li frumatene reaperis en la najbaraĵo kaj lia virino tion eksciis, ŝi kuris al tiu trinkejo kaj komencis vangofrapadi lian aĉan fasadon per ĉiuj fortoj. Konscia pri sia kulpo li lasis ŝin fari, sed tio ne malhelpis al li mendi freŝan bieron, ĉe kies eltrinkado la frapoj elverŝis grandan parton, kiu tra liaj buŝanguloj kaj trans lian mentonon trafis sur liaj vestaĵoj. Fininte li kutimis viŝi buŝon kaj nazon sekaj per la manpolmo kaj diri al la edzino:

- *"Minj, prenot-ci anke glaset ?"*

- *"Plivole mi en ĝi sufokiĵu ! Prefere donu al mi lo waĝ*, ek, por as mi povu aĉetaj ĉuwaĵ* por los infans…!"*

- *"Su trankwila, ta waĝ mi nej tuŝat; tu sidat aparte, ci ja sciat, nej ? Jene !"* kaj li montras sian monujon.

- *"Ek, donu !"*

- *"Ho, lasu mi gardaj ĝi ankore hiom, Minj !"*

Ke ne ekzistas kuracherbo kontraŭ tio, ŝi sciis pli bone ol iu ajn, kaj ŝi do tiam ekprovis konvinki lin per mildeco. Li rajtis restadi ĉe l'bufedo tiom longe kiom li deziris, se li nur volus doni sian "waĝon", ĉar se ne, ŝi perdus ĉiun krediton en la butikoj kaj kio tiam poste?

Sed ankaŭ tiu taktiko ne balzamis lin, ĉar tiam li atakis:

- *"Ci nej cedat al ca vir plezuret, ci ! Mi ankore nej irot hejme, bikos mi balde devot iraj al los barbetkaptistês ! Da, en jena monuj sidat ca waĝ, mo mi plivole ĝi ĵetot en lo kloak !"*

Decideme li elpaŝis al la strato, sekvate de la ploranta virino kaj de aliaj trinkejaj klientoj. Kaj efektive, per unu gesto li ĵetis la monujon en la kloaktruon. Kaj same rapide li malaperis.

Kelkaj bonvoluloj, kiuj vere kompatis la virinon, fortiris la kovrokradon de la kloako, per malnova kaldronkulero ĉerpante je la trezoro, sed vane. Ili eĉ kredis esti puŝinta ĝin ankoraŭ pli profunden kaj tial klopodis per nudaj manoj. Unu el la viroj faldis manikon de sia ĉemizo kiel eble plej supren kaj kuŝigis sin laŭlonge. Lia brako malaperis ĝisŝultre en la fetora koto, kiun li vigle turnis kaj priserĉis ĝis la objekto finfine revenis al la taglumo.

Kun timanta koro kaj amareco, kiun oni povis legi sur ŝia vizaĝo, la povrulino atentis la operacion. Sed,

kvazaŭ ŝi havis malbonan antaŭsenton, ŝi malfermis ĝin malrapide kaj ... trovis en ĝi nur unu kaj duonan cendon. Senkuraĝe kaj lante ŝi faris kelkajn paŝetojn en la strato kaj tiam malvigle forĵetis la monujon.

Interdume "freneza Broks" aliĝis al la birdokaptistoj por kiuj li ĝis malfrue en la vespero ludis kiel paljaso.

Meze de la nokto la loĝantoj de tiu strato vekiĝis pro kantaĉado de soleca vira voĉo:

> *Ho, Minj, malfermu lo pord*
> *Ca karul alvenit*
> *Ed se ci nej malfermot*
> *Mi ree irot festenaj !*

Multaj popolaj kutimoj malaperis sub premado de novaj tempoj. Tiel okazis ankaŭ al la barbetkaptistoj kaj ilia parado. Kion ja farus tia asocio, kies anoj promenadis ambaŭflanke de la veturvojo — kiel ankaŭ la travestiaj "hinduloj" aŭ "rizokakantoj" — kun la dancanta paljaso antaŭe, meze de la densa aktuala aŭtotrafiko ?

25. **La Kapitano el Köpenick**

Carl ZUCKMAYER (1896-1977) estas de multaj konsiderata la plej sukcesplena germana teatro- kaj filmverkisto antaŭ kaj post la Dua Mondmilito. Lia *Kapitano,* kiel parodio kontraŭ la prusa militismo furoris ĉirkaŭ 1931, dum lia *Generalo de la Diablo* same faris ĉirkaŭ 1946. Pro malamo de la Nazioj li fuĝis al Usono, sed post la milito li reiris al Germanio, kvankam kiel usona civitano. Pluraj liaj teatraĵoj aperis kiel filmoj.



Temo de la "Kapitano, germana fabelo" estas la jena. En Orienta Prusujo, antaŭ pli ol jarcento, la ŝuisto Wilhelm Voigt, pro iama malgrava karcerpuno ne sukcesas akiri oficialan identigilon. Sen tiu karto li ne kapablas akiri laboron, sed sen laboro li ankaŭ ne kapablas akiri la dokumenton. Post longedaŭraj kaj ofte ripetitaj provoj en la administrada maŝino, ĉiuj nepre vanaj, li fine decidas perforte alproprigi al si la aspiratan legitimilon. Por tiu celo li trompvestas sin kiel armea kapitano, ĉar oficiro en funkcio tiam kaj tie ĝuis preskaŭ senliman aŭtoritaton. Surstrate Voigt haltigas marŝantan taĉmenton de soldatoj kaj veturigas ilin al la malgranda urbeto Köpenick por tie ekokupi la urbodomon, kie li esperas trovi la bezonan dokumenton. ne sciante ke tie oni ne liveras identigilojn. La dialogoj enhavas berlinan dialekton.
La teatraĵo ripozas sur reala kapriolo plenumita de tiunoma etkrimulo, kiu per tiu ruzaĵo sukcesis forporti la urbodoman kason de Köpenick kaj sin regali per la rabaĵo. Siatempe kaj ankoraŭ poste li iĝis fama pro siaj petolaĵoj. Li finis sian vivon en Luksemburgo kie lia tombo restas flegata je kosto de la urbo. Bronza statuo sur la enira ŝtuparo de la koncerna urbodomo en Köpenick eternigas la eventon.

Specimeno de la germana originalo

KILIAN – Dazu bin ich nicht hier. Ich hab' mehr zu tun.
WENDROWITZ – *Det scheint mir auch so. Sie sind wohl 'n janz grosser Herr hier, wat ?*

Opereta Okupado

Sceno 18

[Antaŭĉambrego kun ŝtuparo en la urbodomo de Köpenick. En la fundoplano svingopordego larĝe malfermita al la strato. Pluvas ekstere. En la interno regas profunda trankvilo. Policano Kilian, senforme dika homo, sidas en sia malgranda malfermita gardejo, dekstre de la ĉefenirejo, kaj legas ĵurnalon.]

(La skabenoj RAU kaj COMENIUS eniras tra flank-pordo. Ambaŭ okupiĝas pri elpakado de maten-manĝo.)

COMENIUS – Ni rapide faru manĝopaŭzeton. Tiu afero certe daŭros ankoraŭ horojn. Ĝis alveno al la propono pri nomado de la nova strato, ni jam delonge estos ree supre.

RAU – Tre ĝuste, ni iru en la konsilistaran kelon por trinki duonan pokalon da ruĝvino.

COMENIUS – Ne danĝeros tuta pokalo ! Ja neniel urĝas. La urbestro ankoraŭ ne ĉeestas.

RAU – Ankaŭ ne estas lia fako. Tion faras Rosen-crantz. Se la impostoj atingos voĉdonadon …

COMENIUS (manĝante) – Rezultos nenio. Rezultos nenio el tiu afero. (al la policano) Kilian !

RAU – Jes, Sinjoro Skabeno ?

COMENIUS – Se oni bezonus nin por voĉdonado, ni sidas en la kelo. Avertu nin tie.

KILIAN – Tre bone, Sinjoro Skabeno.

(RAU kaj COMENIUS for tra pordo super kiu pendas ŝildo kun surskribo <Al la konsilistara kelo>)

(La lavistino KÄHNDORF, knabino en maldika mantelo, kun malseka hararo, envenas de ekstere.)

KILIAN (sufiĉe malafable) – Kion ci do denove serĉas tie ĉi ?

LAVISTINO – *Mi toĥ bezonat ci !*

KILIAN – Tiom da stulteco estas ja kontraŭmilitisma ! Legitimiloj troviĝas en la ŝtatadministra oficejo; ĉu ci do, ne komprenas tion ? Tie ĉi estas urba administrejo, tie ĉi ne ekzistas pasporta oficejo !

LAVISTINO – *Mi tam mi devot veturaj per trajn, ed tom da libera temp mi nej vat, ed tal mi pensit as …*

KILIAN – Pensis ?! Ci neniel bezonas pensadi, notu tion ! Kiom ofte mi do ankoraŭ devos ĉagreniĝi pro ci !

LAVISTINO – *Mi ja nej vat restadza atestil ! Mi ja venat el lo Spree-arbar…*

KILIAN – Tiam tenu cin al la Spree-arbaro ! Eksteren !

LAVISTINO (iras for) – *Nun mi vere nej sciat plu, ko mi farot …*

KILIAN – Malsaĝa anasino ! (Eksidas denove kaj legas sian ĵurnalon)

* * * * * * *

(La urbestro OBERMÜLLER kaj lia urbosekretario KUTZMANN aperas en la pordejego. Ili fermas siajn pluvombrelojn kaj tiujn skuas.)

OBERMÜLLER (meze en konversacio) – Kara Kutzmann, mi staras sur jena vidpunkto: ekstra kolbaso al neniu ! Por kio ni kreu specialan regulon, ĝuste por la grandaj lavejposedantoj, se tiu ne validus same por malgrandaj entreprenoj ? Tiuj homoj ja ĉiel jam gajnas multe da mono.

KUTZMANN – Tute prave, Sinjoro Urbestro, oni pripensu nur ke ili konsistigas la ĉefajn impostpagantojn

de nia urba komunumo. Tiuj ĉi homoj tieldire pagas niajn salajrojn ! (ridas)

KILIAN (levas sin ĉe ilia eniro kaj nerveme deprenas de ili la pluvombrelojn) – La ombrelojn mi gardos ĉi malsupre, Sinjoro Urbestro, alimaniere gutados en la salonego kaj estiĝos rivereto.

OBERMÜLLER – Dankon, Kilian. Sed memorigu al mi ĉe mia hejmeniro.

KILIAN – Sinjoro Urbestro ne forgesos ĝin; por tio zorgos Kilian. La surŝuojn ankaŭ, mi petas. Tiuj farus makulojn sur la ŝtuparo.

OBERMÜLLER – Jes, jes, multan dankon. (Kilian fortiras liajn kaŭĉukajn ŝuojn) Ĉu la sinjoroj estas en kunveno ?

KILIAN – Jes, Sinjoro Urbestro.

OBERMÜLLER (pluenpaŝante kun li) – Ne, ne, en la lavej-afero mi ne povas konsenti kun vi. (sur la ŝtuparo) Specialaj favoroj por pagantoj de pli altaj impostoj, tio estus trarompo de la sistemo. Estas afero de principoj, mia kara. Absolute ne konsiderinda ! (ambaŭ for)

(Envenas la terkultivisto WENDROWITZ, fortika viro en malseka mantelo) – *Brrr !* (li sin skuas) *Ta porkêveter !* (piedbatas por forigi koton de siaj ŝuoj).

KILIAN – Ci, kion ci faras !? Ĉu ci do ne vidis ke troviĝas purigostango ekstere ?

WENDROWITZ - *Puriga stang? Jen hio por vulpês o ursês, nej ?* (li ridas)

KILIAN – Se ĉiu envenus kun kotaj ŝuoj, estus baldaŭ porkejego ĉi tie !

WENDROWITZ – *Ma kara amik, ĉe taŭga kamparan lo porkej sat pli pura ol ĉe ci lo domtegols. Ci nur nej imagu as troviĵat kotaĵês en deca porkej !*

KILIAN – Tio tute ne koncernas min. Kion ci do volas tie ĉi ?

WENDROWITZ – *Nu, mi volat hiom vizitaj ci, por as ci vu hiom da distrê en ca bud. Por to mi speciale veturit per ma ĉaret tutas dikses kilometêrs trans lo kampar.*

KILIAN – Ĉu ci estas tekultivisto ?

WENDROWITZ – *Nu, anke to ci ŝon divenit ?*

KILIAN – Tiam ci ja apartenas al la distrikto Teltow.

WENDROWITZ – *Mi da, mo mas terpoms, tus mi liverat en Köpenick, ed tal mi devat regulĵjaj te ĉi pri lo vilaĝa vendimpost. Jen lo liveril.*

KILIAN – Bone, iru supren.

WENDROWITZ – *Ke do? Mi nej konat lo ej.*

KILIAN – Kontraŭe de ci, je la muro, pendas mapeto. Estas ĉambro 3B.

WENDROWITZ (studas la mapon, kiu estas flaviĝinta afiŝo je la muro, kun multaj klarigaj simboloj) – *Nej, to mi nej komprenat. To ŝajnat al mi saj kwaze lo legom-ĝarden de ma najbar Ŝmudik.*

KILIAN – Tiukaze ci faru fortostreĉon. Estas cetere simple: dua etaĝo maldekstre, tute rekte tra la koridoro, dekstren tra la mezo.

WENDROWITZ – *Ho, to mi nej trovut eĉ en tri semajns! Nej povat-ci kondukaj mi ?*

KILIAN – Por tio mi ne deĵoras ! Mi havas aliajn devojn.

WENDROWITZ (moktone) – *Tel ŝajnat anke al mi. Ci certe sat alta funkciul te ĉi, nej ?*

KILIAN (aŭskultas en direkto al la strato, el kie ek-aŭdiĝas aklamado de infanvoĉoj kaj tuj poste laŭtakta marŝado) – Kio do okazas ? Ja okazas io tie !

WENDROWITZ – *Ko speciala sut ? Pasat lo gvardi.*

KILIAN – Sed ne ekzistas gvardio ĉe ni. Tio ja estas…

VOIGT (de ekstere) – Taĉmeeento… halt ! Fruuunte ! Ĝustiiiĝu ! Okulojn reeekte ! ‘teenton ! Bajonetojn … sur ! (La ordonojn akompanas akre klakantaj bruoj)

KILIAN – Kio okazas do? Estas ja – estas ja serioze !!

VOIGT (vestita kiel kapitano, envenas, paŝas militisme vigle al Kilian. Tiu saltas el sia gardejo, rektigante sian staturon) – Ĉu vi estas sola gardisto tie ĉi ?

KILIAN – Jes, Sinjoro Kapitano.

VOIGT – La policinspektisto ?

KILIAN – En sia oficejo, ĉambro dekdu.

VOIGT – Vi obeos miajn ordonojn !

KILIAN – Je dispono, Sinjoro Kapitano ! Ĉu mi voku la Sinjoron Inspektiston ?

VOIGT – Ne tuje. Ĉu la urbodomo havas ankoraŭ trian elirejon krom la fruntan kaj dorsan ?

KILIAN – Tra la konsilistara kelo, Sinjoro Kapitano, krome neniun.

VOIGT – Bone ! (ree en la pordejo, ordonas alekstere) – Unu viro restos ĉe la ĉefenirejo, dua okupos la malantaŭan, tria gardos la enirejon de la konsilistara kelo. Neniu rajtas forlasi aŭ eniri la urbodomon, sen mia persona permeso. Okupada afero, komprenite ?! La enirejojn oni ŝlosu. La ceteraj viroj sekvu min. Kaporalo, igu alpaŝi ! (al Kilian) Vi kondukos min al la oficejo de la urbestro.

KILIAN – Je dispono, Sinjoro Kapitano !

(Ekstere la voĉo de la kaporalo: “Vicojn – dekstren turnu – marŝ !” Kelkaj soldatoj aperas en la enirejo.)

KILIAN – (Ekmarŝe suriras la ŝtuparon, tiel vigle kiel permesas lia korpovolumo.)

VOIGT – Antaŭen, marŝ ! (Ritmapaŝe supren. La kaporalo kaj ses grenadistoj sekvas)

WIDROWITZ (gape postrigardas ilin)

(En la fundo fermiĝas krake la pordego.)

Mallumo



Ko speciala sut ? Pasat lo gvardi.

GLOSARO

ĉuwaĵo (Gavaro) Slangovorto por manĝaĵo.

durako – Slangovorto por naivulo, stultulo, laŭ Gavaro

espekti <*expect*> Atendi esperante aw sciante ke la afero efektive realiĝos.
espekto [ekspekto-1,2] 1. 2. 3.

estingi ies kandelon (Gavaro) Slanga esprimo por mortigi iun.

fibro (Gavaro) Slangovorto por spesdekono

gladumisto – Slangovorto por perfidanto, trompanto, laŭ Gavaro

horso (Gavaro) Slanga vorto por ĉevalo

kaverno (Gavaro) Slanga vorto por trinkejo/drinkejo

knabego (Gavaro) Slanga vorto por kolega krimulo.

koineo - (lgv) La ofitsiale aktseptita, laŭnorma formo de lingvo, kontraste kun kaj reganta super ĉiuj ĝiaj dialektoj. Lingvo kiel ĝi estas uzata kaj trudata de aŭtoritataj instancoj kaj instruata en la lernejoj.

leĝeruno – Slangovorto por ĉiesulino, laŭ Gavaro

no - 1. Prepozicia stumpigo de "nomo", metota antaŭ iu substantivo ne fleksienda – precipe propra nomo – por ricevi ties fleksiformon anstataŭe; egzemple: *"oni kulpigis non Auld, ke li..."* anstataŭ *"oni kulpigis Auld-on, ke li..."*. 2. Same, per redukto al "**n.**", metota antaŭ nombro por eviti konfuzigan sinsekvon: *"en 1923 oni nombris 50 kazojn, en 1940 jam 100, kaj en 1980 n. 250."*

obitelo - [familio-1] Familia kerno konsistanta el patro, patrino, kaj infanoj; elmete de geavoj, gekuzoj, genepoj.

panimo – (Gavaro) Slanga vorto por vizaĝo.

rato – (Gavaro) Slanga vorto por spesdekono.

setli - <*to settle*> Ekloĝi en nova regiono aw ĉirkaŭaĵo; establi sian metiejon.
setlejo [setlemento]
setlantoj <*settlers*>

sika – Neologismo por “malsana”.

sociolekto – (lgv) Unu el pluraj kromformoj de lingvo kiuj tra la jarcentoj normale estiĝas en naturlingvoj ; precipe pra-lingvo, dialekto, slango. Tiujn formojn en Esperanto traktu respektive Arkaika Esperanto, Popido, kaj Gavaro.

surmeti la festnazon – Vagi de unu trinkejo aŭ foirbudo al alia ĝis ebriiĝo.

vojtretisto - (Gavaro) Slangovorto por vagabondo.

waĝo – (Gavaro) Slangovorto por salajro.

woreino – Slangovorto por ĉiesulino, laŭ Gavaro



Tri Internacilingvaj Barbuloj

BIBLIOGRAFIO

P.J. Meertens – Dialectologie en Literatuur:
Bibliografie der Dialecten van Nederland
Album Grootaers, Leuven, België 1950

H. Rebell - Le langage populaire chez nos écrivains

Julius Schaeffer – Das Mundartenbuch
Bonn, BRD 1926

W.W. Skeat - A bibliographical list of works in dialect
London, England 1877

Revuo - Les dialectes belgo-romans
Bruxelles, Belgique 1943-1956



… ku veligot lo tondra ŝip anstate ni …

{ El *La Konspiro*, en Gavaro, la Verda Slango)

VORTARETO

Koineo - Dialekto

-ad	*-adz*	ĝia	*ĝa*	mil	*milje*
-aj	*-as*	ĝis	*til*	miliono	*miljun*
ali’	*alj-*	havi	*vaj*	morgaŭ	*morge*
almenaŭ	*almene*	hodiaŭ	*hodie*	multe	*muĉe*
ankaŭ	*anke*	i-	*hi-*	ne	*nej*
ankoraŭ	*ankore*	-i	*-aj*	neni-	*ni-*
anstataŭ	*anstate*	-id	*-idz*	nia	*na*
-ant	*-and*	-iĝ	*-iĵ*	-ont	*-ond*
antaŭ	*ante*	ili	*zi*	-os	*-ot*
apenaŭ	*apene*	ilia	*za*	-ot	*-od*
-as	*-at*	-ind	*-indz*	preskaŭ	*preske*
-at	*-ad*	-int	*-ind*	rapide	*preste*
aŭ	*o*	-is	*-it*	sata	*sjata*
baldaŭ	*balde*	-it	*-id*	sed	*mo*
bonvolu	*ples*	jam	*ŝon*	Sinjoro	*Sir*
cent	*ĉend*	jes	*da*	Sinjorino	*Sirin*
cia	*ca*	kaj	*ed*	ŝia	*ŝa*
ĉar	*bikos*	ke	*as*	tamen	*toĥ*
ĉi-	*sj-*	ki-	*k-*	ti-	*t-*
ĉirkaŭ	*ĉirke*	kontraŭ	*kontre*	tre	*muj*
da	*dal*	kvazaŭ	*kwaze*	unu	*won*
dek	*diks*				
esti	*saj*	la	*lo(s)*	-us	*-ut*
Fraŭlo	*Mastrê*	lia	*la*	ve	*laz*
Fraŭlino	*Mamzel*	mia	*ma*	via	*va*
ge-	- - - -	mi petas	*ples*		

Dialekto - Koineo

-ad	-at	*-id*	-it	*-od*	-ot
-adz	-ad	*-idz*	-id	*o*	aŭ
-aj	-i	*-iĵ*	-iĝ	*-ond*	-ont
almene	almenaŭ	*-ind*	-int	*-ot*	-os
-and	-ant	*-indz*	-ind	*ples*	bonvolu
anke	ankaŭ	*-it*	-is	*preske*	preskaŭ
ankore	ankoraŭ	*hi-*	i-	*preste*	rapide
anstate	anstataŭ	*k-*	ki-	*saj*	esti
ante	antaŭ	*kwaze*	kvazaŭ	*Sir*	Sinjoro
apene	apenaŭ	*kontre*	kontraŭ	*Sirin*	Sinjorino
as	ke	*laz*	ve	*sj-*	ĉi-
-as	-aj	*lo(s)*	la	*sjata*	sata
-at	-as	*Mamzel*	Fraŭlino	*ŝon*	jam
balde	baldaŭ	*ma*	mia	*t-*	ti-
bikos	ĉar	*mastrê*	fraŭlo	*til*	ĝis
ca	cia	*milje*	mil	*toĥ*	tamen
ĉend	cent	*miljun*	miliono	*-ut*	-us
ĉirke	ĉirkaŭ	*mo*	sed	*va*	via
da	jes	*morge*	morgaŭ	*vaj*	havi
dal Sirin	da Sinjorino	*muĉe*	multe	*vjot*	voto
diks	dek	*muj*	tre	*won*	onu
ed	kaj	*na*	nia	*za*	ilia
hodie	hodiaŭ	*nej*	ne	*zi*	ili
		ni-	neni-		

Jen la tria ero en la serieto pri sociolektoj, apud Arkaika Espo kaj Gavaro.

En praktiko ne estas facile determini kio estas dialekto aŭ ne. Ĉiu kohera lingvoformo, se konsiderata en la koncerna grupo de parolantoj mem, kie ĝi funkcias kiel komunikilo, estas jam lingvo, eĉ se ĝi troviĝas ankoraŭ en piĝina stato de disvolviĝo.

Sed rigardata kiel lingvoformo devianta de la formo, kiun uzas pli granda socio en kiu koncerna grupo nestas — regiono aŭ vilaĝo en iu lando, sed ankaŭ iu kvartalo en granda urbo — ĝi efikas kiel dialekto, tio estas kiel malŝatata aŭ nur komike impresanta devio dis de la normo.

En tiu senco oni renkontas en la literaturo de establitaj lingvoj romanojn en kiuj dialektaj tekstoj, precipe per dialogoj, rolas por socie apartigi kaj marki koncernajn parolantojn.

Se tiu fenomeno havas ekzistorajton en naturlingvoj, kial do ne ankaŭ en la internacia planlingvo Esperanto, aldone al la Fundamento ? Kompreneble, tio postulas ree … plani ĝin, same kiel faris Zamenhof rilate la norman lingvon.

M.H.